

La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia
Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio:

BOX 1367, ELIZABETH STREET P.O., MELBOURNE
(AUSTRALIO).

N-ro 31. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Januaro, 1923. Price 4d.

The Australasian Esperanto Association.

AFFILIATED GROUPS.

- Belgrave.**—(E. Grupo). Fino S. Giles, "Warawing," South Belgrave.
- Brisbane.**—E. Klub, Sro. Sycamore, "Bonvenu," O'Mara St., Lutwyche, Brisbane.
- Hobart.**—Esperanto Society, Sro. E. F. Heritage, 35 Risdon St., Newtown, Hobart.
- Melbourne.**—Hardware Chambers, 350 Little Collins St., Friday, 8 p.m. Rationalista Esperanta Grupo, Temperance Hall, Melbourne.
- Mont Albert.**—Sek., Fino B. K. Blythe, 10 Victoria Ave., Surrey Hills.
- Northcote.**—(La Verda Stelo). Sek., Sro. G. Delaney, 16 Gordon Grove, Northcote.
- Oakleigh.**—(Iru Antauen). Sek., Sino. R. Bigelow, Kangaroo Rd., Oakleigh.
- Rabaul.**—(Nov. Guinea, E. Grupo). Sro. F. Simon, Rabaul, New Guinea.
- Sandringham.**—(Marborda Grupo), Fino M. Hollow, "Porteath," Bamfield St., Sandringham.
- S. Australia.**—Esperanto Society, Sro. W. L. Waterman, 20 Henley St., Torrensville, S.A.
- Sydney.**—Esperanto Society, Sro. L. Fosto, "Edna," Chisold Parade, Campsie, N.S.W.
- Townsville.**—Esperanto Society, Sro. Chas. Price, School of Arts, Stanley St., Townsville.
- W. Australia.**—(Nigra Cigna Grupo), Fino F. Cherrett, 46 Leonard St., Victoria Park, Perth, W.A.
- Whangarei, N.Z.**—Sro. W. H. King, P.O., Whangarei Nth., Auckland, N.Z.

Chocolate Bowl Sweets.

Made Specially for "My Lady's" delectation. Available in choice and exclusive varieties daintily packed. Phone your next order, or write for particulars of these "Made to-day" Sweets. We supply quantities to suit individual requirements.

ASK FOR

Chocolate Bowl Sweets at Confectioners—All Suburbs.

Esperanta entrepreno—Deziras korespondi kun samfakanoj en Usono, Svisujo, Francujo, Rusujo, kaj Austrujo, pri farado de chokoladaj sukerajhoj.

**18 CENTREWAY, COLLINS STREET
MELBOURNE.**

Telephone: Central 2210.

Universal Esperanto Association.

Founded, 1908.

Objects:

To spread the use of the international help language Esperanto.

To facilitate communication between the peoples without distinction of race, nationality, religion or language.

To institute international services available by everyone whose intellec-

tual and material interests extend beyond the limits of their own country

Delegates in every country.

Membership, 5/- per annum, or with the monthly magazine "Esperanto," 12s. 6d.

Subscriptions for 1923 are now payable to—

C. W. BALLARD (Delegate for Melbourne and Chief Delegate for Australia),
27 Lansdowne Road, East St. Kilda, Victoria.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Gis la 6a de Januaro ni ricevis la jenajn sumojn.—

C. H. O'Dwyer, 4/6; W. Macdonald, 4/6; A. Klein, 12/6; American Tea, £4; C. Price, 4/6; H. Ballentyne, 3/-; G. Bolden, 4/6; L. S. Payne, 5/-; A. A. Scammell, 4/6; A. McKenzie, 4/6.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 31. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Januaro, 1923.

NEW YEAR'S MESSAGE FROM THE PRESIDENT OF A.E.A.

To all readers of "La Suda Kruco" I extend my heartiest wishes for a most prosperous year 1923.

We start a new year of activity with the intention of making greater strides than ever before in the history of Esperanto in Australasia.

In the educational communities of New South Wales and Queensland, success has crowned our efforts, and our language has received approval. We are proceeding on the same lines in other States, and shall not cease until Esperanto is a permanent subject in all schools.

This cannot take effect until there is a demand for its services by the people, business organisations and educationalists, and it is our work to convince these people of the suitability of our language.

To this end we intend to push ahead in the formation of new groups, and I appeal to all readers to assist me in this work. Two or three in each centre are sufficient to make a start, and we are ready to do our part.

Our most useful instrument in propaganda and in keeping our members posted in the latest news, and affording opportunities for exercise in the language, is our journal.

This has just been improved, and we hope to still further improve it. Although it is a heavy drain on our financial resources, we are sparing no effort to keep it going. If all the original subscribers would keep their subscriptions renewed, our greatest burden would be removed. We need new subscribers, and your co-operation in sending news items and helpful suggestions.

The Fourth Australian Esperanto Congress will be the great event of the year, and every Esperantist should arrange to be in Sydney at Easter. An excellent holiday is assured, and it will mark another important step in our history.

To sum up, let our aim be to establish Esperanto more firmly by—

1. Forming new groups or joining up existing ones, and creating a demand.
2. By actively supporting our journal and sending at least one new subscription.
3. By making the Congress the greatest yet held in Australia.

If each reader will do his or her part, then we must quickly achieve our objective.

Ĉiam antaŭen! Samideane Via.

—A. R. COHEN.

KRONIKO.

WELLINGTON (Nov - Zelando). S-ro. W. L. Edmanson skribas—Mi daŭrigas mian laboron inter la malfeliĉuloj kaj jam ok trafis la Diplomon kaj aliaj prepariĝas. Tiu laboro amuzas min multe kaj ĝi faras multe da bono al tiuj, kiuj ja bezonas ion intelektan por ilia restariĝo.

MELBURNO (V.) — F-ino, Maud Helm, el Melbourne, fariĝis la nacia direktorino en Aŭstralio de la Internacia Romkatolika Asocio. Ŝi klarigis la celojn de la asocio al interesuloj la 20an de decembro kaj gajnis multajn novajn lernantojn por Esperanta studgrupo, kiun ŝi instruas ĉiun mardon, ĉe Katedrala Halo, strato Brunswick.

Sabaton, la 9an de decembro la Northcote Esperanta Grupo havis feston. La ĉefa ero estis "Mock Marriage," (Ŝerca Edziĝo). Poste sekvis esperanta diologo kaj, fine, danco.

NELACIGEBLA PROPAGANDISTO.

Doktoro Fred. Williams, el Melbourne, antaŭ nelonge vizitis Sudan Tasmanujon, kaj poste, la okcidentan parton de Viktorio.

La Hobarta grupo kontentige progresas kaj havas la valoran helpon de s-ro. Middleborough, loka librovendisto, en kies butikoj oni trovas bonan provizon de Esperantaj libroj.

S-ro. D. Guilbert, el la Landa Departemento, delegito de la U.E.A., kaj, f-ino. Cora Hannaford, estrino de la Eaton Bray Lernejo, en kiun ŝi kondukis kaj kie ŝi nun instruas Esperanton, tre petas, ke Esperantistoj trapasante Hobarton, vizitu ilin.

En Hobarto, New Norfolk kaj ankaŭ en Okcidenta Viktorio, instruistoj, profesuloj, komercistoj kaj kolegiaj knaboj estis avidaj ricevi literaturon, diskuti Esperanton kaj komenci la studadon de la lingvo.

D-ro. Williams dum profesia vizito al Castlemaine, (V.), starigis grupon en tiu progresema urbo. Post nelonge li iros al Sidnejo por kelktempa vizito.

HERE AND THERE.

The European Federation of the Theosophical Society will hold a Congress in Vienna in July next. Esperanto will be one of the official languages. This is the first time such

recognition will have been given to Esperanto at any Theosophical gathering.

The latest news bulletins from the International Labor Office deal with the admission of Hungary to the League of Nations, and the consequent attendance of Hungarian delegates at the Labor Office; classification of emigration figures; conservation of the health of the workers; the first co-operative agricultural society; the opening of the fourth Labor Conference; improvement of labor conditions; Japan and the unemployment problem.

During the Brazilian National Exhibition, Police Constable Jose Agostinho de Macedo will be stationed at the Avenue Rio Branco. He will have a white ribbon and green star and the words "Esperanto" and "Interpreter" on his left arm.

In the largest hall of the Lithuanian University s-ro. P. Madem commenced an Esperanto course on 29th October. The attendance was large, and the new lecturer and his subject were well received.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

La esperantistoj de Melbourne havis la bonegan ideon organizi koncerton por helpi U.E.A. Ĝi estis grandega sukceso de muzika flanko kaj de financa vidpunkto; 400 sv. fr. estis senditaj al Genevo. La organizintoj ricevu niajn korajn gratulojn kaj dankojn.

La Centra Oficejo esprimas per tio ĉi koran dankon al la samideanoj-membroj en Melbourne (Aŭstralio) kiuj sendis per nia ĉefdelegito, S-ro. Ballard, diversajn monhelpojn, kies finsumo estas pli ol 500 Frankoj. Jen ekzemplo de kompreno por la situacio de nia Asocio, rekomendata al ĉiuj bonvolemaj samideanoj.

La supraj citaĵoj el "Esperanto" montras, ke la penoj de la ĉi tieaj anoj tre kontentigis la estraron ĉe Genevo.

La nuna jaro devus doni eĉ pli bonan resultaton. Por decidi pri la manieroj kaj rimedoj la membroj havos sian ĵaran konvenon, merkredon, la 7an de februaro, je la oka vespere, ĉe la Aŭstralia Preĝejo Halo, strato Russell, kiam oni esperas ke ĉiu ano ĉeestos.

ESPERANTO KAJ AMIKECO.

De J. G. Pyke.

La plej granda plezuro en la mondo estas, havi amikojn, kaj tiuj el ni, kiuj estas Esperantistoj, trovas, ke tiu plezuro ne estas malpli granda pro la posedo de esperantistaj amikoj, kies patrolingvo estas malsama, ol la nia. Multe da belaj pensoj oni skribis kaj kantis pri la amikeco. Elbert Hubbard diras:

"La penso, havi amikojn kaj esti amiko, venas al ni, kiel plej alta beno: La amikeco estas preskaŭ ia religio—konfesi per sia vivado, ke, por havi amikojn oni devas mem esti amiko, tio estas religio." Kiam oni ricevas leteron kun la varmaj vortoj de amikeco esprimataj en la "kara lingvo," tio efikas, kiel inspiro; oni sentas, ke oni atingis la fundoŝtonon, sur kiu staras ĉia religio. Tiu ĉi lingvo estas la lingvo de la plej bona parto de ni. Ĝi estas la ora fadeno, kiu ligas la korojn de la tuta mondo.

Amikeco! Mistera cemento de l' animo, dolĉiganto de la vivo, kaj luto de l' socio.

Jes, de socio, kiu estas tiel vasta, kiel la mondo.

Nenio estas tiel higiena, kiel la amikeco. Niaj amikoj vidas nur la bonan en ni, kaj per tio mem ili eltiras el ni la plej bonan. Ni povas esti sinceraj en niaj leteroj; ni povas "pensi voĉe." Ni povas kuraĝi pli en la fratolingvo, ol en la patrolingvo, kiel ajn paradoksa ŝajnas tiu aserto. La leganto eble memoras la versojn de Oliver Wendell Holmes:

La lingvo havas du vualojn, kaj ŝirmate sub iliaj faldoj ni kuraĝas esti . . . ni mem, kaj ne l' alia memo, kiu kape signas, ridetas kaj babilas nianome; unu, la preĝo, donas plenliberon al la lango diranta al ĉielo niajn plendojn, pekojn; l' alia, poezi', per brila reto kovras parolon nian nudan, al ĝi kuraĝon donas.

Se la bonkora Amerikano nur vivus en nia tempo, li povus aldoni, ke oni povas kuraĝi en alia lingvo. Estas gloro kaj ravo, povi elverŝi la amon, kiun ni sentas, kaj scii, ke ni havas volontan aŭskultanton, dank' al iu lerninta la dek ses simplajn regulojn de la Zamenhofa lingvo. Oni povas

sugesti, ke ĉio ĉi odoras mankon de amo al nia patrolingvo kaj mankon de patriotismo. Sed mankas nek unu, nek la alia; ĉar mi certas, ke miaj malproksimaj korespondantoj dirus al vi, ke ili konkludas, ke la plej bona afero en la mondo estas, deveni de fortika Brita raso kaj loĝi en Aŭstralio.

Mia Germana korespondanto skribas al mi, ke li verkis artikolon pri Aŭstralio per la informoj kaj fotografaĵoj, kiujn mi sendis al li. Bohema fraŭlino serĉadis en la librejoj de Praha tradukojn de la romanoj de "Georgo Eliot," ĉar mi sendis al ŝi esperantan artikolon pri nia glora angla aŭtorino. Rusa knabeto nun interesas sin pri la birdoj kaj bestoj de Aŭstralio, pro bildo de ridanta birdo "kukaburo" sur Kristnaska karto sendita de mi. Same ni povas per la patriotismo de niaj korespondantoj koni la gloron de ilia literaturo, la belecon de iliaj arbaroj kaj la grandiozon de iliaj historiaj urboj—kaj eble tio ne estas malbonefika je Aŭstraliano nekapabla pensi pri io ekster sia malvasta hejmvilaĝo!

Kaj tio certe devigas nin koni nian propran landon. Tiaj amikoj faras tiel multajn demandojn pri tiu ĉi por ili nekonata lando, ke oni devas akiri multajn informojn pri sia lando por ilin respondi.

Melburno, 1911.

Trad: A. Delsudo.

[Ĉi tiu artikolo aperis, anglalingve, en "La Suda Kruco," de Februaro, 1921. "Esperanto," recenzante la gazeton, diris, ke la malgranda traktato indas tradukon. Komparo de la traduko kun la originalo estos instruplena por studentoj. Red.]

AMBASADORO IŜUIN.

PROPAGANDOS ESPERANTON.

La 14-an de Apr. S-ro K. Janagida vizitis la Informan Departementon de la Ministerio de alilandaj aferoj kaj tre efike propagandis Esperanton al ĝia estraro. Ambasadoro H. Iŝuin, direktoro, tute konvinkita pri la neceseco de Esperanto, proponis aĉeti je sia kosto Esperantajn librojn kaj disdoni ilin al la oficistoj de la Ministerio.

KAMPFESTO ĈE DARLING. LA PARTOPRENINTOJ ĈE LA DOMO DE S-RO. COHEN.

La Melburna sekcio de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, laŭ afabla invito de s-ro. A. R. Cohen, prezidanto de la asocio, vizitis lin en lia hejmo ĉe Darling, je la 16a de decembro, antaŭ ol disiĝi por la Kristnaska libertempo. Post interesa marŝado sur la malaltaj montetoj oni submetis sin al la fotografisto, (s-ro E. J. Cox), kaj tiam sin sidis ĉe la tablo. Inter la gaja babilado oni ne forgesis fari justaĵon al la bongustaĵoj. Vespere

nelacigeblaj gesamideanoj ludis ŝaradojn, kaj ĉarmis la ceterajn per belaj arioj sur la gitaro kaj la mandolino. Dum la vespero estis vendo de malgrandaj donacoj por helpi la kazon de "La Suda Kruco." Ĉiu penis pagi pli ol sia najbaro, do "La Suda Kruco" gajnis kvar funtojn. La ĉeestantojn tre ĝuis sin kaj kore dankis s-ron. Cohen kaj liajn parencojn por lia bonvolo al la granda nombro de Esperantistoj, kiuj partoprenis ĉi tiun memorindan ekskurson.



(Por la kliso ni esprimas niajn dankojn al "The Leader," Melbourne).

Malantaŭa vico:—S-roj. H. Byatt, C. W. Ballard, Percy T. B. Hudson, Parker, A. R. Cohen, A. Klein, Traynor, Meirs kaj Predl.

Meza vico:—F-inoj. Gardiner, V. Irwin, Byatt, L. Irwin, s-ino. Bigelow, f-inoj. Walford, Lacey kaj Maud Helm.

Antaŭa vico:—F-inoj. Harris, Helm, A. M. Hopton, L. W. Saw, s-inoj. M. Purnell, Byatt kaj Klein. La knabineto estas nevinino de f-inoj Helm kaj la knabo filo de s-ino. Bigelow.

MALMOLAJ LIGNOSPECOJ KAJ SANO.

Tio kion la spertulo prenas al si hodiaŭ, la klera publiko alprenos morgaŭ, sed iam la tempo estas longa, ĉar la klerigado de la publiko ofte estas malrapida kaj la plej sendifektaj ideoj ne ĉiam estas rapide asimilitaj. Ĉi tion oni povus plene ilustrati per la sperto gajnita el multaj stadioj de la propaganda laboro per kiu la aŭstralia publiko kondukigis ekkoni la bonajn kvalitojn de produktoj de aŭstralia tero, kiujn, pro ilia abundeco oni antaŭe pensis utilaj nur por malsupera uzado. Rilate al tio, nenio estas pli vera, ol pri aŭstraliaj lignospecoj. Eĉ inter tiuj, kiuj plej rapide perceptis la meriton kaj plej frue etendis la uzon de tiuj lignospecoj, la profito de ties uzado unue ne estis plene rimarkata. Kelkokaze interesigintaj, sed neantaŭjugantaj, alilandaj observantoj malfermis niajn okulojn al meritoj kaj valoroj de niaj lignospecoj, kiujn ni antaŭe ne rimarkis, aŭ nur neperfekte taksis. Kompreneble oni unue altaksis tiujn konstruajn kvalitojn de forteco kaj sendanĝereco kaj flanke de malaltgrada flamiĝebleco, kiuj metas la aŭstraliajn malmolajn lignospecojn en apartan klason, kaj vere, rilate al tio, oni apenaŭ povas tro laŭdi ilin. Sed nek la konstrua spertulo, nek la lertulo pri la klasigado de materialoj laŭ la vidpunkto de ilia efiko por pliigi aŭ malpliigi la riskon de fajro ampleksas la vidpunktojn laŭ kiu niaj aŭstraliaj malmolaj lignospecoj povas esti studataj kaj taksataj. La sperta kaj konsiderema domomastrino, studente planksurfacojn, rimarkas kvalitojn de konstanta ŝparado, belajn kaj daŭre aspektajn. La scienca praktikanto de la arto de protekta medicino, responda pri elekto de la plej bona materialo por hospitala planko trovis tiun materialon en la aŭstraliaj malmolaj lignospecoj. Molaj lignospecoj, penetreblaj kaj efektive nepurigeblaj estas malakceptataj. Kvankam la plej severaj provoj neĉese aplikiĝas en hospitaloj, ĉar tie la danĝero venanta el la uzo de malhigienaj materialoj estus maksimumo, estas apenaŭ malpli necese, ke privataj domoj estu simile protektataj. En antaŭnelonga sana krucmilito en Usono, la higienaj utiloj de plankoj el malmolaj lignospecoj kaj la protekto kiun ili donas kontraŭ la dissemiĝo de epidemioj, estis precipe

emfazigataj. En unu el la libretoj eldonitaj estas dirite, "La mirinda progreso farita en la lastatempaj jaroj de fabrikantoj de malmollignaj plankoj, kaj iliaj persistaj penoj por sciigi al la publiko la meritojn, kaj dezirindecon de plankoj el malmolaj lignospecoj por domoj, kiel ankaŭ por industriaj, komercaj kaj publikaj konstruaĵoj, rezultis en simila mirinda progreso en la uzo de malmollignaj plankoj en la moderna hejmo. Virinoj favoras malmollignajn plankojn, ĉar ili scias kiom ili plibeligas la aspekton de ĉambro je modera kosto, kaj ili estas pli higienaj, pli daŭraj kaj pli facile prizorgataj. La ideo pri moderna malmolligna planko fariĝis tiel ĝenerala, ke hejmon sen ĝi oni ne plu konsideras laŭmoda." La koston oni ne povas ne rimarki. Estas vere, ke la unua kosto de bona malmolligna planko estas iom pli granda ol tio de pina ligno, sed la unua kosto de malmolligna planko estas ankaŭ la fina kosto, ĉar ĝi daŭros tiel longe kiel bone konstruita domo, sed fakte, pina planko bezonas renovigon post kompare mallongaj intertempoj. Malmolligna planko, kun ĝia pli bela aspekto, estas ŝpariga pro la nenecese kovri ĝin de muro al muro per superplanko de multekosta tapiŝo. Kelke da bonguste elektitaj tapiŝetoj, (facile foroveblaj kaj purigeblaj de polvo kiam ajn estas dezirate), kontrastaj la densan tekson de la planko, donos efekton senkompare pli kontentigan. (V. B. Trapp, en "The Argus," Melbourne. Tradukis G. D. Kvarnstrom.)

LITOVUJO ALPRENAS NOVAN, DECIMALAN MONSISTEMON.

De la 1 de oktobro estas enkondukita en Litovujo nova valuto. Ĝia monunuo nomiĝas litas, (esperante: lido), kaj valoras dekonon da amerika dolaro. Kiel tiu lasta, lido estas dividata je 100 cendoj. Pro tio litova cendo valoras dekonon da amerika cendo. Komence aperis provizoraj lidaj banknotoj presitaj en Berlino, nun jam estas alveninta la unua sendaĵo da efektivaj lidoj, presitaj en Ĉeĥoslovakujo. La loĝantaro de Litovujo akceptis la aperon de lidoj tre konfideme kaj amase komencis ŝanĝadi je lidoj ne sole germanajn markojn, sed ankaŭ amerikajn dolarojn, kaj eĉ orajn rusajn rublojn. Ĉiuj bankoj estas pleplenaj

da publiko, atendanta laŭvice la ŝanĝon de mono. Do la kurso de lido estas dependanta ne de germanaj markoj, sed de amerikaj dolaroj. Hodiaŭ, kiám mi skribas, la kurso de 1 lido egalas al 450 germanaj markoj. Dank' al la enkonduko de sia nova valuto Litovujo jam ne timas la senvalorigon de germanaj markoj. Estas nur bedaŭrinde, ke la lido ne estis enkondukita pli frue.

(el Litova Stelo.)

AUSTRALIAN WOMAN DELEGATE TO LEAGUE OF NATIONS STUDIES ESPERANTO.

The following extract from a letter to a Melbourne Esperantist will be read with interest:—

"As I had made a secret resolve to learn Esperanto as soon as I returned home, your gift of the text-book was a most timely one. Thank you very much for it; it was most kind of you. . . . It was impossible to dwell any longer on Esperanto in my speech, but I should have liked to have had a talk to you afterwards.

"I may pass through Melbourne on my way to Tasmania before long, and I will call on you to report progress. Who knows? we may be able to have a conversation in Esperanto.—Yours sincerely,

"MARGUERITE DALE."

(Should Mrs. Dale revisit the League she will be amply recompensed for the time spent in learning Esperanto, as the General Secretariat being largely composed of expert Esperantists, she will have much greater facility for gaining information on any subject desired. Red.)

XVa INTERNACIA ESPERANTO- KONGRESO EN NURNBERG,

Aŭgusto 1923.

ALVOKO AL ĈIULANDAJ FRAMASONOJ.

Laŭ la decido de la XIVa Kongreso en Helsinko, la proksima Kongreso okazos en Nurnberg (Germanujo). Ni ĝoju pri tio, ĉar en tiu urbo ekzistas malnova kaj tre agema Loĝio, en kies Templo ni sendube povos dece kunveni. Se ni konsideras ke nia lasta Templo-laboro okazis jam en Bern 1913, ni devas tre efike kaj ĉie labori por efek-

tivigi en Nurnberg grandan kaj gravan kunsidon de U. F. L., pli brilan ankoraŭ ol la kunsidoj en Bern, Antverp, Dresden, Cambridge kaj Geneva. La Esperanto-movado kreskas ĉiutage, la Internacia Popola-Ligo Ĥaris gravan decidon pri ĝia alprenado, kaj ni, la granda internacia frataro, devas nepre fari ĉion laŭ niaj fortoj por subteni tiun movadon kaj por utiligi ĝin en la korespondado kun niaj FF. tutmondaj. Sed la kunveno en Nurnberg havu ankoraŭ alian gravan celon, al kiu multaj eĉ ne pensas. En 1924 okazos en Bruselo "Internacia Framasona Kongreso" aŭ Kunvento. Se ni kunvenos multnombre en Nurnberg, ni povas jam tie persone konatiĝi, ni povas eĉ jam pripensi la plej bonan vojon por la alproksimiĝo de la franca-germana Framasonaro, sen kies interkomprenigado daŭra paco ŝajnas al mi neebla. Jam nun mi faris la necesajn paŝojn ĉe la Loĝio, estas nun al vi komenci tuj viglan propagandon inter viaj FF. en ĉiuj landoj. Havu la bonecon anonci vin al mi por ke la komitato en preparo povu je sufiĉe frua tempo aranĝi la aferon en plej bona maniero. Mi uzas la okazon peti niajn diverslandajn membrojn, ke ili sendu al mi kiel eble plej baldaŭ ilian jaran-kotizon;* por la aranĝo de la afero ni bezonas monon; presajoj, leter-afrankoj ktp, kostas nuntempe en Germanujo multe da mono, kaj niaj FF. en bonvalutaj landoj helpu al ni laŭ iliaj fortoj. Despli ili ĝuos ilian restadon en Nurnberg kaj la partoprenon al nia Templo—kaj aliaj frataj kunvenoj.

Mi ankaŭ rekomendas al ili la aĉetadon de la bonega esperanta broŝuro: "La libereco de konscienco kaj la tutmonda Framasonaro" havebla je nur 25 cent. de S-ro F. Schoofs, kl. Beerstraat 45, Antwerpen (Belgio).

Estas necese, ke Esperanto faru baldaŭ oficiala lingvo uzota en niaj estontaj internaciaj framasonaj Kongresoj. Tio estas ebla se ni aranĝos paroladojn en ĉiuj Framasonejoj, sekvotaj de kursoj en nia kara lingvo speciale aranĝitaj por niaj FF., kaj se ni varbos novajn anojn al nia asocio.

Kun kora fratsaluto kaj manpremo

C. Barthel, Sekretario-Kas.,
Frankfurt a. M., Wohlerstrasse 14.

* $\frac{1}{2}$ dolaron, 2,5 frankojn, 2 ŝilingojn kaj 2,7 pezetojn.

FOURTH CONGRESS OF AUSTRAL- ASIAN ESPERANTISTS,

Sydney, Easter, 1923.

SPECIAL APPEAL TO READERS
of the "Suda Kruco" and Esperantists
Generally.

Estimataj samideanoj.

The Congress Committee makes this a special appeal for your active support. As you well know, the successful issue of the Congress depends upon your help; therefore, we hope that you will respond either by becoming a Congress member or by sending a liberal donation. Failing either, we are despatching concert tickets to group secretaries; these can be purchased for 1/3. Thus, you will have a memento of the Fourth, and also help in its financing.

Already our arrangements are well in hand, and we may here state that one of our chief attractions will be a concert as mentioned, featuring Esperanto in speech and song.

By this we intend to again show the public that our language is not a mere artificial jargon, nor a conglomeration of words, but a beautiful, expressive auxiliary speech.

From the Congress we shall acquire much publicity, which will be most beneficial to our movement in Australasia.

Our propaganda days are not yet over; therefore, we must use all our efforts to push ahead our aims of international understanding and good fellowship.

We wish to point out to Esperantists that success depends upon their support. The membership of Congress is:—Sydney, £1/1/-; country, interstate and New Zealand, 10/6. The secretary or treasurer will acknowledge the receipt of your subscriptions or donations. Communicate direct to Secretary, Clissold Parade, Campsie, N.S.W.

For the Committee,

L. E. FOSTO.

F. V. TAYLOR.

THE CO-OPERATIVE UNION TEACHES ESPERANTO.

The following letter appeared in the "Co-operative News," Manchester, England, on October 7th, 1922.—

"Sir,—I should like to express my gratification at the announcement that Esperanto is now included in the

subjects taught under the auspices of the Co-operative Union. I have been urging it for years, being convinced that the need for an international language should be officially recognised by our movement. I am also certain that Esperanto answers that purpose in every respect. It is easy to learn, failure being impossible for average individuals who are willing to devote a little time daily to the task of acquiring it—a task which is a delightful form of recreation. I am also convinced that Esperanto will be one of the most successful subjects in the list of classes announced by the Co-operative Union.—Yours, etc.,

"EDWIN ELLIOTT."

POST LA LIGO.

Ĉe la ligo de Nacioj ni atingis la maksimumon eblan per nia laboro. Esperanto ricevis oficialan konstaton pri vivanteco kaj taŭgeco. Plie la diskutoj remetis Esperanton antaŭ la publika opinio de la tuta mondo post la dorma silento de la milito, kio estas eble la plej grava. Ĉu tio estas vere "nenio nova," kiel skribis urĝemulo? Jam dek mil ekzempleroj de la Liga raporto estis tuj mendataj nur en franca kaj angla lingvoj. Itala kaj germana eldonoj preŝiĝas. Ĉeĥa prepariĝas. Antaŭ Kristnasko la raporto devus esti aperinta en almenaŭ dekdu lingvoj se niaj naciaj societoj vere ekzistas.

Nun, oni demandas, kiam la Ligo reprenos la diskuton en plena kunsido kaj alvenos al decido definitiva? Nia respondo estas klara: ni tion klopodos kiam niaj francaj kaj britaj samideanoj estos mem konvinkintaj sian propran registaron kaj kiam niaj brazilaj amikoj estos sukcesintaj, ne nur ke ilia registaro honoru Esperanton per stratnomoj, subvencioj kaj dekretoj, sed ankaŭ tute simple per pozitiva ordono al siaj reprezentantoj ĉe la Ligo.

En nia julia numero ni avertis kontraŭ fantaziaj iluzioj kaj konigis la kontraŭbatalon de potenca registaro. Tie ĉi ni povas fari multon, sed ne ĉion. Genevo ne estas miraklejo. UEA ne estas Dio eĉ ne riĉulo. Malgraŭ nia manko de mono kaj forto, ni povas senlace informi, sugesti, interesi, sed ne devigi. La esperantistoj devus kompreni tion: la

plej belaj argumentoj nenion povas kontraŭ ordonoj skribitaj el eksterlandaj ministrejoj. Sur tiuj ministrejoj povas influj nur la naciaj societoj. Ĝis kiam la naciaj societoj estos farintaj sian tutan devon kaj estos nin informintaj pri tio, ni ne riskos eĉ unu pluan paŝeton ĉe la Ligo de Nacioj. Kiom da ili eĉ tute ne vizitis sian propran registaron? Kiom da ili eĉ nenion faris por ĝin interesi?

Tion diris al mi la registaraj delegitoj mem. Kelkaj societoj agis. Ekzemple la nederlanda sukcesis, ke ĝia registaro voĉdonu favore, eĉ kvankam silente. Al ĉiuj agintaj ni kore dankas. Al ĉiuj ceteraj ni lastfoje alvokas: komprenu vian responecon. Armilon vi nun havas en la mano: la raporton. Uzu ĝin kaj informu nin pri viaj klopodoj. Nur per ĉies kunhelpo ni venkos. Unu sola sindeteno povas detrui la laboron de ĉiuj ceteraj. Ni ne permesu tion. Ni gajnis duan sukceson ĉe la Ligo. Ni nun celu la trian.

(Edmond Privat, en "Esperanto.")

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, okt.; **Bulletin de S. Francaise P.E.**, nov.; **Brazila Esperantisto**, jul-sep.; **Esperanto Triumfonta**, n-roj 107-112; (Numero 112 havas duan folion plenan de informoj pri la kongresa urbo, Nurnberg, kaj ankaŭ la unuan numeron de la "Revuo" monata aldono al "Esp. Triumfonta". La enhavo estas "Nurnberg, la lulilo de la Esperanto movado, kun portreto de Leopold Einstein, Poemo al la rememoro de Einstein, Nurnberga Legendo kaj Nurnberga Somervespero). **Espero Teozofia**, sep.-okt.; **Esperanto Finnlando**, aug.-sep., okt.; **Esperanto-Praktiko**, okt.; **France Esperanto**, nov.; **Konkordo**, jul.-sep.; **Katolika Mondo**, n-roj 3-4; **Litova Stelo**, sep.-okt.; **La Progreso**, okt.; **Literatura Mondo**, Andrassy ut, 81, Budapest VI, 10/- jare, N-ro. 1, okt.; **La Interligilo**, Monata organo de la unueca poŝta federacio de Francujo, N-ro. 1, okt.; (adreso, 54 rue Custine, Paris). **La Semisto** jul.-sep.; **La Revuo Orienta**, okt.; **La Verda Ombro**, okt.; **La Nova Epoko**, okt.; **La Unuigita Tuthomaro**, sep.-okt.; **La Policisto**, okt.; **La Espero**, okt.;

L'Esperanto, okt.; **Pola Esperantisto**, nov.; **Sennacieca Revuo**, okt., nov.; (eldonkvanto 6000 ekzempleroj!); **Verda Utopio**, okt.

The Australian Peace Alliance (Aŭstralia Ligo Porpaca) proponas, ke post intertraktado per internaciaj konferencoj okazu en la ŝtatoj samtempaj referendumoj, je kiuj la viroj kaj virinoj respondos al la jena demando: "Ĉu vi konsentas, ke ĉi tiu respubliko (aŭ regno) sin senarmigu tute, kondiĉe ke la aliaj ŝtatoj faros same?"—Detaloj haveblaj el F-ino. Moore, 40 Evelina Rd., Toorak, Vic.

LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

La raporto por la pasinta jaro ĵus aperis. Interesa ero estas la sciigo, ke Kolonelo Robinson finis la tradukon de la plena teksto de la famkonata romano de Defoe, "Robinson Crusoe," kiun li komencis verki kune kun la nun mortinta s-ro. Johano Wilson, el Leek. Oni faras aranĝojn por la eldono de ĉi tiu kaj alia grava traduko de la Eklezia Esperantista Ligo.

TO EACH READER:

Please made an endeavour to get one new subscriber.

Use Form below.

ORDER FORM.

To the Secretary,
Esperanto Journal Committee,
Box 1367, Elizabeth St. P.O.,
Melbourne.

Please send me "La Suda Kruc" for 12 months, post free, commencing with.....issue, for which I enclose the sum of 4/6.

Name.....

Address.....

Books! Books! Books!

JUST what you have been waiting for. £50 worth of Books on hand at reasonable prices. Make your Christmas Present a Book, and let it be Esperanto Literature. The latest shipment includes:—

La Karavano, 2/-.
La Vendetta, 2/2.
Tra la Mondo, Vol I., 1/3.
Vol. II., 2/-.
Complete, 3/-.
Tatterley, 1/3.
La Faraono, 9/6; Comp., 3 Vol.
Batalo de la Vivo, 1/3.
Struvelpetro, 2/3.
German Text Books, 2/-.
German Dictionaries, 2/3.
Pro Kio, 1/9.
Kantistino, 1/3.
Mirinda Amo, 3/9.
Dua Ekzercaro, 9d.
Tri Angloj Alilande, 1/3.

Fundo de la Mizero, 1/6.
Stranga Heredaĵo, 2/2.
La Nigra Galero, 1/3.
Hermano kaj Doroteo, 1/3.
Kvin Noveloj, 2/-.
La mirinda historio de Petro Schlemihl, 1/3.
Nuntempaj Rakontoj, 1/3.
Dictionaries—Fulcher and Long, 7/6
Edinburgh, 2/-.
Milledge, /6.
Rhodes, 3/9.
Esperanto Fountain Pen, 7/6.
Esperanto Pencil Giit, 9/6, nickel,
4/-.

ORDER NOW!

Send for Price List to Librarian,

Australian Esperanto Association

BOX 731, P.O. ELIZABETH STREET,
MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

“THE RAINBOW,” Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

The House of Stead

STEAD'S REVIEW now appears in its improved new form with highly finished paper, perfectly printed, and a three-colour cover that will please the eye. We aim at continual improvement for it is to be a production worthy of presenting to Australians. Its price will remain the same.

Announcements.

During this year we will produce several New Magazines. Every one will be expertly cared for from the literary standpoint, and we are also determined to produce all our Magazines in high-grade form—good paper, good printing, and fine illustrations.

Fiction Magazine (Monthly).

Elevating and entertaining stories, good pictures and humorous drawings. Anecdotes by British, Australian and American Authors. Probable Price 9d.

Woman's Journal (Monthly).

All for Australian women. Matter will be treated by experts, and Magazine will be a production worth having and well worthy of Australians. It will be beautifully illustrated and will probably sell at 1/-

Mountain and Seaside (Monthly).

For those contemplating a holiday, this Magazine will be guide, philosopher, and friend. Interesting places throughout Victoria will be written up and illustrated, and full information given. Its pages will be strewn with good stories, sketches and humorous drawings.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 33. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Marto, 1923.

THE SYDNEY CONGRESS.

Before the next issue of the "Suda Kruco" appears the Congress will have taken place. The programme, as set out in the February issue, will be adhered to as closely as possible, though it is not unlikely that minor variations will be necessary. The Congress Committee will issue a Souvenir Programme. This will be presented to subscribers immediately on their arrival in Sydney. Groups in each State will be advised of the location of the "akceptejo."

Copies of resolutions for submission to the Congress should be sent to the Secretary at once.

Up to date 52 members' cards have been issued, and it is expected that many more New South Wales samideanoj will secure membership during the next week or two.

Why do we "congress"? Each visitor should ask him or her self this question. Consideration will indicate some suggestion that could be made to the Congress, the adoption of which would enlarge our activities, extend the use of Esperanto in business and commercial circles, add arguments in favour of its being taught in our State schools and strengthen the position of the "Suda Kruco," which should be made the authoritative and informative publication in all matters pertaining to Esperanto that its founders intended that it should be.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

The annual meeting was held on 1st February, when the following officers were elected: — President, Frank V. Taylor; vice-presidents, Miss Corrigan and Edgar A. Pryke; secretary, L. E. Fosto; treasurer, Miss Jessie Joliffe; librarian, Eric Joliffe.

The annual report for 1923 is as follows:—

"Another twelve months have departed, twelve months during which many important victories were gained abroad and much propaganda work done at home. Our labours are here in New South Wales; therefore, we will deal with local affairs only.

Esperantists cannot grumble at the publicity received during the past year, as articles about Esperanto appeared in the following publications: "Herald," "Telegraph," "Daily Mail," "Sun," "News," "Australasian Manufacturer," "Education," "Highway," "Sunday News," "Sunday Sun," "Sydney Mail," "World's News," "Sparks Fortnightly," "Co-Operative News," "Australasian Draper," "Standard," "Police News," "Bulletin," "Postal News," "Cumberland Times," and the "Alert."

Our chief item of interest—apart from the Congress—was the appointment of a committee by the Teachers' Federation, to inquire into the suitability of an international language.

Although this question has been settled time and again in various countries, teachers of this State, although having heard of Esperanto, were not in a position to discuss the merits or demerits of such a language.

After obtaining much evidence, both written and oral, the committee unhesitatingly approved of Esperanto, and at a later date the report was presented to the Minister of Education for his approval, with the result that the Minister did not entertain the proposal of the committee.

This setback was not wholly unexpected by Esperantists, although something tangible was expected, especially after the findings of the committee, who were men holding prominent positions in the schools of this State.

It would be interesting to know what the Teachers' Federation intends to do with the matter. Are they going to let the matter drop, or are they going to take the matter in hand and press for the adoption of Esperanto in the school curriculum?

Another very important matter of interest to Esperantists was the selection of Sydney as the meeting place for the Fourth Australasian Esperanto Congress during Easter of 1923.

Immediately after the selection a committee was elected to take in hand the organising of the Congress, and, judging by results to date, the committee are in hopes that the Fourth will be a huge success.

Another matter one must refer to is the loss sustained by this group through our worthy president having, for business reasons, to sever his connection with us. We hope his withdrawal will be but temporary.

Also, we have to thank Mr. P. J. Bennett for his active support, as it was chiefly by his earnest endeavours that Esperanto was brought before the Teachers' Federation and the Minister of Education.

During the year our interchange of correspondence totalled in the vicinity of six hundred letters, so that our movement has plenty of life—too much, in fact, for some of our friends, especially those who are always decrying the progress of Esperanto.

In conclusion, the committee wish to thank members and friends for

their much-needed support, which, it is hoped, will be as freely given during the coming year. They also trust that members will do their very best to make the coming Congress worthy of our movement and help the committee in every manner possible.

LA LOKOMOBILISTA BANDO ("TRACTOR SQUAD").

Detaloj pri la klopodado de la "Lokomobilista Bando" ("Tractor Squad"), organizita de la Societo de Amikoj de Sovjeta Rusujo en Usono, aperas en la **Rusa Aldono de Industriaj kaj Laboraj Informoj**, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo de la Ligo de Nacioj.

Laŭ informo en **Economicheskaja Zhizn** (Ekonomia Vivo), Sovjeta gazeto, la "bando" konsistas el 20 homoj provizitaj por 21 agrikulturaj lokomobiloj kaj kompletaj agrikulturaj maŝinaro kaj ilaro. Ili alvenis en Rusujo lastan somermezon, kaj estis senditaj al la Guvernio Perm, kie oni asignis al ili teron.

Ĉe alveno tie je komenco de Julio, ili tuj kunmetis ilian maŝinaron kaj faris loĝtaŭgaj la asignitajn domojn. La 24-an de Julio sep lokomobiloj funkciis sur la tero, kiu estis senkultura dum multaj jaroj. La 15-an de Aŭgusto dekkvin lokomobiloj funkciis, kaj la 25-an de Septembro la nombro estis deknaŭ. Oni plugis teron ne nur en la spaco, asignita al la bando, sed ankaŭ en la bienoj de lokaj agrikulturaj societoj. Multe da tero estis ankaŭ plugita por individuaj kamparanoj, kiuj pagis tiun servon per ligno-provizo kaj konstrua laboro.

"Estas sendube, diras **Economicheskaja Zhizn**, ke la energio kaj iniciatemo de la Usonoj faras multe por forigi la apation de la Rusoj kiuj interrilatiĝas kun ili, kaj estas speciale laŭ tiu ĉi vidpunkto ke la Sovjetaj aŭtoritatoj favoras la klopodojn de la Usonoj kaj laŭeble helpas ilin."

La "**Rusa Aldono**," kiu aperas ĉiusemajne, entenas valorajn informojn pri la situacio en Rusujo, kolektitajn de spertuloj el la ĉefaj Sovjetaj publikigaĵoj, el ĉiuj gravaj gazetoj Eŭropaj kaj Usonaj, kaj el ekstere aperintaj Rusaj eldonaĵoj.

(Informservo de la Internacia Labora oficejo.)

OFFICIAL ESPERANTO PUBLICATIONS.

Some months ago the "Suda Kruco" adversely criticised a publication emanating from the "Centra office." A later one has not found favour with the "American Esperantist." The following is extracted from the December issue:—

"Korekto de la Eraraj Tradukoj en Universala Vortaro—angla parto, 3d. B. E. A., 17 Hart St., London, W. C. 1, England:—is apparently from plates in beautiful handwriting. It is much needed, and should be in the highest degree authoritative, exact, and final; we regret to find it not creditably done. On the first page appear the following misspellings: 'absinth' for 'absinthe;' 'insekt' for 'insect;' 'orach' for 'orache;' 'bark' for 'barque;' 'lazar' for 'bazaar.' Just why the B. E. A. should issue such a work without revision, or why S-roj Rhodes, Millidge, and Ellis (named as kunlaborantoj) permitted their names to be 'rubber-stamped,' as it were, upon the work, we do not know. Do two Akademianoj do all the O.K.-ing at Paris? Perhaps the saving excuse lies in the date (1914) of the report, and we must accept it as a casualty of the war—in any case such publications should not be launched upon the public at this time as official without at least casual proofreading and revision by users of English."

HERE AND THERE.

At the invitation of the Chamber of Commerce, Besancon, France, d-ro. Privat, gave an address, at the Republican Club, on "The Value of Esperanto in Commerce."

The Industrial, Commercial and Agricultural Club, Lyons, is interesting itself in Esperanto. A course of lessons is being given under its auspices.

As a result of d-ro. Privat's tour in France, renewed activity is being evinced in Paris, St. Etienne, and Vienne.

The Dresden Labor Esperanto Group has 16 classes, attended by 600 members.

The "International Medical Review" is devoted solely to translations of notable medical articles from other languages into Esperanto. Medical

men should find in it the best means of keeping in touch with medical advances of the non-English world.

There is a rush to learn Esperanto in Finland. The Helsingfors Group has three classes—two elementary and one advanced. Those learning total 80. The Workers' Groups had applications from 180 would-be students, but could only provide accommodation for 70. In the free institute at Kallio there are 100 Esperanto students, and in the Workers' Esperanto Institute, "Unueco," more than 100 members are learning. Similar activity is shown in the following places:—Hollola, 40; Laihia, 4 classes; Rauma Teachers' Training College officially teaches Esperanto, and issues to each student a certificate as to progress made; Tampere, 57; Turku, 27; Viipuri, 140.

The municipality of Verviers, Belgium, has voted 500 francs to a fund being raised to enable Esperanto to be taught in the local schools.

An important demonstration of Esperanto has taken place at Timișoara, Roumania, comprising the examination of 50 students, presentation in Esperanto of playlets by Baghi and Marie Hankel, and an appreciation of Esperanto by School Inspector Burain.

"Literatura Mondo" is a large, luxuriously printed, purely literary magazine with art illustrations. Among the many noteworthy articles in the first issue is an essay on Esperanto poetry by Kalocsay, suggesting recourse to assonance in poetry to make up for the limited wordstock of Esperanto.

The Cremation Association of America has lately published a pamphlet of 16 pages in Esperanto, entitled "Kremacio kontraŭ Enterigado." It is a translation by Dr. Tobias Sigel of a speech by Dr. Hugo Erichson.

LABORISTA PARTIO FAVORA AL ESPERANTO.

Post kvartaga konferenco en julio lasta, la Nov-Zelanda Laborista Partio eldonis novan regularon, kiu indikas la leĝsanojn kiujn la organizo celas. Sub la rubriko, "Edukado," oni legas jene: "La universala lingvo, Esperanto, devas esti instruata en ĉiuj ŝtataj lernejoj."

MALPRUDENTULETO.

Traduko el litova lingvo.

Unufoje patro havis fileton, kiun ĉiuj pro ia kaŭzo, nomadis malprudentuleto. Same ankaŭ la familianoj komencis lin nomi.

Foje la patro sendis la fileton al avineto, sia patrineto, por gastigi. Kiam li revenis, la patro demandas:

—Malprudentuleto, kion donis al vi la avineto?

—Kion ŝi donis?! Kudrileton ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la kudrileton?

—Veturis homoj sur la vojo kun plena veturilo da fojno, mi enigis en la fojnon la kudrileton, poste me neniel povis ĝin trovi.

—Vi vidas, fileto,—diris la patro:—la kudrileton estis necese enigi en la ĉapeton, tiam ĝi ne estus malaperinta.

—Bone, patreto, aliffoje mi scios.

La venontan tagon la patro sendas la fileton al la avineto; kiam li revenis, la patro demandas:

—Malprudentuleto, kion donis al ci la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Hundeton ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la hundeton?

—Kiel vi ordonis, tiel mi faris: mi enmetis ĝin en la ĉapeton, kaj ĝi mortis por soifo.

—Vi vidas, fileto.—diris la patro:—hundeton estis necese ligi per rimeneto kaj kondukante voki: ciu, ciu, ciu! ciu, ciu, ciu!...

—Bone, patreto, aliffoje mi scios.

Kaj denove li iris al la avineto. La revenintan demandas la patro:

—Malprudentuleto, kion donis al vi la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Grandan pecon da lardo ŝi donis al mi.

—Kien vi metis la lardon?

—Kiel vi ordonis, tiel mi faris: ligis mi per rimeneto kaj tirante ĝin vokis: ciu, ciu, ciu! ciu, ciu, ciu!... Ekaŭdis hundoj de vilaĝo, are ekatakis min, kaj formaniĝis la lardon.

—Vi vidas, fileto,—diris la patro:—la lardon estis necese distranĉi, distranĉitan lardon enmeti en saketon kaj surmetinte saketon sur la ŝultroj alporti.

—Bone, patreto, aliffoje mi scios.

Ankoraŭ sendas la patro sian filon al la avineto kaj revenintan, demandas.

—Malprudentuleto, kion donis la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Boveton ŝi donis.

—Kien metis vi la boveton?

—Kien vi ordonis, tiel mi faris: detranĉis piedojn, kapon, fine ĉion distranĉis, enmetis en saketon kaj alportis.

—Vi vidas, fileto, la boveton estis necese ligi per ŝnuro, konduki en stalon kaj doni al ĝi fojnon.

—Bone, patreto, aliffoje mi certe scios.

Iras la filo al avineto. Kiam li estis reveninta, tiam la patro ekdemandis.

—Malprudentuleto, kion donis la avineto?

—Kion ŝi donis?!... Katrineton ŝi sendis kun mi.

—Kie estas Katrineto?

—Mi faris, kiel vi ordonis: aligis ŝin per ŝnuro kondukis en stalon kaj donis la fojnon. Mi ĉion faris, kiel vi diris.

La patro tre koleriĝis kaj treege mallaŭdis la malprudentuleton, Katrineton enkondukis en la domon kaj donis al ŝi panon kun mielo.

De tiu tempo la patro neniam sendis la malprudentuleton al la avineto por gastigi.—J. Vilutis, en "Litova Stelo."

KION RAKONTAS EGIPTAJ MUMIOJ.

Estinta lernanto de Pasteur kaj Meĉnikov, scienculo Ruffer antaŭ nelonge publikigis verkon "Studoj pri malnovegipta patologio," la scienco post longa studado de mumioj argumentas, ke egiptoj antaŭ 2000 jaroj konis bone: malarion, morbilon, tifon kaj reŭmatismen, pri kiuj modernaj kuracistoj opinias, ke ili estas rezultato de ŝanĝitaj vivkondiĉoj, klimato, kulturo k.t.p. Ŝajnas, ke egiptoj konis nek alkoholon kaj certe nek tabakon, kiuj estas tiel dangeŝaj por homa vivo. Krom tio trovis Ruffer ankaŭ dentojn, kiuj havis plombojn. Ankaŭ multajn okulajn malsanojn kaj tiujn de haŭto ili sukcese kuracis. — El "Marto" oktobro.

— En la "Aŭtuna Salono" (arta ekspozicio) en "Grand Palais," en Paris, altiras la atenton rimarkinda verko de nia talentplena sam. D.-Alf. Agache: "Park-tombejo." Alia sam, F-ino Meno, famekonata modistino, ekspozis originalajn ĉapelojn kaj kompletigajn vestojn.

PERSA DEKLARO PRI ESPERANTO.

Ĉar estis la persa delegitaro, kiu plej energie defendis Esperanton dum la ĵus finiĝinta kunveno de la L. d. N., redaktisto de la Telegrafa Agentejo de la Svisa Gazetaro informiĝis pri la kaŭzo. Jen, kion unu el la delegitoj, la Emiro Zoka-ed-Dowleh, ministro en Bern, respondis:

"Ni estas feliĉaj, ke la Intelektala Komisiono de la L. d. N. devas nun ekzameni la demandon tiel gravan de internacia helpla lingvo. Por la nacioj de Azio, niaj kolegoj de Ĉinujo kaj Japanujo jam diris al la Komisiono, ke la devastigo de lingvo praktika kaj facila por la interkomunikado, kiel Esperanto, estas urĝa neceseco. Oriento kaj Okcidento estas fremdaj inter si, kaj oni devas fari ĉion por alproksimigi ne nur la diplomatojn kaj intelektulojn, sed ankaŭ la popolojn mem, kiuj ne ĉiam havas la rimedojn por lerni tri aŭ kvar fremdajn lingvojn.

La Ministerio por Publika Instruado en Persio ankaŭ tre serioze studas la Esperantan demandon en ŝtata komisiono, kaj ni estos feliĉaj, se la Intelektala Komisiono provos tre baldaŭ doni sian opinion. Jam pli multaj landoj enkondukis Esperanton en lernejojn, ĉu deĵe ĉu laŭvole. Por akceladi tiujn decidojn grandskale, certa reciprokeco estas necesa. Jen, kial tiu problemo interesas la Ligon de Nacioj.

The success of every undertaking depends upon good organisation, coupled with finance, and it was these two causes that led to the wonderful success of the Fourth. The Congress Committee can feel well satisfied with their achievement. Success was everywhere, and everywhere success. In the first place, and throughout the functions, the committee kept in view their one chief aim, "Publicity." This, of course, opened up a vast amount of discussion, correspondence, telephone and personal interviews, and as these things had to be done, we had to get busy, and busy we were. And I make bold to say that as a result Esperanto received one of the biggest boosts it ever received in New South Wales, if not Australia.

A favourable atmosphere had to be created, so that the after-effects would interest the public and the Press.

For this we searched around for suitable material which would best suit our to-be-created atmosphere, and happily this was at hand, as the Press reports which we received amply demonstrate. That we received more than 14 columns in the various journals is sufficient proof of our publicity efforts. Remember that 14 columns are nearly two pages of any ordinary newspaper.

Of course, the chief factor was the wonderful support given to the committee by samideanoj from all Australian States and New Zealand.

I wish to thank all samideanoj who helped to make the Fourth Australasian Esperanto Congress an event worthy of the movement and Australia.
—L. E. Fosto.

LA HISTORIO SIN RIPETAS.

La malriĉuloj ni ĉiam havas inter ni. Tiel ankaŭ, ŝajne, ni havas la grumblandojn. Kiel atesto, legu malsupren.

—Al atestimata redaktoro,

—Ĉu vi notis ĉi tiun rimarkindan samecon en la programoj de la Sidneja kongresoj?

Vizito al Zoologia Ĝardeno 1920. Same en 1923.

Vizito al Botanika Ĝardeno 1920. Same en 1923.

Koncerto kaj Esperanta dramo 1920. Same en 1923.

Tuttaga ekskurso sur la haveno 1920. Same en 1923.

Vespera akcepto en kunveno de Sidneja klubo 1920. Same en 1923.

Ĉu la Sidneja komitato kongresa farinta programon por unu kongreso ĉiam uzos ĝin kiel modelon por estontaj kongresoj?

Mi ne diras, ke la eroj de la programo ne estis ĝueblaj, sed kiel la angla diraĵo metas ĝin "la variaĵo estas ĉarma." Tiel mi opinias, ke la variaĵo en la programo de la kongreso, kiam oni konvokos ĝin denove en Sidnejo, estos bone akceptata. Samideane via, "Maĉi kaj remaĉi."

KONGRESAJ IMPRESOJ DE

"Kiel Plachas al Vi."

Ju pli mi pensas pri la pasintaj feliĉaj tagoj de la Kvara Aŭstralia

Kongreso des pli mi sopiras povi ĉeesti kaj partopreni en tutmonda kongreso kaj fratiĝi kun la samideanoj alilandaj kaj konstati eĉ pli plene tiun mirindan, nepriskribeblan kompreniĝo kiu naskiĝas inter la ŝtudentoj de nia kara lingvo.

Certe estas, ke "la kvara" estis pli plezurdonata pro la fakto ke kelkaj alilandaj samideanoj ĉeestis, kio donis al ni la okazon povi kompari la akcenton kaj parolmanieron kaj pruvi ke Esperanto vere estas la sama por ĉiuj, kaj, ke la celo de la alilandanoj estas por plena kompreniĝo kaj amikeco. Kia plezuro estis, povi, en imago, sin trovi kune kun la amiko en Rusujo, Ĉeĥoslovakio Estonio kaj povi paroli pri la interesajoj de tiuj landoj, kaj momente forgesi pri la ordinaraĵoj de la vivo.

Mi estas certa, ke nia movado gajnis multon pro la kvara Aŭstralia Kongreso. Tiuj kiuj ĉeestis fariĝis pli entuziasmaj dum la feliĉaj tagoj, kaj konstatis, ke nia plej forta propagandilo estas "Unueco," kaj kvankam Aŭstralio estas tre vasta lando, se samcele ni ĉiuj helpas, ni povos per la organizacio de la A. E. A. kaj nia gazeto, "La Suda Kruco," konatigi nian celon kaj movadon en ĉiu angulo de nia insula kontinento.

Plej grave estas ke ni ĉiuj povu flue paroli—lingvo uzata nur skribe baldaŭ fariĝos senviva, ni parolu, ĉiam parolu kaj montru al la homaro ke Esperanto estas utila, uzebla, belsona lingvo. Bone estus, se en ĉiuj kunvenoj nur Esperanto estus uzata. Kial ne fari la studadon el la libroj en la tramoj, vagonaro, kaj hejme, kaj kiam en la klubo ekzerciĝi en la parolado. Venas al mi la penso—kia domaĝo estis, ke ni ne povis uzi Esperanton en la kunsidoj dum la kongreso, kiel en la Mondkongresoj. La raportistoj de la fakjurnaloj, kiuj ĉeestis por raporti pri nia afero, kaj kiuj tiel afable publikigis nian celon, ne estus povintaj tion fari, kiom la fakto mem estus farinta se Esperanto estis tiam la sola lingvo uzata—kia reklamo por nia lingvo; ni esperu kaj eble en la venonta tempo tio efektiviĝos.

Multajn dankojn ni ŝuldas al la urbestro, kiu, gastigante nin, subtenis nian celon kaj montris al ĉiuj ke Esperanto kaj Esperantismo indas lokon en mondaferoj.

Bonan Sukceson al la Kvina.

POSTIMPRESOJ DE LA KVARA KONGRESO DE AUSTRALAZIAJ ESPERANTISTOJ.

La Kvara Kongreso de Aŭstralaziaj Esperantistoj en Sidnejo de la bela haveno estas veninta kaj irinta, la oficialaj paroladoj estas finitaj, la ĵurnalistoj estas dirintaj siajn dirojn, la ĵurnalaj fotografistoj estas perdintaj sian intereson en esperantistaraj bildoj kaptotaj, la kinematografistoj estas jam persekutantaj neesperantistojn por akiri bildojn de interesaj lokaj okazaĵoj, la Sidneja urbestro estas akceptinta kaj regalinta la delegitojn, la kongresanoj estas donintaj dankojn por pruntedono de registara boatego por futtaga ekskurso sur la haveno, la babilado dum multaj ĝuindaj plezurkunvenoj estas silentiĝinta, la Nova Sud-Kimruja ministro de edukado estas rifuzinta argumenti pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, la tuta kvara jam estas pasintaĵo, kaj aŭstralaziaj Esperantistoj pripensas la kvinan, okazonta en Melburno, paskon 1925.

Ĉu nenio restas el la kvara? Ĉu nur memoro pri dolĉa, harmonia tempo kun Esperantistoj el ĉiuj ŝtatoj de Aŭstralazio, kaj pri interesa batalado per ĵurnaloj kontraŭ nekomprenantoj? Espereble ne.

Ĉe tiu kongreso, kiel ĉe ĉiuj, bonaj intencoj estis proklamitaj. Ĉu kelkaj, eĉ multaj el ili, fariĝos pavimaj ŝtonoj sur la vojo al, iom tro tropika loko? Nur ĉiu aparta Esperantisto povas respondi por si mem. Kune, en amasoj, ni ĉiuj estas tre entuziasmaj, plenaj de forto venkanta ĉiujn malhelpojn, elokventaj kun argumentoj kontraŭ tiuj kiuj sidas en la mallumo ne sciante Esperanton. Tamen, kiam ni revenas al la ĉiutaga vivado, ĉu ni ĉiuj memoras, ke ni, kiam ĉe la kongreso, ĉiu, aparte, individue, sentis la fortan muskolon kiun ni kune posedas, kaj ĉu ni komprenas, post la kongreso, ke eĉ unu elfalinte kun supozo ke ties laboro ne estas necesa, malfortigas tiun muskolon de harmonia kunlaborado?

Harmonio ja estis la elstaranta fakto de la kongreso. Esperantistoj, kiel puraj homaj estaĵoj, ja povas havi inter si, individue, sennombrajn pretekstojn por malharmonio; sed ĉu alta idealo povas voki sufiĉe sukcese al tiaj ecoj en homoj, kiaj faras ilin pli altaj ol iliaj individuaj malkonsentoj? El

tia kongreso, kia la kvara en Sidnejo, ni ricevas, se ne tutan jesan respondon, almenaŭ grandan esperon por tia.

(Umanto.)

RECENZOJ.

Krucumo, de Aleksandro Drozdov, el la rusa lingvo tradukis N. Hohlov. Eldonita de la Sudslava Esperanto-Servo, Zagreb. Prezo. 1 sv. fr.

Dum la rusa revolucio kaj poste la lingvo iom ŝanĝiĝis kaj rezulte pliriĝis la nacian literaturon per novaj skribmanieroj kaj freŝaj formoj. Verkanto kiu elstaras rilate al tiu ĉi movado estas A. Drozdov, kiu nun vivas kaj havas grandan reputacion en Rusujo. Sinjoro Hohlov volis, do, prezenti al la mondo, per Esperanto, tipon de la nova rusa literaturo, elektinte por traduko la jenan verkon. "Krucumo" priskribas kortuŝajn aspektojn de la revolucio, kaj la tradukinto bone uzis nian lingvon; tial la rezulto estas ne malpli interesa ol utila. (B.C.B.)

Esperanto For All, Eldonis Brita Esperantista Asocio, prezo 2d. Jus reaperis "Esperanto for all," unu el la plej utilaj, allogaj, kaj malkaraj propagandiloj, kiujn anglaj samideanoj povas disdoni. Ĝi montras klare kial homoj de ĉiuj situacioj bone farus lernante la lingvon, kaj per sia plena skizo de la ĝramatiko preparas ilin al la studo de legolibroj por lernantoj iom progresintaj. (B.C.B.)

Elektitaj Humoraj Rakontoj. Eldonis Brita Esperantista Asocio. Prezo 9d. Ĉi tiuj rakontoj bone taŭgas por deklamo aŭ legado ĉe grupoj aŭ kluboj. Ili estas vere humoraj, enhavante iujn pecojn iam antaŭe konatajn de Angloj, tradukitajn de Esperantistoj ankaŭ konataj. La lingvo, do, estas korekta kaj simpla. La libro estas vere tio, kion serĉas novaj samideanoj, kiuj iam trastudis la lernolibron kaj volas trovi enirejon en la kolekton de Esperanta literaturo. (B.C.B.)

NEKROLOGIO.

Nia movado perdis tre varman subtenanton pro la morto de sinjoro A. Douglas, unu el la plej malnovaj Esperantistoj en Melburno. Ĝis 1916 s-ro. Douglas laboris senlace por Es-

peranto, sed lastatempe, pro sia malbona sanstato, li ne povis ofte ĉeesti la kunvenojn. Al liaj parencoj ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn.

Juna homo, kvankam maljuna Esperantisto, Sinjoro J. H. Cadell, el Brisbano, ĵus mortis post longa nervomalsano. Kvankam en nebona sano li partoprenis la kongresan ekskurson al Taronga Parko kaj la neatendita sciigo de lia morto malgajigos ĉiun kiu konis lin. Antaŭ ok aŭ dek jaroj li sukcesis interesigi la Brisbanan Turisman Oficejon en Esperanto, kaj rezulte de liaj klopodoj poŝtkartoj kun esperantaj klarigaj tekstoj estis eldonitaj. Al lia juna vidvino kaj aliaj parencoj ni tre sincere esprimas nian simpatian.

LA KVARA AUSTRALAZIA KONGRESO.

La kvara Aŭstralazia kongreso havis lokon en Sidejo dum Pasko. Naŭdek unu delegitoj enskribiĝis kaj la plimulto ĉeestis kvankam ili devis veturi longajn distancojn. Ekzemple, la Perth-a delegito veturis vagonare dum kvin tagoj, laŭ longo da 2500 mejloj. La Nov-Zelandanoj devis vojaĝi mare 1500 mejlojn kaj la Brisbananoj kaj Melburnanoj 500 mejlojn.

Doktoro Scott-Fletcher, ĉefo de Wesley kolegio, malfermis la kongreson. Li diris, ke la progreso de Esperanto dum nur unu generacio estis mirinda kaj ke nun ni estas ĉe la tagiĝo de glora, nova epoko, kiam Esperanto unuiĝos la popolojn de tuta la mondo.

La Kongreso decidis peti la Ĉef-Poŝtestron, ke li permesu la sendadon de telegramoj kaj kabloj en Esperanto je la sama tarifo kiel naturaj lingvoj anstataŭ, kiel nun, je la alta, koda prezo. Alia decido estis ke informo pri la nuna loko de Esperanto en komerco estu sendata al ĉiuj asocioj de komercovojaĝistoj en Aŭstralio.

La Kongreso rekomendis ĉiujn grupojn elekti po unu membro por starigi en ĉiu ŝtato komitaton por la vigla propagando de Esperanto en Aŭstralio.

Dum la semajno oni faris ekzamenon de kandidatoj por diplomo, parolis pri Esperanto antaŭ universitatoj kaj kiel deputitaro petis la Ministron por Publika Instrudado permesi la enkondukon de Esperanto en la ŝtatajn Lernejojn. Ili ne gajnis la permeson, sed sekcio de la instruistoj mem daŭre klopodos.

La socialaj flankoj de la Kongreso permesis la altiron de granda publika atento, kiel komprenigos la fakto, ke la novaĵeroj, kiujn la tagjurnaloj presigis pri la Kongreso ampleksis 14 kolumojn, kiuj egalas du paĝojn.

Elstaranta, gratulinda afero estas, ke la Urbestro de Sidnejo konsideris la Kongreson sufiĉe grava publika okazo por doni al la delegitoj civitan bonvenon en la Urbdomo.

Entute la Kongreso estis granda sukceso kaj rezulte la intereso pri Esperanto pli vigliĝis en Sidnejo kaj tra la tuta komunumo de Aŭstralio.

VOJAG'ANTOJ AL LA NURNBERGA KONGRESO.

—Vi Esperantistoj estas la plej bonaj propagandistoj kiujn mi konas—diris iu sinjorino. La okazo estis la foriro de gesinjoroj Drummond per la vaporŝipo "Largs Bay" ĉe Port Melbourne. Ĉiuj babiladis Esperante kaj la Esperantista standardo flirtis en la dolĉa venteto. Gesinjoroj Drummond estas bone konataj inter internaciaj societoj en Melbourne. Sinjoro Drummond estas unu el la pioniroj de la Esperanta movado en Aŭstralio kaj estis sekretario de la Dua Aŭstralia Esperanta Kongreso. Sinjorino Drummond tiam estis bona helpantino. Ŝi ludis en la teatraĵo "The Norman conquest" en la publika propaganda kunveno, kaj estis la heroĭno en "Kara Panjo," tradukita de "Gego." "Kara Panjo" estis ludata por la Esperantistaro.

Longaj krioj de "Ĝis la Revido." sekvis la "Largs Bay" kiam ĝi movis for de la ŝipstacio. "Se la mevoj estus papagoj ili lernus tiun krion," diris la sama sinjorino.

Fraŭlino Emilie Ely, kiu reprezentos la Australazian Esperanto-Asocion. Fraŭlino Elsie Ryall, kaj s-ro McVeigh, kiuj ankaŭ partoprenos la kongreson vojaĝis sur pli frua ŝipo.

KRONIKO.

Oakleigh, V.—La unua jara kunveno de la Oakleigh "Iru Antauen" grupo okazis dum la vespero de 21 Marto ĉe la domo de la Prezidanto Sinjorino Bigelow.

Preskau la tuta grupo ĉeestis, kaj multe da agrablaj kaj komplimentaj

esprimoj estis diritaj per diversaj parolantoj rilate al la sukceso, kaj progresado de la grupo en la daŭro de la pasinta jaro. La sekvantaj lernantoj, de tiu lerta instruistino Sinjorino Bigelow, gajnis diplomojn, nome Fraulinoj L. Irwin, V. Irwin, N. Byatt, sinjoro Byatt, kaj fratino Abbott ankaŭ sidis por ekzameno ĉe la Sidneja Kongreso, kaj havas grandajn esperojn pri la rezulto. Estas notinda ke ses anoj de ĉi tiu grupo ĉeestis la Sidnejan Kongreson.

LA FANTOM-VIZITATA PALACO.

De Edgar Allan Poe.

(En ĉi tiu poemo, aperanta en lia novelo "The Fall of the House of Usher," la aŭtoro per originala metaforo priskribas la aspekton de homo unue mensosana kaj poste freneziginta. "Porphyrogene"—en purpuro naskita, t. e. reĝa.)

1. En plej verda nia valo,
inter bona anĝelar',
palaco bela, nobla, iam—
palaco radianta—staris.
En la Reĝoland' de l'Penso,
jen ĝi staris!
Kaj seraf' neniam flugis
super dom' egale bela.
2. Flagoj flavaj, gloraj, oraj,
sur tegmento fluis, flirtis:
(ĉio ĉi okazis longe—
longe antaŭ nun)
kaj ĉiu milda vent', ludante
en tiu dolĉa tag',
sur rempar' plumita, pala,
kun parfumo flugis for.
3. Kaj vagantoj en la valo
tra fenestroj lumaj vidis
spiritojn movi sin muzike
laŭ liuta melodi'
ronde ĉirkaŭ trono, kie
(Porphyrogene!)
en glor' al lia stat' konvena
reganto de la regno sidis.
4. Per perlo kaj rubeno brilis
palaca pordo bela,
tra kiu fluis, fluis, fluis,
briletante ĉiam,
arme' da eĥoj, kiu dolĉe
nur devis kanti
per voĉoj senegale belaj
pri saĝo kaj prudent' de l'reĝo.

5. Sed ombroj de malĝoj' kruele
atakis lian altan staton
(ha, ploru ni, la vivon plu
ne konos li, malfeliĉul!);
kaj ĉirkaŭ lia hejmo la gloro
floranta, brila,
legendo nur malklara estas
pri malnova temp' en tombo.

6. Irantoj en la valo nun
tra fenestroj ruĝaj vidas
ombregojn movi sin groteske
laŭ malakorda melodi';
dum torente, mortsimile,
tra l'pala pordo,
inkuba band' elkuras ĉiam,
kun rido . . . sed ne plu rideto.

—Tradukis A. Deĝsdo.

LA PESADO DE ELEFANTO.

Iam orienta reĝo estis savita de ia granda danĝero. Por montri sian dankecon por la liberigo li promesis doni al la malriĉuloj la pezon de sia preferata elefanto en arĝento. Sed, kiel pesi elefanton? jen estis malfacilaĵo. La saĝaj kaj kleraj viroj de la kortego mankaregis siajn barbojn, kaj priparolis la aferon sed neniu sciis, kiel pesi elefanton. Fine malriĉa maristo ekpensis sendanĝeran kaj simplan rimedon por pesi la elefanton, kaj miloj da arĝenteroj estis elkalkulitaj kaj disdonitaj al amaso da malriĉuloj pro la lerta penso de la maristo. La metodo, kiun la maristo uzis estis la jena—Unue li alportis grandan boaton tre proksimen al la marbordo kaj metis tabulegojn de ĝi ĝis la bordo, por ke la elefanto povu eniri la boaton, tiam li faris strekon sur la flankoj de la boato ĉe la linio ĝis kie la boato malleviĝis kiam la elefanto estis en ĝi, kaj poste li elkondukis la elefanton, kaj ordonis ke oni plenigu la boaton per arĝento ĝis kiam la boato denove malleviĝos ĝis la sama streko.

—Tradukis E. B. Bigelow.

En Menado sur insulo Celebes pastro Kyftenbelt fondis Esp. Virinan Klubon de ĉinoj, eŭropanoj kaj indiĝenoj kaj donas tri kursojn. Entute tie nun estas 80 ge Esperantistoj.

EKSCITA BARAKTO.

Dum la printempo de 1918, mi esploris en la marŝoj de sudokcidenta Florido la grandajn Egretarejojn. La Egretoj, kiel ĉiu scias, estas tre ŝataj de la virinoj por siaj belaj plumoj, De multaj da jaroj viroj riskas la vivon por la ŝataj plumoj.

Tre bedaŭrindan staton de la aferoj ni trovis, Vilĉjo Henriko mia gvidanto, kaj mi. Ni veturis por kelkaj semajnoj en mia ŝipo "Nepenthe" traŭrante vastajn marĉojn, ĝis iam granda Egretarejo, sed senutile. La plumĉasistoj estis tie antaŭ ol ni kaj lasis siajn postsignojn. Kie antaŭe estis granda babilantaro de belegaj blankaj Egretoj jam restis nenion krom kelkaj sangogluŭitaj plumoj.

Ni preskaŭ perdis la kuraĝon dum kelke da tagoj; ni ne vidis iun ajn, krom unu du vagantajn Semenolajn Indianojn kiuj antaŭen puŝis siajn strangajn kanotojn, tra la segilherbo kaj akvo de la senhoma insula regiono, kaj la Egretejoj, kium ni vizitis (antaŭe tiel famaj por la plumkomerco) estis malplenaj. Fine ni trovis kelkajn birdojn, ĉe soleca lago post Kabo "Sable" almenaŭ 400 longaj blankaj, kaj neĝaj Egretoj. Sed ĝi estis nur negranda Egretarejo kaj la birdoj estis timemaj, evidinte oni jam antaŭ alpafis ilin tiunsezonon.

Post pripenso Henriko memoris Egretarejon kium li vidis, en la distanco de ĉirkaŭ naŭdek mejloj, ĉe la marĉoj de la Madejra Altaĵeto, tra kiuj li ĉasadis, jam antaŭ ol kvin jaroj. La esploro estis farinda ĉar se la Egretarejoj ankoraŭ estis tie, oni povas senriske konkludi, ke la birdoj estas neĝenataj, ĉar la loko oni nur malfacile atingas. Ni levis la ankron, kaj ekveturis al Madejra kiu kuŝas en pli ol unu taga distanco, se oni konsideras ke la lagvojo'n, kium ni devis tra veturi ĉirkaŭ vagas, kaj la malrapideco je kiu ni devis iri. Fine ni atingis la celon, kaj ĝi estis sovaĝa kaj dezerta loko. Mejlo post mejlo da Madejraj arboj sin etendis sur ĉiuj flankoj, kaj ŝajnis kvazaŭ tiuj dezer-taj lokoj ne estis ĝenitaj de homoj dum multe da aĝoj.

La sekvantan matenon ni pretigis nin por la esploro de la Egretarejo, portante kune kun ni lankovrilojn, ĉasilojn, kaj manĝaĵojn sufiĉajn por unu semajno, ni albordigis el la ŝalupo kaj kaŝinte ĝin inter la mangloj, ni

ekiris tra la marĉoj al nia serĉado. La marŝo estis malfacila kaj teda; ĉe ĉiu paŝo ni eniĝis en la ŝlimon kaj koton, kiuj estas karakterizaj de tiu tuta regiono. La unua punkto ni starigis nian tendon, ĉe mirta altaĵo kaj ne vidis ec unu Egreton.

Lacaj kaj senkuraĝigitaj ni envolvis nin en la lankovrilojn, sub la moskitretoj, kaj estis lulataj en dormon de la sennombraj insektoj.

Ni leviĝis antaŭ ol tagiĝo kaj denove ekiris, Henriko diris ke li konkludis, ke ni estas proksime al la Egretarejo, kaj tuj kiam estos sufiĉe da lumo, ni devos pafi por observi, ĉu ni povas vidi flugantajn birdojn. Tagiĝo venis rapide, mi grimpis arbon kaj teleskope ĉirkaŭ rigardis. Henriko pafis du fojojn, kaj samtempe mi rimarkis malproksime norde tri birdojn flugantajn malrapide el la vido-Egretaj! Ĉiu sentis sin kuraĝigita de tiu eltrovo kiu signifis ke la celo de nia vojaĝo jam estis videbla. Vilĉjo diris ke li sentis sin iom malsana kaj repozos iom, kaj rekuniĝos kun ni ĉe mirtabaro, kium ni povas vidi ĉirkaŭ du mejloj norde, He! fatala mirtaltaĵeto, se ni nur sciis tion kio atendis nin tien.

Henriko kaj mi ekmarŝis kaj dum longa tempo silente kaj malfacile piediris, ni preskaŭ atingis la mirtan insulon kiam mi vidis, negrandan marĉtruon ĉirkaŭ unu akro je amplekso. Ni aliris al ĝi scivole kaj ekvidis kuŝanta sur la supron de la ŝlimo grandegan aligatoron.

Jen estas la ŝanco, fotografi grandan aligatoron tute proksime. Ĉe la riveroj kaj lagoj de la okcidenta Florida Bordo, la ekvidoj, kiujn oni havis de aligatoroj, estas malmultaj kaj maldaŭraj. Se ni nur povas teni tiun ĉi aligatoron, sur la supro (kaj ĉar la marĉtruo estas nur kelkaj futoj profunda la ŝanco por fari tion, estis bona) mi povos kapti kelkajn altvalorajn bildojn. Henriko kaj mi fine decidis, ke ni kune eniru la marĉtruon ni kun la kamero kaj li kun bastono por inciti la aligatoron ke ĝi moviĝu.

Nu tio estas tro riskema kaj malsaĝa afero, sed tiel ekcivitaj ni estis pri la ebleco gajni fotografiaĵojn ke nek mi nek li paŭzis por konsideri, kio estos la eblaj sekvoj. La marĉtruo estas pli profunda ol ni unue kredis, kaj ni tuj eniĝis pli profunda ol ĝis la talioj en la plej malbonodoran ŝlimon kium oni povas imagi.

La aligatorio ŝajne dormis kaj kuŝis kiel akvosaturita ŝtepo, kiam ni alproksimiĝis Henriko ekpuŝis lin per la bastono kaj li malrapide malfermis la okulojn, verdajn minacajn okulojn, kaj minace rigardis nin, samtempe li ellasis teruran siblantantan bruon. Tiu estis bona ŝanco, kaj mi ekklakis la obturatoron de la kamero, tiam li tuj subŝlimiĝis. Zorgu! kriegis Henriko, se li ektuŝas vin ne movu vin pro la vivo. La aligatorio sin direktis al Henriko kaj mi, bonŝance li preterpasis inter ni, kaj mi sentis la kalan manon ŝovata kontraŭ mian kruron dum la granda besto forkuris. La malvarma ŝvito staris sur mia fronto, je la penso de nia mirakla savo, kaj mi ekiris al la bordo. Tamen post plua konsidero mi decidis peni denove fotografi la monstرون ĉar tiu ĉi ŝanco eble neniam revenos, kaj mi devas havi la bildon. Mi ŝanĝis la filmon en la kamero kaj glitis denove en la naŭzantan truon. Dume Henriko baraktis antaŭen per longa bastono, jen nia grava eraro, ĉar nek li nek mi portis armilon, lasinte niajn pafilojn sur la bordo.

La aligatorio jam estis nenie videbla kaj ni devis sonde serĉi per la bastono ĝis ni ektrovos lin. Subite Henriko kriis, "Jen li estas!" Li ŝovis la bastonon sub la aligatoron kaj komencis zorge levi ĝin ĝis la surfaco, malnova artifiko de la aligatoraj Ĉasistoj. "Mi ne scias al kiun direkton li rigardas, li ridis nerve, tio povas esti ĝia kapo aŭ ĝia vosto."

Malrapide venis ĝis la surfacon granda striita vosto. Henriko penis ekkapti ĝin, samtempe ekklakigis la obturatoron de mia kamero, kaj kun forta deturno la monstro denove malaperis.

Mi eksentis ke mi estis kontentigita, kiam subite la bestego levis sin al la surfaco ne pli ol kvin futoj de kie Henriko kaj mi staris, ĝis niaj akseloj en la sulfura ŝlimo. Rapidu! mi kriis al Henriko, "donu al mi tiun bastonon," kaj prenu la pafilon. Mi tenis la dikajn bastonon sub mia brako, kaj posten iris ne turninte min, malrapide for de la antaŭvenantan bestegon dum mi kaptis bildojn je ĉiu okazo.

Henriko estis baraktanta al la bordo, kaj mi fervore preĝis ke li estu sufiĉe frua. Mi jam vidis ke la aligatorio decidis ataki min, kaj mi devis forigi mian kameron; kredeble tio ruinigos

ĝin, sed tenante unu okulon, je la granda diablo, mi forjetis la kameron alten en la aeron al la bordo, kie mi aŭdis ĝin frapi kun obtuza frapo.

La aligatorio nun estis venanta antaŭen pli rapide, kaj mi estis devigita rapidi, por konservi la distanco inter ni. Subite mi faletis, kaj li jam estis sur mi, mi frapis kun mia tuta forto kontraŭ la grandega formo, kaj li flanken iris por unu sekundo, sed returnis kaj peze saltis al mi. Henriko jam prenis la pafilon kaj estis kuranta kun ĝi al la rando de la bordo. Por ĉielo pafu! mi timkriis dum mi gardis min kontraŭ la alkuro de la rampaĵo. "Mi ne povas, kapitano; li ekkriis, mi timas pafi vin." Ĉe tio mi sentis mian dekstran kruron tenata en ia terura premilo, kaj antaŭ ol mi povas elkrii, mi estis trenita subtiun teruran ŝlimon, suben, suben, per paro de abomenaj manoj, ŝirantaj miajn kruojn. Mi baraktis kaj piedfrapadis en angoro. Tiu mortlacerto estas mortiganta min, mi ekpensis pri la tranĉilo en ĝia ingo, kaj enpuŝis ĝin, per mia tuta forto en tion, kion mi konsideris esti la okulo de la bestego. La tenado de mia genuo subite lasiĝis, kaj mi baraktis al la surfaco; blindigita kaj preskaŭ sufokita. Henriko estis freneze faletanta tra la ŝlimo, je la distanco da dudek futoj—jetu al mi la pafilon mi plorĝemis. Ho mia kruro, mia kruro. Li jetis ĝin. Ĝi falis ne pli ol kvar futoj de mi, sed antaŭ ol ĝi povis subŝlimiĝi, mi kaptis ĝin en miaj sennervaj manoj kaj ŝanceliĝe rondturnis por vidi la aligatoron ĵus venanta al la surfaco, kaj la sangon eliranta el lia maldekstra okulo. Kapture mi dufoje celis kaj tiam la pafilo falis el mia sennervata teno kaj mi malleviĝis en la teruran ŝlimon.

Mi rimarkis vulturon alte en la arkaĵo de la ŝtalblua ĉielo, kiam mi malrapide malfermis la okulojn. Jen prenu iom da tio ĉi, diris Vilĉjo, kaj li donis al mi poŝbotelon el kiu mi glutis avide. Henriko faris arterpremilon ĉirkaŭ mia kruro kaj la vundo ĉesis sangi, sed la doloro estis terura. Kiel mi atingis la ŝipon mi neniam scios, ni enveturis dum unu kaj duono tagoj, kaj por eliri ni bezonis tri tagoj. Mi nur povis veturi mallongajn vojpecojn subtenate de Vilĉjo, kiun ĉiuj du aŭ tri horoj, bandaĝis denove mian vundon, per strioj, ŝirita de lia ĉemizo, Henriko detranĉis la kapon, al la besto

kiun ni pruvis grandaĝa viraligatorio, ĵus du kolorojn malpli ol dektri futojn longa, kaj ni ankaŭ portis tion kun ni kiel memoraĵojn, kiun nun pendas muntita ĉe mia studejo. Kiam ni fine trafis la ŝipon, oni kune tenis la vundradon, per algluigema plastro. kaj post tri semajnoj ĝi cikatriĝis. Mi neniam forgesos tiun marĉetruon eĉ se mi vivos al tiel granda aĝo kiel Metusala, kaj portos ĉe mi ĝis la tombo la memoron kaj la cikatrojn el tiu terura barakto.

ANTIKA BULGARA ARTO.

Antaŭ nelonge en vilaĝo Mogilovo, Sudbulgarujo, estas farita rimarkinda arĥeologia eltrovaĵo. Unu apud alia estas trovitaj la metalaj partoj de du militĉaroj. Ni devas atentigi pri la bronzaĵoj de la ĉaroj. Busto de Heraklo kun ŝildo en la dekstra mano, levita al la ŝultro, en la maldekstra tenanta batalpilkojn kaj surkape havante leonfelon. Statueto de mortigita batalanto, sur piedestalo; la ĉevalo kaŭranta sur siaj postaj piedoj, la kapo elstaranta time kun rektigitaj oreloj. Sur la ĉevalo sidas militanto, klininta sian korpon malantaŭen, en senviva pozo. Lia kapo estas klinita flanken, la dekstra mano malsuprenlasita, kaj en ĝi troviĝas dutranĉa hakilo. Longaj haroj falas sur liajn ŝultrojn. La dekstra ŝultro estas nuda. Lia frigia ĉapo kaj la tuniko estas belega laboraĵo. La trovaĵo estas valora akiraĵo por la bulgara scienco.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantista, jan.-feb.; **Brazila Esperantista**, okt.-dec.; **Esperanto Triumfonta**, n-roj. 119 ĝis 130; **Espero Teozofia**, nov.-dec., jan.-feb.; **France Esperanto**, feb., mar.; **Internacia Medicina Revuo**, Budapeŝt, VI., Terez-korut 5, monate, 8S 4p;

Kristana Espero, jul.-aŭg., sep.-dec., jan.-feb.; **Katolika Mondo**, feb., mar.; **Literatura Mondo**, jan., feb.; **L'Esperanto**, jan., feb.; **La Unuigita Tuthomaro**, jan.-feb.; **La Espero**, jan.; **Literaturo**, okt.-dec.; **La Nova Epoko**, dec.; **La Verda Ombro**, jan.-feb.; **La Revuo Orienta**, jan., mar.; **La Semisto**, okt.-dec.; **La Interligilo**, jan.-feb., mar.; **La Progreso**, jan.-feb., mar.; **Le Monde Esperantiste**, nov.-dec., jan.-feb.; **Nova Europo**, jan.; **Pola Esperantisto**, jan.; **Skandinava Esperantisto**, jan., feb.; **Sennacieca Revuo**, jan., feb.; **Tra la Literatura**, Dresden, A 3 27, Bambergerstr. 45, eliras dumonate, jan., mar.; **Verda Utopio**, dec., jan.-mar.; **Esperanta Finnlando**, jan.-feb.; **Itala Esperanto Revuo**, mar.; **La Espero**, feb.

NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 11 majo ni ricevis la jenajn sumojn, kun danko:—

C. F. Neumann, 9/-; P. Leahy, 5/6; Orlo Smith, 4/6; H. Weiss, 9/-; Geo. Gordon, 5/-; Dro. F. J. Williams, 4/6; D. B. Thomson, 4/6; H. Ballyntyne, 4/6; F. Effer, 4/6; McNaught and Johansen, 4/6; M. C. Trundle, 4/6; N. C. Moore, 5/-; Neyland, 4/6; J. Orme, 4/6; Trewin, 4/6; Chappell, 10/-; Fraser, 2/-; A. E. Beatty, 7/6; J. W. Greene, 5/-; J. Sharples, £1/7/-; J. Popham, 5/6; O. Behnkerr, 4/6; G. D. Kvarnstrom, 5/-; P. T. B. Hudson, £3; H. Byatt, £3; J. Skurrie, 4/6; F. T. Bury, 4/6.

Sro. Joe Popham, Flinders Lane, Townsville, Queensland, Aus. Deziras interŝanĝi P.M. tutmonde. Ĉiam tuj respondos.

Sro. J. Sharples, Flinders Street West, Townsville, Queensland, Aus. Deziras interŝanĝi P.M. tutmonde. Ĉiam tuj respondos.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

“THE RAINBOW,” Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 396 Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 36. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Junio, 1923.

MEETINGS OF GROUP SECRETARIES.

In furtherance of the desire expressed by the Sydney Congress that group secretaries in each State should form themselves into committees to direct propaganda work, several meetings have been held in Melbourne. At the first meeting Mr. A. R. Cohen, President of the A.E.A., presided, the secretaries present being Mr. G. Redfern, Melbourne section of the A.E.A.; Mr. R. Rawson, Melbourne Esperanto Club; Mr. Percy T. Hudson, Iru Antaŭen Grupo; Mr. J. Skurrie, Raciista Grupo; Mr. Delaney, Northcote Group; Miss Irwin, Carnegie Group, and Miss Hollow, Marborda Grupo.

It was decided that those present should form themselves into a permanent propaganda committee, reserving the right to admit secretaries of other groups. Mr. Skurrie was appointed secretary. It was decided to consider a method of sending to the Press such items as would direct attention to Esperanto. It was also suggested that the visit of one group to another would stimulate activity. Mr. Skurrie pointed out that an annual picnic of all local groups would be enjoyable, and would attract beneficial publicity. The committee meets fortnightly, and will be glad to consider suggestions.

[Information of activities in other States is requested.—Ed.]

COMMERCIAL CONFERENCE IN VENICE.

The Conference of Chambers of Commerce, delegates from International Fairs and from Government Tourist offices, held in Venice during Easter, was undoubtedly one of the most important that has ever been held in connection with the Esperanto movement. Organisations numbering 208, from 23 countries, were represented, including 84 European Chambers of Commerce, 2 American, 2 African and 2 Oceanic, 21 Fairs, 30 Tourist Offices, 7 Ministries of Commerce or Finance, and 60 industrial federations, banks, export associations and commercial schools.

The Conference was opened on 2nd April in the palace of the Chamber of Commerce or Finance, and 60 industrial, of the Chamber of Commerce, Sheffield, was elected President. After the welcoming speeches of S-ro. Pianetti, S-ro. Scattolia, Cavaliere Ponti (Vice-Mayor of Milan), and S-ro. Chiostergi, Secretary of the Italian Chamber of Commerce for Switzerland, who spoke in Italian, the only language used was Esperanto. The first sitting was devoted to testimonies from various delegates to the value of Esperanto as shown by the experience of their organisations. The delegates of the Chamber of Commerce in Pekin, of the Chamber of Commerce in Tien-Tsin, and of the Chinese Chambers in Siam and Macas-

sar reminded the Conference that the Chinese Republic had decided on the instruction of Esperanto in normal schools. The Government supported the Esperanto movement because China needed more and more to exchange the raw materials of the East for the manufactured articles of the West, and the difficulty and number of European languages greatly handicapped the necessary communication. Esperanto is much simpler, and could be used for all and by all countries.

The delegates of the Ministry of Finance, Jugoslavia, reported the great changes that had taken place in the economic situation of that country since the war. Previously the German language had been used for international commerce, now the knowledge of Italian and English was more necessary, but those languages were unknown by most traders. Esperanto was directly helping the removal of that difficulty. The Ministry used Esperanto to make known abroad the economic requirements of the country.

The delegate of the Ministry of Commerce and Industry, Roumania, said that the Roumanian Chambers of Commerce greatly appreciated the spread of Esperanto, as the numerous languages of the Balkans and Central Europe greatly hindered commercial relationships. He had been sent as an observer to furnish a report on Esperanto as a spoken language, and he already noted with pleasure that he could easily converse, with full understanding, with all the delegates from other countries.

The delegate of the International Labour office of the League of Nations remarked that the office was constantly in correspondence with Chambers of Commerce and Industry regarding labour conditions. It had experimented with Esperanto, and had printed documents in it. Correspondence in Esperanto had followed with many Eastern countries. The office now regularly issued monthly bulletins in Esperanto.

The second sitting was devoted to the representatives of the International Fairs. Delegates from Bordeaux, Breslau, Budapest, and Frankfurt spoke. As a result of Esperanto circulars, information regarding the latter fair had been translated into national languages of nine countries in

1919, and printed in 35 newspapers, and in 1921 they had been translated into 23 languages and reprinted in 128 papers. In connection with this last fair, 650 letters in Esperanto had been received from 37 lands and 1000 despatched.

The delegate of the Milan Fair stated that this fair was now beginning the use of Esperanto by sending 50,000 circulars throughout the world.

The delegate of Padua Fair said that their Esperanto correspondence was chiefly with traders of those nations which had no knowledge of the languages of the great nations.

The delegate of Reichenberg Fair stated that an examination of the correspondence dealt with showed Esperanto came fourth immediately after English, French and German.

The delegate of Leipzig Fair said that some visitors had remarked that it was only through Esperanto that they knew of the existence of the fair. One such visitor came from Morocco, and another from the Argentine. The fair desired to place on record that it had found Esperanto thoroughly satisfactory from a linguistic point of view, because there had been no misunderstandings, such as had occurred in the use of other languages.

The third sitting was devoted to Chambers of Commerce. The delegate of the Paris Chamber referred to the decision of his Chamber on 9th February, 1921, to introduce Esperanto into the commercial schools under its jurisdiction. He said that young people would learn Esperanto if it were shown to them that it would be to their interest to do so. Therefore, employers should require their employes to know the language. Notwithstanding its high linguistic merits, Esperanto should be presented to commercial men, not as another foreign language, but as a universal utility similar to the typewriter or adding machine. Esperanto was valuable as an international code comparable with telegraphic codes. In wireless telephony Esperanto would be of the greatest use.

The delegate of the Chamber of Commerce, London, gave some striking testimony. The head of the Frank H. Lockyer Supply Co. took part as a seller at the Lyons Fair of 1919, although he had no knowledge

whatever of French. Through the delegate of the U.E.A. he received full preliminary information, and was able to engage a French clerk with a knowledge of Esperanto. With the assistance of his clerk he was able to present his goods and do business.

Mr. Henry Stephens, of Stephens' Inks, is of the opinion that Esperanto, through its great simplicity and clearness, is preferable to the languages he has used for the past 20 years. Following the use of Esperanto in his advertising, he has received orders from nearly every country. Adams Polish Co. Ltd., after English, prefers to use Esperanto instead of a foreign language, for then the possibility of misunderstandings vanishes. Mouchel and Partners Limited, civil engineers, used Esperanto to purchase steel bars and rails in different lands of Europe, and to acquire photographs and precise information concerning bridges and piers. "As a Franco-British firm," the director writes, "we may say that the level of linguistic correctness in the Esperanto correspondence was much higher than that ordinarily found in the letters of foreign correspondents who essayed to correspond with us in either English or French."

The Northern Import Co. writes: "In relations with French, German, Austrian, Polish and Czechoslovakian firms for the importation of commodities, the use of Esperanto proved not only practical, but almost necessary. As the result of our experience we assert, without hesitation, that without the help of Esperanto the same results would not have been attained, except at much greater expense and with much greater difficulty."

The Helical Bar and Engineering Co. writes: "We used Esperanto in inquiries for certain special material procurable on the Continent. The precision of the technical details was always fully satisfactory, and left no doubt as to the fitness of Esperanto for international correspondence." The delegate handed in a list of 20 similar tributes. The secretary of the A.E.A. in London received 1178 letters and despatched 1395 in one year. The commercial services rendered included information regarding printing presses and engraving with Spain, advertising with Portugal, horticulture with

Russia, clothes with Poland, cinematographs with Germany and Russia, honey with Russia, dried bladders with Holland, locomotives with Austria, patents with different countries, and oil with North Africa. In addition he translated many letters and circulars for British and foreign firms. This shows that by its own organisation, with delegates in each country of the world, the U.E.A. offers facilities for the immediate use of Esperanto for practical purposes.

The delegate from the Chamber of Commerce, Treviso, cited similar facts for Italy. According to his inquiries 40,000 persons had learnt Esperanto in Italy, and there existed facilities for Esperanto translation in 114 Italian towns.

The delegate from the Chamber of Chemical Products, Lyons, handed in a list of 20 local firms who use Esperanto in their correspondence.

The delegate for the Chambers of Commerce in Brno, Reichenberg and Hradec-Kralove (Koniggratz) stated that the latter chamber had opened an office for the translation of commercial texts from and into Esperanto. In that town two firms used Esperanto for their advertising in 1921; at the present time 33 firms used it. One firm found that after an Esperanto advertisement it received 10 inquiries from 5 different countries.

The delegate of the Chamber of Commerce, Galatz, stated that in a Roumanian factory employing Roumanians, Hungarians and Russians with a British foreman, in order to apply the Taylor system, it was necessary to use Esperanto in giving instructions. The department overseers and many other officers, therefore, learnt the language.

The delegate from the Chamber, Budapest, mentioned many satisfactory results from Esperanto advertising—for example, one trader sent 200 Esperanto circulars and inserted two advertisements in Esperanto papers, and received orders from 12 lands—Australia and the United States being among them.

The delegate from Edinburgh mentioned Scottish firms who had made successful use of Esperanto, among them being Buchanan, Scott and Co., of Glasgow, who find that Esperanto is so easy that no special officer is

necessary to attend to correspondence. Anyone who is free at the time, whether a member of the firm or one of the clerks, is able to do all that is necessary. This could be done with no other language. The firm of T. C. Green and Co. uses Esperanto with the utmost success in correspondence with Sweden, Hungary, Japan and China.

The delegate of the Belgian Chamber in London stated that his firm previously used 17 languages for correspondence and advertising; now he uses only English, French and Esperanto.

The fourth sitting considered practical means to promote the more extensive use of Esperanto. One was to form companies with capital from 20 different lands to buy advertising space in newspapers and on hoardings. The publication by the U.E.A. of a year book containing the addresses and scope of activities of all forms using Esperanto was suggested. The delegate of the Italian Radio Club said that it would be impossible to instal sending stations in south and central Europe without adopting such a language as Esperanto, which would be easily understood because of its clear sounds. The delegate of the Radio Electric Society of Switzerland supported this point of view, and said that throughout Poland great interest had been awakened in wireless telephony through an article, which originally appeared in an Esperanto paper, having been reprinted in the national newspapers. It is quite certain that the telephonic waves will pass over localities where many languages are spoken, and that Esperanto will become more and more necessary to obtain an international audience.

The Roumanian delegate agreed with the arguments, and thought that they would induce the magnates of commerce to introduce wireless telephones into the lands of eastern Europe. He asked for information regarding the present position of Esperanto in regard to official telegraph tariffs. The representative of the Persian delegation to the League of Nations explained that this matter had been discussed at the last sitting of the League. The International Postal Union at Bern, at the instance of Czechoslovakia, submitted a proposal that the word "Esperanto" should be added to the list of "plain" languages recognised for

international transmission. Eleven states voted in favour, and twelve against. It would suffice if two states who had not voted now signified their consent to having the regulation modified. In their own limits many countries recognised Esperanto as a "plain" language, notably Great Britain, since 1907.

The Tourist Organisations were heard during the fifth sitting. The Czechoslovakian delegate said that it no longer sufficed to print information in five or six languages. The number grew with the needs; likewise, the cost of printing and translation. Much money would be saved if only the chief languages were used, with an Esperanto summary, or even solely in Esperanto, for those nations who did not speak the most widely-known languages. Tourist Bureaux had already printed guide books in Esperanto regarding about 400 localities in Europe. His ministry had found that matter printed in Esperanto and distributed by the International Organisation of the U.E.A. reached an attentive reading public in all lands, reached the Press of many countries and had proved the cheapest and most effective means of advertising.

The delegate of the Italian Chamber of Commerce, Morocco, reported that a party went from Milan to Finland, using Esperanto during the whole trip, and availing themselves of the services of the delegates of the U.E.A.

The delegate of the Tourist Association, Annecy, had similar experiences with a party from Lyons to Czechoslovakia. Such a trip would be difficult and costly without Esperanto and its organisation.

Several delegates spoke of the utility of Esperanto for hotels, and recommended to the U.E.A. the restoration of mention in the Year Book of various grades of hotels.

The delegate of the Chamber of Commerce, Kanana (Mexico) asked the Conference to recommend the instruction of Esperanto to hotel employes, because many persons travelled from Central and South America to Europe, and seldom found hotel servants capable of conversing in Spanish or Portuguese, whereas Esperanto was very easy and immediately understood, almost without learning, by Spanish-speaking people and by Brazilians.

Having heard what the various delegates had to place before the Conference, the final sitting was devoted to framing and placing on record the recommendations of the Conference.

The delegate and ex-president of the French Chamber in London summarised the discussions on the resolutions presented. The long list of important corporations which supported the proposals of the Paris Chamber had surprised him. He had taken part in many international Conferences in which there was nearly always confusion and difficulty. They wasted time, killed interest and created embarrassment. The present Congress was the best that he had ever attended. All delegates, though coming from different countries, spoke the same language, and had no fear of making grammatical errors. The majority spoke as fluently and as easily as in their own language. The speeches were fully understood, and the unity and rapidity of the labours of the Congress were remarkable. He himself, though he had not previously spoken much in Esperanto, had enjoyed agreeable conversation in that language with the other members of the Conference. He moved the acceptance by the Conference of the following resolution submitted by the Chamber of Commerce, Paris:—

"Whereas international trading would be greatly facilitated by the use of an international auxiliary language;

"Whereas such language must not be in any way detrimental to national languages, intimately associated with the history of every land, and richly endowed with literary masterpieces;

"Whereas, on the contrary, the auxiliary language must be a means of intercomprehension between the nations, it is therefore necessary that it should be acquired by an easy and practical method;

"Whereas many commercial firms and fairs in all countries of the world have made successful use of Esperanto in correspondence, international advertising and general negotiations;

"Whereas Esperanto has every desirable quality of clarity and simplicity from the points of view of pronunciation, of grammar, of vocabulary, and of richness of expression, the International Commercial Conference in Venice expresses the following recommendations:—

"1. That instruction in Esperanto be introduced into the commercial schools of every country.

"2. That Chambers of Commerce, Trading Corporations, and Tourist Bureaux wishing to facilitate international trade and travel should help to hasten the use of Esperanto as an international auxiliary language.

"3. That Chambers of Commerce, which are as yet not convinced of the necessity of the first and second proposals should, at least, consider the matter and carry out a series of tests."

The delegate of the General Commercial Chambers of Peking and Tientsin seconded the resolution in their name and on behalf of the Chinese Chambers of Commerce of Siam and Macassar, who had given him the same instructions. Chinese merchants needed and desired to trade with European traders if they could but overcome the language difficulty, which was the chief stumbling block.

Other delegates having spoken, the resolution was unanimously carried.

The president of the Interfair Commission said that during the week they had held a separate Conference, at which Esperanto only had been spoken. The war had shown that the world was an economic whole, and a partial progress or partial failure not only affected one part, but the whole organism. The fairs not only reflected the economic life of their lands, but helped to restore the international exchange of products. They had been the first to realise the universality of commerce, and so they had been the first to show the way in the use of a practical auxiliary language. For them, Esperanto was no longer an experiment, but a language which had proved its fitness. To express their satisfaction with such a useful instrument the delegates representing the 18 fairs present desired to publicly communicate to the Commercial Conference the following resolution, which they had unanimously carried:—

"The fairs of Barcelona, Bordeaux, Breslau, Budapest, Frankfurt, Helsingfors, Leipzig, Lubljana, Lyon, Malmo, Milan, Padua, Paris, Prague, Reichenberg, Valencia, Vienna, and Zagreb, meeting in Venice during the International Conference for a common commercial language, interchanged during three sittings their experiences of the practical use which they had made of Esperanto for international advertising, for correspondence, and for intercommunications and conference between them—

selves, and unanimously attest that Esperanto is the most fitting, simple, and economical means of international communication, and recommend that it be brought into general use."

The resolution was added to the records of the Conference, with mention of the declaration to precisely the same effect sent by the Basel Fair.

[To be concluded in next issue.]

[This account is summarised from the verbatim Esperanto report published in "Esperanto," the official organ of the U.E.A., to which journal we express our acknowledgment.]

MELBOURNE SECTION, U.E.A.

A most enjoyable evening was spent, when secretaries of several suburban groups were present and gave encouraging reports of steady progress. The sale of gifts resulted in the funds of the "Suda Kruco" being augmented by the very satisfactory sum of £5/15/5.

RECENZOJ.

ALEGORIOJ EL LA NATURO, de Margaret Gatty, el la angla lingvo tradukis George Gordon (Gego), F.B.E.A.; Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Street, London. Aĉetbla ĉe A.E.A., Box 731, P.O., Elizabeth Street, Melbourne, 1s. 2d.

Eldono el 1000 ekzempleroj aperis en 1913 kaj antaŭ longe estis elvendita. Nun ni havas duan eldonon pligrandigitan de la aldono de la alegorioj pri la nuboj,—La Ronda de Benado,—kaj pri la arboj,—La Leĝo de la Arbaro. Mi varme rekomendas ĉi tiun libreton al ĉiu amanto de la naturo. Al la Aŭstralaziaj Esperantistoj la libro devus esti speciale interesa, ĉar la tradukinto estas bone konata inter ili kiel lerta, penema studento de Esperanto, la senco de kies skriboj ĉiam estas klare videbla. Pro la lertega maniero en kiu multaj anglaj parolturnoj estas esperantigitaj la Alegorioj meritas la zorgan tralegadon de la serioza studentaro.

(C.W.B.)

THROUGH THE JOKE IN CLASS. Geo. Collingridge. Aĉetbla ĉe la aŭtoro Hornsby, N.S.W., Australio. Prezo 5s.

S-ro. Collingridge verkis jen alian libreton el la amuza speco kiun li faris sian propran. Ĝi estas ferakonto kaj temas pri Aŭstralio, ĝia bestaro kaj Alice. Nuntempaj Sidnejaj problemoj estas humore pritraktataj kaj aludoj al Esperanto ofte troviĝas en la teksto; Multaj bildoj plibeligas la libron kiu vere estas tre altgrada kaj bona specimeno de la presarto.

(C.W.B.)

HERMANO KAJ DOROTEO.—J. W. von Goethe. Eposa idilia. El la Germana originalo tradukis B. Kuster, kun antaŭparolo de Prof. d-ro. Dietterle, 77 paĝoj. Ferdinand Hirt and Sohn, Leipzig.

Ankoraŭ unu fojon la eldonantoj de la Internacia Mondliteratura Kolekto faris saĝan elekton, publikigante tradukon de Hermano kaj Doroteo. Oni ne povas scii la germanan literaturon ne konante Goethe, kaj same tiu ne konas Goethe kiu ne legis ĉi tiun verkon. La idilia, simpla historio de iuj malfeliĉuloj, kiuj lasis la patrujon je la franca revolucio, rakontita de vera poeto en digna heksametra formo ĉarmis samtempojn ne malpli ol posteulojn. Al Schiller ĝi ŝajnis perfekta. La temo, do, plaĉos al esperantistaj legantoj same kiel al germanoj, kaj feliĉe la tradukinto estas poeto, kiu per la sama metro kiun Goethe uzis, kaj per sia simpla lingvaĵo alproksimigis la tradukon kiel eble plej multe al la originalo.

(B.C.B.)

HEBREAJ RAKONTOJ. — Salom-Alehem: Perec. El la hebreaj originaloj tradukis I. Muĉnik. Ferdinand Hirt and Sohn, Leipzig.

El la du aŭtoroj kies verkoj estas ĉi tie tradukitaj, Salom-Alehem estas popola humoristo, kiu ridas pri siaj samnacionoj ne mokeme, sed helpeme, tiel ke li estas legata en ĉiu domo kaj de ĉiu familio, kaj Perec estas moralisto kies celo estas prezenti al la mondo la veran judan karakteron kiun multe da homoj ne komprenas aŭ ne volas kompreni. La originala lingvo de ĉi tiuj historietoj ne estas la klasika hebrea lingvo, sed la popola juda, kaj rilate al tio ĉi la tradukinto ĝojas ke Esperanto estas sufiĉe fleksebla por plene esprimi ĉiujn la intimaĵojn kiujn popola lingvo necese posedas. Per tiu ĉi libro ankoraŭ unu ĉambro de la mondliteratura domo estas malfermita al ĉiuj.

(B.C.B.)

HISTORIO DE ESPERANTO. K. Bruggemann, Universala Biblioteko No. 3, Friedrich Ader, Dresden, 18.

Ĉi tiu libreto el 160 paĝoj estas tre oportuna libro, ĉar ĝi enhavas la paroladojn de Doktoro Zamenhof ĉe la unuaj sep kongresoj, mallonga skizo de la mondlingva problemo kaj la interesege historio de Esperanto en la fruĝoj. Ankaŭ troviĝas la propono de D-ro Zamenhof pri la organizo de niĝ Kongresoj kaj kelkaj aliaj liaj leteroj kaj lia antaŭparolo al la "Fundamento." La oficialaj institucioj estas priskribitaj kaj sub rubriko—La progreso de Esperanto post la mondmilito ĝis nun—la plej lastaj venkoj de Esperanto estas cititaj. (C.W.B.)

KRONIKO.

MELBURN, V.—La Raciista Grupo Esperanta kunvenas ĉiun jaŭdon vespere je la oka, en ĉambro 7 ĉe la Temperance Hall, Strato Russell. La sekretario estas s-ro. Rutland kaj la prezidanto s-ro. Jozefo Skurrie.

Antaŭnelonge s-ro. Skurrie faris longan, interesan propagandan paroladon en la Empire Teatro pri la Babela Turo, kaj la deveno de la lingvaro. Li parolis pri la elpensado de mondlingvoj kaj pri Esperanto kiel la plej taŭga Internacia Lingvo por la tuta mondo. La aŭdantaro estis tute interesata kaj laŭte aplaudis. Ĉe la fino de la parolado estis multaj demandoj pri Esperanto, kaj kelkaj el la aŭdantaro decidis aliĝi al la Raciista Grupo.

WHANGAREI, Nov-Zelando. — La sekretario raportis, ke, ĉe la fino de la jaro, la membraro estis dekdu. Dum la jaro estis kurso por lernantoj kaj alia por pliprogresintaj membroj. En la nuna jaro oni esperas havi ankoraŭ unu klason. La Manifesto de Instruistoj estas sendita al lernejoj kaj universitatoj. Multaj ĵurnaloj publikigis erojn senditajn de la grupo. En la jara kunveno la raporto estas akceptita kaj la grupo unu fojon plu aliĝis kun la A.E.A. Nunaj oficistoj estas:—Prezidanto, s-ro. D. Tilly; Kunsekretarioj, s-roj. W. H. King kaj C. Weymouth; Kasisto kaj Konsilantano de A.E.A., s-ro. W. H. King; Komitato, la suprenomitaj oficistoj kaj f-inoj. Tilly kaj Orme.

PALMERSTON, NORDA, Nov-

Zelando.—Sinjoro Roderick Ross instruas klason en la teknika lernejo, laŭ permeso de la Nov-Zelanda Registaro.

SEYMOUR, V.—D-ro. F. J. Williams paroladis pri Esperanto antaŭ la instruistoj kaj lernantoj de la Altlernejo.

PERTH, Okcidenta Aŭstralio.—S-ro. Saar skribis—Laŭ la Kongresa rekomendo pri uzo de senfadena telefonio por esperanta propagando mi havas plezuron diri ke mi interesigis kelkajn amatoroj de radiotelegrafio kiuj promesis legi artikoletojn dum la elprovado de siaj radio-aparatoj. Tie ĉi ankoraŭ ne ekzistas dissenda radia stacio. Baldaŭ mi esperas doni al vi difinitan raporton pri radiofono.

EDZECO EN ZULUOLANDO.

La altaj vivrimedaj kostoj, malfaciligaŝ, poligamion ĉe Zuluolando. Tiu estas laŭ la raporto de la dana verkisto, Olaf Linck, kiu restis jam unu jaro en tiu lando. Bona edzino kostas je la nuna tempo ok bovojn, kaj la marketo estas tiel firma, ke multaj patroj vendas siajn filinojn per la part-paga sistemo. La viro pagas unu bovon kiam la virino alvenas, kaj poste po unu semajne. Kiam la aĉetanto ne pagas la partpagon akurate, la patro revenigas la filinon hejmen. La edzoj entute ŝatas tiun ĉi avantaĝon, ĉar se ili ne estas kontenta pri la edzino, post edzeco de unu aŭ du semajnoj, ili rifuzas plu pagi.

Kunveno de Naciaj Societoj

Konstanta Reprezentantaro de la naciaj societoj por la propagando de Esperanto havis sian unuan kunsidon en Venezia London, 2 de aprilo sub prezido de D-ro Privat, prezidanto de la Svisa Esperanta Societo.

Ĉeestis oficialaj reprezentantoj de la brita, ĉeĥoslovaka, itala, franca, germana, hungara, urŭgvaĵa, svisa kaj germana en Ĉeĥoslovakio societoj.

UEA estis ankaŭ oficiale reprezentata. Konsente kun ĝiaj delegitoj, la kunsido unuanime starigis komunan liston de ses kandidatoj al la Centra Komitato, laŭ la decido de la Universala Kongreso en Helsingfors. Tiu listo estos submetata al konfirmo de la naciaj societoj per la prezidanto de la K. R.

Letero estis tuj sendita al Generalo Sebert por komuni al li la rezultaton

de la kunsido kaj ankaŭ por proponi ke li bonvolu cedi la gardadon de la biblioteko de la Centra Oficejo en Parizo al la zorgo de la nova Centra Komitato, kiu ricevis de naciaj societoj sufiĉan garantian por pagi almenaŭ minimuman luon de sufiĉa ĉambraro por ke la biblioteko konservigu en estontaj jaroj. Oni petos Generalon Sebert fiksi mem la daton kaj kondiĉojn de tiu cedo, kiam li deziros akcepti ĝin. Samokaze la K. R. esprimis al li la unuaniman dankemon de la esperantistaro pri la senlaca kaj valora helpado al la esperantista movado.

NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 14 junio ni ricevis la jenajn sumojn:—L. Bagot, 4/6; Elvery, 4/6; H. V. Tilbury, £1; Henry, 4/6; J. B. Galloway, 4/6; E. Forsham, 4/6; B. K. Blythe, 4/6; G. Mercer, 4/6; Marshall, 4/6; H. N. Love, 4/6; S. Giles, 4/6; H. S. Rienits, 5/-; N. Grant, 5/-; L. Fosto, 5/-; R. Nielson, 5/-; Fourth Congress, £6/1/-; M. Cohen, 4/6; G. Meyer, 5/-; A. Martin, 10/-; E. Turner, 7/6; A. Saar, 5/-; E. Chisholm, 4/6; S. G. Redfern, 4/6; F. Koeppen, 4/6; W. E. Jones, 9/-.

Por Garantia Fundo: M. Holdenson,

1; K. Madrigalo, £1; "Anonima," £1; J. Skurrie, 2/-; P. Predl, 2/6; C. C. Dornbush, 10/-.

Dankojn!

ANTAŬ-KONGRESO EN PARIZO.

Pro malbonaj cirkonstancoj, la Komitato de la antaŭ-kongreso en Parizo dum Julio, 1923, decidis ne organizi internacian antaŭ-kongreson tiu-ĉi jaro.

CENTRA ESPERANTO LIBREJO.

En la jara ĝenerala kunveno de akciuloj de la Anonima Societo "Centra Esperanto-Librejo" la bilanco, perda kaj gajnakonto estis aprobitaj kaj la dividendo fiksita je 5½ per cent. (antaŭan jaron 6 per cent.). Kiel komisaro estis reelektita S-ro J. L. Bruyn en 's-Gravenhage.

S-ro. Siegfried Krafczyk, filo de pogranda komercisto, deziras korespondi pri koloniaj produktaĵoj kaj konservaĵoj aŭ aliaj temoj, Gahitzstrasse, 32/1, Breslau, VII., Germanujo.

S-ro. Bela Jukl, x Holgy-u 48, Budapest, Hungarujo. Tre volas korespondi kun ge-samideanoj aŭstralianaj, L.I.P.

Spend your next Holiday on Phillip Island

The Ideal Tourist Resort. 6 hours from Melbourne by boat and rail.

The New and Modern Accommodation House—

"REDCLIFFS," NEWHAVEN

will meet you every wish.

ACCOMMODATION FOR 50 GUESTS. FIRST CLASS TABLE.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Snooting. Picnic Parties Arranged. General Store on Premises. Every Attention to Visitors.

Esperanto Spoken in the House.

For Full Particulars write to—

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 37.

Melburno (*Melbourne*), Australio.

10 Julio, 1923.

BRAZIL PRO-ESPERANTIST.

The Minister for External Affairs and the Minister for Home Affairs were honorary presidents of the last (7th) Brazilian Esperanto Congress. The recent Congress of Brazilian Chambers of Commerce recommended the instruction of Esperanto in commercial schools and its use in correspondence with foreign chambers of commerce. The second American Congress for Economic Distribution and Commerce, held in Rio de Janeiro, placed on record its conviction that in order to facilitate commercial relations it is necessary in all American countries to introduce Esperanto into the programme of commercial instruction.

ADVANTAGES OF ESPERANTO.

The advantages of having a knowledge of Esperanto when travelling in foreign countries have been demonstrated time and again by Australians who have been abroad, but when these advantages are experienced in our own country we are more apt to sit up and take notice.

On its last trip there arrived on the "Orsova" three travellers from Switzerland, who could not speak a word of English. That this is a great hindrance cannot be denied, but in this case the situation was saved by

one of the travellers being an Esperantist. At every port of call Esperantists were on the wharf to greet him, show him and his fellow travellers the various sights, etc., etc., and at Sydney Esperanto helped them to get their luggage passed through the Customs more rapidly than if they were left without assistance.

Esperantists of all lands are a practical people, as is shown by our organisation, the Universal Esperanto Association, which has members in 57 different countries. These, from among their numbers, elect a delegate and vice-delegate, whose functions are defined by the rules and regulations of the association. Assistance to travellers and international commerce is their chief duty.

The addresses of these delegates are issued in book form for the benefit of delegates and members. At the present time there are more than 1000 delegates in various cities and towns throughout the world.

"La Revuo Orienta" has the following paragraph:—"On the 5th March Mr. Stanton Brown, an English business man, visited Kioto. We were able to spend an agreeable day with him." So, at least, one wide-awake English trader is utilising Esperanto to push business in Japan!

COMMERCIAL CONFERENCE IN VENICE.

[Continued from last issue.]

The delegate of the Belgian Chamber of Commerce, London, summarised practical proposals submitted during the fourth sitting, and read a communication from the president of the Universal Esperanto Association, accepting similar suggestions. He, therefore, proposed the following resolutions:—

"1. That the U.E.A. be requested to publish in its year-book, or separately, a classified list of traders ready to correspond in Esperanto."

"2. That the U.E.A. be requested to publish commercial information in its paper, and as soon as possible to publish a commercial supplement thereto."

"3. That the U.E.A. be requested to compile commercial information, classified according to commodities and countries, and distribute it by sale."

"4. That the U.E.A., through its delegates throughout the world, bring Esperanto under the notice of merchants, hotelkeepers, and tourist offices and agents and obtain concessions to Esperanto users."

"5. That the U.E.A. be requested to bring under the notice of exporters the admirable clearness of Esperanto roots for wireless telegraphy. By abbreviations, easily understood by telegraph users, Esperanto would be able to partly supersede the codes customarily used by large concerns. The use of Esperanto saves money and avoids error."

"6. That the U.E.A. be requested to select from its delegates fitting persons to operate the above services. That the U.E.A. be requested, when necessary to inaugurate a more ample organisation, and place at the disposal of traders the personnel and installation deemed desirable."

The resolutions were unanimously accepted and sent to the U.E.A., with the hope that its delegates would secure sufficient support to realise the expressed desires.

The following proposition by the Chamber of Commerce, Paris, was unanimously adopted:—

"That the U.E.A. be requested to supply the names of all commercial users of Esperanto to the compilers of commercial directories in all lands, asking that they signify Esperanto traders in a similar manner to the 'Bottin' directory, Paris, by prefixing a star to the name."

The delegate of the Annecy Tourist

Office summarised the facts presented to the Conference in connection with the use of Esperanto by tourist offices. He proposed the four following resolutions:—

"1. The International Conference for a Common Commercial Language, in view of the successful results already obtained and the great number of guide-books already published in Esperanto, recommends tourist offices, agencies, and publishers to print guide-books in that language, or, at least, to devote some pages to a summary of their guide-books printed in their own language, as that is the most economical means of making known the attractions of any city or district in any country."

"2. The Conference invites hotelkeepers and kindred associations to introduce the teaching of Esperanto in their schools, and to have the language taught to their staffs."

"3. The Conference expresses the desire that tourist organisations should be urged by the U.E.A. to publish uniform size guide-books, arranged in accordance with the experience already gained, having consideration to the present situation and to the effective value of the publicity."

The resolutions were unanimously adopted.

The delegate of the Radio-Electric Society summarised the information submitted regarding "wireless," and the delegate of the General Union of Technical Scholars in Industry and Commerce reported regarding the permission to use Esperanto as a "plain" telegraphic language. They submitted the following resolutions:—

"This Conference, in which representatives of the Radio-Electric societies participated, attests that the world-wide spread of wireless telegraphy necessarily requires a means of overcoming the barriers of language, and recommends the use of Esperanto for communications destined for international listeners."

"The Conference expresses the desire that Esperanto be everywhere immediately recognised by telegraphic authorities as a normal language, under the 'plain' language rate. It recommends Chambers of Commerce and Esperanto societies to urge their central telegraphic authorities to write to the International Postal Union in Bern, intimating their consent to the addition of Esperanto to the list of accepted languages, as 11 countries have already done."

Both resolutions were carried without dissent.

The delegate of the Padua Chamber of Commerce moved:—

"That the Conference forward to the International Commercial Chamber the resolution of the Paris Chamber of Commerce just unanimously carried, and request that the subject be put upon the agenda for the coming Congress of the International Commercial Chamber."

The resolution was carried unanimously.

The delegate of the Roumanian Commercial Ministry reminded the Conference that the League of Nations had officially adopted the report of its general secretary after careful discussion and modification by a technical commission. That report attested the use and spread of Esperanto and its fitness for written and spoken communication, but the League decided to submit the question of its instruction in schools to its Intellectual Commission, for its opinion of the language problem. Above all else, that affected commerce and travel, and as the Commission was composed solely of scientists and litterateurs, it was the duty of the Conference to inform the Commission of the experience and desires of those directly interested—the practical men of commerce. Therefore, he presented the following resolution, not as a Government delegate, but personally, as the head of a very large business. The resolution is as follows:—

"The Conference respectfully draws the attention of the Commission for Intellectual Co-operation, deputed to further study the question of teaching Esperanto in schools and the various aspects of the auxiliary language problem to the following points":—

"The commercial world and travellers are primarily interested in the urgent need of a practical help language to facilitate trade, travel, and correspondence. That help language must be neither the language of any particular people, nor Latin, on account of the difficulty of learning, and archaism. The international fairs and many commercial concerns in all countries, have already successfully used Esperanto for international advertising, correspondence, and conferences, because of its neutrality and ease of acquirement. Therefore, the most practical solution of the difficulty is to encourage the use and instruction of Esperanto, as many important organisations and this Conference have

done, after having proved the fitness of Esperanto."

The resolution was unanimously passed.

The delegate and director of the Commercial School of Odense, Denmark, was pleased that the Paris Chamber had taken the first step, and that the Italian Chamber for Switzerland the second. It was now the turn of the British, who should take over the task of making known the results of the Conference to the whole world. He proposed:—

"That the British delegation of the Conference endeavour to arrange that the commercial organisations of Great Britain should make known the results of the Conference to Chambers of Commerce throughout the world. Further, that the Conference request the British delegation to organise an international experiment in instructing Esperanto to commercial men of different nationalities."

The delegate of the Roumanian Foresters' Union said that, having come as an observer, he wished to express his admiration of the perfect operation of Esperanto as a language spoken and easily understood among the delegates from various nations.

The delegate of the Chamber of Commerce, Bucharest, reported upon the International Merchandise Exchange ("varborso" from "varo," wares; "borso," an exchange), which had been initiated by 40 traders attending the Conference. Sixteen orders had been negotiated. Esperanto had proved thoroughly fitting for all their negotiations, and many delegates had a double reason to be satisfied with their trip, for they had made a profit from the immediate use of Esperanto, as well as doing their best to extend its general use.

The President thanked the authorities of Venice for their hospitality, the Chamber of Commerce, and the Italian Chamber of Commerce in Switzerland, for their initiative. The Conference had been a great success, and would bring incalculable help to traders in all lands by affording them the long-desired means for untrammelled and direct intercommunication.

The representative of the Chamber of Commerce, Venice, in responding, said that the Conference had opened the eyes of the sceptics, and shown that the solution of a world problem had been discovered and satisfactorily

tried out. It now only remained to make that solution widely known.

The general secretary of the Italian Chamber for Switzerland said that he was fully convinced of the merits of Esperanto. He had never anticipated that the language could be used so readily and fluently. At the "varborso" the negotiations had been carried on with as much facility as if each participant had been speaking his mother tongue. Some of the speeches of the Conference had been really eloquent, and had charmed the ears of the Italians. Esperanto was as musical and harmonious as a southern language. The Conference had conclusively shown that the general use of Esperanto was desired not only by those corporations represented at the Conference, but by a large number of Chambers of Commerce and other institutions who had not participated in the Conference, but had expressed their approval by letter.

The general use of this practical world language would be a definite victory of human reason over one of the most harrassing of barriers which have, until now, hampered international commerce.

[This account is summarised from the verbatim Esperanto report published in "Esperanto," the official organ of the U.E.A., to which journal we express our acknowledgment.]

HERE AND THERE.

The Japanese papers are progressive. The "Japan Chronicle" has an Esperantist—Mr. J. A. Brailsford, an Australian—on the staff. After an address given by him to the Kobe foreign residents' Ramblers' Club, it was decided to commence the study of Esperanto.

The Hiroshima Higher Normal School has commenced a course of Esperanto with 70 students. A daily class in Amaki has an attendance of 150.

A class of 450 has been started in Tokio under the auspices of the Tokio "Asahi" newspaper and the Imperial Educational Association. Many would-be participants had to be excluded owing to lack of room, though some were very insistent, saying they were quite prepared to stand throughout the lessons.

The Commercial Industrial School, Kobe, in April commenced a six-months' course in Esperanto.

Despite the general misery throughout Austria, as the result of its depreciated currency and consequent lack of employment, Esperanto is making excellent headway. Latest reports show that 4714 persons are now learning Esperanto. From the town of Gratz alone 40 persons are going to the Nurnberg Congress. One group consists of composers, who intend to form an Esperanto Compositors' Club. In Hainburg the Good Templars' Lodge is studying Esperanto. In Modling, near Vienna, a class of 32 consists chiefly of policemen. In Wels the pupils include bank officers. Throughout Austria school and municipal buildings are placed at the disposal of Esperanto groups.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—S-ro. Drummond, el Melburno, nun en Anglujo kun intenco ĉeesti la Nurnbergan Kongreson faros paroladojn en Esperanto pri Aŭstralio en Belgujo, Francujo, Italujo, Svisujo kaj Svedujo. Li parolos pri Aŭstralio celante allogi migrantojn kaj penos starigi komercadon en Aŭstraliaj produktaĵoj. Liaj paroladoj estos ilustritaj per lumbildoj.

Fraŭlinoj Johnson kaj Lewis, Kana-daj lernejinstruistinoj, kiuj pasigis kelkan tempon en Aŭstralio studante niajn instrumetodojn reiris al Kanado. Ili tre interesigis pri Esperanto kaj dum ilia restado en Melburno ofte ĉeestis la Melburnan Klubon.

Dum la lastaj tagoj anoj de la Esperanta klubo Melburna paroladis en kelkaj lokoj. Al la Camberwell Filio de la A.N.A. al la kluboj por Junaj Viroj de la Presbiteriana Eklezio ĉe Camberwell, al la infanoj de la plej alta klaso kaj la geinstruistoj ĉe la Surrey Hills Ŝtatlernejo, kaj al la Y.W.C.A. ili alportis la Esperantan lumon. Ili sentas, ke ili faris bonan laboron. Ankoraŭ estas strange kiel malklare la scio pri Esperanto daŭras. La Esperantistaro devos ĉiam trafi okazojn por paroladi pri la lingvo.

DARGAVILLE, Nov-Zelando.—Nova grupo nun kunvenas ĉi tie. S-ro. R. Pope estas sekretario.

BELGRAVE SOUTH, V.—Pro la gastemeco de Sinjorino Elvery, el Lockwood, South Belgrave, kiu pruntedonis dometon por semajnfino, 16 junion, dek Esperantistoj propagandis ĉe la Lockwood Hall, kie s-roj Pyke kaj Rawson montris lumbilde la propagandilon “Tra Centra Eŭropo per Esperanto.” Estas kelkaj bonaj esperantistoj ĉe South Belgrave, inter ili estas pioniroj de nia movado ĉi tie en la personoj de Sinjoro Gossler, kaj f-ino Giles, instruantino al grupo filiigita al A.E.A.

INFORMO POR LA INTERNACIA FOIRARO.

Dum la lastaj tri jaroj ni ricevis multajn cirkulerojn, presaĵojn, afiŝojn kaj aliajn reklamojn pri Foiroj. La plimulto de ĉi tiuj atingis nin nur kiam la koncernataj foiroj jam estis pasintaĵoj. En la nuna semajno ni ja ricevis cirkuleron pri foiro kiu okazis en majo. Kompreneble, ĉiuj ĉi tiuj cirkuleroj en la cirkonstancoj ne faris ian utilaĵon, kaj la mono por iliaj presigo kaj forsendo senutile estas elspezita. La gvidantoj de la foiroj devas memori, ke la forveturo al Aŭstralio okupas kvin ĝis ses semajnojn kaj ke, se niaj komercistoj deziras iamaniere profiti rilate la foirojn ili devas havi la tempon aŭ vojaĝi, aŭ skribi, al la foiro. Tio postulos aliajn ses semajnojn, do, la foiraro devas forsendi siajn reklamojn ktp. pli ol tri monatojn pli frue ol nun. La samaj rimarkoj aplikos al la Malproksima Oriento kaj al Suda Ameriko. Kvantkam bonaj rezultoj eĉ nun sekvis la uzon de Esperanto de la Foiroj, oni povas facile vidi, ke, se la eksterlando estas pli frue sciigata, ke egalaj bonaj rezultoj venos el lokoj kiuj ĝis nun, pro manko de la bezonata tempo, ne partoprenis aŭ iamaniere subtenis la foirojn. Nia intereso en Esperanto kaj deziro helpi al la foiraro instigis nin meti ĉi tion sub ĝia atento.

Schiller.

Kiam li estis juna, la konata germana poeto Schiller lernis ludi harpou. Amiko diris al li:

“Vi ludas kiel David, sed ne tiel bone.”

Schiller respondis:

“Vi parolas kiel Salomono, sed ne tiel saĝe.”

“LA KATALO.”

Raportoj aperis de tempo al tempo, ke kolosa eksperimento en hibrideco okazis en Kanado. Estas raportita ke la bisono nun estas hibridigita kun la ordinara bovo, kaj naskema hibrido estas la produkto, kiu estas pli bona ol aŭ la bisono aŭ la bovo por utileco laŭ la homa vidpunkto. Senatano Sir Georgo Foster, el Kanado, jam donis interesajn detalojn al Sir James Barrett. Ŝajne la amerika bisono estis preskaŭ ekstermita, ambaŭ en Kanado kaj Usono, inter unu mil kaj du mil ankoraŭ sin trovas en Usono, kaj la Kanada Registaro estis tiel bonŝanca ke ili povis aĉeti sep cent, de privataj posedantoj. La bisonaro pligrandigis ĝis ili numeris preskaŭ sep mil, kaj tiu pligrandigo ebligis la eksperimenton. La laboro de hibridigado de la virbisonoj kun bovinoj komencis en la jaro 1894, kaj estas en la lasta tempo pli vigle ellaborata. La produkto de la unua hibridigo oni nomas hibridon kaj al la ido de du hibridoj oni donas la nomon, katalo.—kunmetigo de la anglaj vortoj “cattle,” bovoj kaj “buffalo,” bubalo.

En norda Kanado estas multe da lando kun severa klimato, kie okazas neĝventegojn. La ordinaraj bovoj vagas antaŭ la neĝventegoj, sed la bisono kaj la hibrido povas kontraŭstari ilin, kaj, ankaŭ, estas imunaj kontraŭ la infektaj malsanoj. La felo de la katalo estas simila al tiu de la bisono laŭ kvalito, daŭreco, dikeco de la haro, kaj varmece, kaj oni taksas la valoron je dudek funtoj. Tiuj ĉi bestoj bone sin paŝtas, ili elserĉas al si la nutraĵon, kaj prosperas en herbmalriĉaj kampoj, kaj dum la vintro ili elserĉas la herbon de sub la neĝo. La sola nutraĵo kiun oni donas al ili estas fojno, kaj tiu nur dum la plej severa vetero, kiam la neĝo estas la plej profunda. Cetere la viando ŝajne estas tre bona. Estas evidente ke se fiksita tipo de katalo povas esti produktata, ke Kanado povos aldoni multe al sia riĉeco per la produktado de tiuj bestoj sur lando kiu ne taŭgas por aliaj celoj. Kontraŭe, tamen, al la eldonitaj raportoj, nek la eksperimentoj estas kompletaj, nek decidigaj, sed tamen ili estas sugestaj.

La plejmulte de la unuaj malfacilaĵoj estas venkitaj per la eksperimenta laboro de S-ro. Mosson Boyd. Sinjoro Boyd mortis en la jaro 1915, kaj de

tiam la Registaro daŭrigis la laborojn kun la katalogoj, kiujn S-ro. Boyd produktis. La malfacilaĵoj, kiujn li devis venki estis duoblaj. La rezulto de la unua hibridigo inter la virbisono kaj la bovino estis, ke multaj bovinoj kaj idoj mortis je naskiĝo, sed tiu granda mortado, ne daŭris en la sekvantaj hibridigoj. Plue, kelkaj el la unuaj hibridoj estas nenaskemaj. La problemo do estis produkti aron de naskemaj katalogoj, per la venkado de tiuj ĉi malfacilaĵoj. Tiun ĉi celon ŝajne oni jam atingis—almenaŭ parte.

La celon de la eksperimentoj oni montras kiel sekvas:—(1) Fiksi la tipon kaj produktecon de la katalo. (2) Bredi kaj elekti katalogojn por altvaloraj viandoproduktado, kaj dume konservi la altvaloron de la felo, kaj kapablon batali kontraŭ severa klimato. La intenco ne estas, tamen, loki la katalogojn ie kie la kampoj povas esti uzataj por paŝti bovojn. Detaloj estas citataj de diversaj specoj de hibridoj de bubalo kaj bovino, kaj ankaŭ de hibridoj kun la tibeta bovo. La eksperimento nun jam progresis sufiĉe por pruvi la kvaliton de la viando kompare kun la ordinara bovviando, kaj la verdikto estas favora al la katala viando.

Jen estas mallonge la speco de la eksperimento kiun oni nun ellaboras. La leciono lernota en Aŭstralio kaj alilandoj estas la absoluta malsaĝeco permesi ke la animalo estu ekstermigita. La bisono estis preskaŭ ekstermigita, kaj estas savita plejparte pro sentimento. Estas ne eble por iu ajn diri ke iu animalo, kiel ajn ŝajne neutila aŭ malgrava, ke ĝi ne povas fariĝi, je la tempo, grandvalora por la homa raso. Estas esence tial, starigi azilojn kaj rezervejojn en kiuj aroj de sovaĝaj animaloj povas esti konservitaj por ĉiam. Estas por tiu kialo ke la Nacia Parka Komitato nun vigle laboras. De la tuta mondo interesitaj homoj sin turnas al Aŭstralio.

Ekspedicioj estas sendataj por kolekti specimenojn de niaj animaloj, ĉar la aŭtoritatuloj en aliaj landoj estas konvinkitaj ke la absoluta ekstermo de multaj el la aŭstraliaj animaloj estas proksimega. Estas nia afero fari nian eblon eviti tian grandan katastrofon.—El la Melbourne Argus, 2 junio, 1923, Tradukis P. T. B. Hudson.

KOMENTARIO.

“Literatura Mondo” elsendis “S.O.S.” —Duonjaro pasis depost la ekiro de nia revuo. Eble do estas jam tepo ke ni parolu iom pri niaj ĝisnunaj spertoj, pri nia situacio, pri niaj perspektivoj. Ni mensogus dirante ke niaj revoj efektiviĝis. Ni imagis iel tiamaniere, ke Esperanto, kies evoluo dependas nepre de ĝia literaturo, certe bezonas literaturan gazeton, kie la boneco de la stilo estas garantiita per zorga kontrolo kaj laboro de kompetenta redakta komitato, gazeton, kiu per sia aspekto inde reprezentas nian lingvon kaj kiu tial estas unu el la plej bonaj propagandiloj. Sekve ni opiniis, ke la afero de nia gazeto estas komuna Esperanta afero. . . . Sed, konsiderante la ne privatatan, sed komunan gravon de la afero, ĉu ne estas strange ke oni apenaŭ citas, kelkaj gravaj gazetoj tute ne citas nian revuon eĉ inter la ricevitaj gazetoj. Kaj ni apenaŭ, aŭ eble tute ne legis kritikon, kiu povus konjektigi al iu, kiom diferencas nia revuo de la aliaj malgravaj folietoj, kiuj estas tie vaste pritraktitaj.

. . . Nia ĉefa klopodo estas la kiel eble plej granda *internacieco* de la revuo. Sed ĉi tiun celon ni povas atingi nur per la helpo de nia kunlaborantaro. Ĉiuj niaj rubrikoj estas je ilia dispono. Granda ĝojo estus por ni numero, en kiu neniu redakta komitatano havus eĉ unu streketon.

—Precipe mankas al ni interesaj noveloj kun forta karakterizo kaj frapanta tem-plekto. Ni pensas novelojn laŭ maniero de *Maupassant*. Same ni volus doni ankaŭ al la rido ĝiajn rajtojn.

La aprila ekzemplero havis artikolojn sub titoloj: “Kadavro,” “La ombro de l’patro el taglibro de frenezulo” kiuj plenigis duonon de la Revuo.

Mi certe konsilus la redaktoron, ke li iom gajigu la Revuon. Alie ĝi baldaŭ fariĝos kadavro same kiel la ombra patro de la frenezulo. La alia enhavo estas muziknotoj poemoj kaj aŭtobiografioj. Pri la stilo oni povas eldiri nur laŭdojn kaj se Revuo fariĝos pli internacia kaj havigos al si la mankantajn “interesajn novelojn” ĝi faros pli vastan allogon al la tutmonda Esperantistaro. —C. W. B.

SAVITA EL LA MARO.

Estis nokto, ventego muĝas laŭlonge la tuta angla marbordo. De tempo al tempo tra la mallumo signoj ekbrilas

de ŝipo, kiu baraktas kontraŭ la furiozeco de la vento, kaj ondoj, en malgranda distanco de la tero. Sur la marbordo estis bravuloj, kiuj pretigas la savboaton. La boato estas preta, ankoraŭ unu viro estas bezonata. Kiu iros? kiu helpos? Inter aliaj, kiuj estis sur la marbordo estis Nedĉjo Brown, kaj lia patrino. Nedĉjo, kiu estas bona fiŝkaptisto kaj maristo volas preni la lokon. Li kliniĝas ame al la patrino, kaj petegas—Ho, patrino, lasu min iri.

Jam ses monatoj, la patrino pensis, ŝi estas vidvino. Ŝia edzo estis fiŝkaptisto, kiu unu tagon dum la lasta printempo ekveturis en malgranda boato sur trankvila maro. Subite okazis terura ekventego, kaj la sekvanta mateno malgrandaj pecoj de la boato estis viditaj, sed la fiŝkaptisto ne revenis—kaj nun ŝi estas petata riski la vivon de sia knabo.

Kolera rifuzo ekvenis al la lipoj de la patrino, sed ŝiaj ĝenataj okuloj iras rapide al la senhelpa ŝipo; ŝi pensis pri la multaj vivoj, kiuj estas en danĝero sur ĝi, kaj pri la multaj hejmoj, kiuj estas minacataj de la perdo de la amatuloj; ŝi turnas sin al sia filo, kaj per voĉo tiel brava, kiel lia ŝi diris,—Iru mia filo, kaj Dio revenigu vin al la brakoj de via patrino.

Tiam lasinte rapide la marbordon, ŝi iris al sia soleca hejmo, pensante pri ŝia malnova malĝojo, kaj nova timo.

La mateno venas, la ventego estas pasinta, la koleraj ondoj supren ĵetas lanecajn kapojn super la malleviĝintan ŝipon.

La ŝipo malaperis, sed ne ĝia vivanta ŝarĝo. La savboato faris sian noblan laboron, kaj ĉiuj, kiuj estis en la ŝipo estas savitaj. La savitoj surteriĝis. Nedĉjo rapide foriris por informi la patrinnon pri lia sekura reveno; sed, kial li hezitas ester la pordo de lia patrino? Tra la tuta nokto li montris sin la plej brava el la bravaj. Kial li sin detenas de eniro? Apud li staras alta, lacigita viro, kiun li savis el akva tombo, kaj, kies okuloj, plenaj de kortuŝo, neniam forlasas liajn. Ĉirkaŭ la du homoj staras multaj vilaĝanoj etendante la manoj al la viro, kaj parolante afablajn vortojn al li.—Kiu kuraĝas diri al ŝi,—diris unu per voĉo preskaŭ sufokata de kortuŝo.—Mi faros tion,—kaj post minuto Nedĉjo eniris la domon, kaj estis en la brakoj de lia patrino.

— Patrino aŭskultu! Mi havas ion mirindan por rakonti al vi. Unu el la fiŝkaptistoj, kiun ni savis, estis viro, kiun la ventego kaptis antaŭ kelke da monatoj. Feliĉe, alilanda ŝipo vidis kaj savis lin dum ĝi vojaĝis al malproksima lando.

— Malproksime al sia hejmo, edzino, kaj amikoj, la viro devis forveli. Liaj amikoj kaj edzino priploris lin, kiel mortinton. Li atingis fremdan landon, kaj ekveturis denove en la unua ŝipo ironta al Anglujo. Lastan nokton li sin trovis en la apudeco de lia hejmo; sed ventego muĝis sur maro, kaj tero kaj ankoraŭ denove unu fojon la viro staris vizaĝo al vizaĝo kun la morto. Helpo venis laŭ lia bezono.

— Patrino, penu elporti la feliĉan veron. Kiam via brava koro—koro, kia, en la mezo de sia malĝojo, povis pensi pri la malĝojoj de aliaj, forsendis min lastan nokton—vi ne sciis—kiel vi povus scii? ke vi sendis min por savi la vivon de mia kara patro.—Pluaj vortoj ne estas parolitaj. Paŝo estas aŭdata: la savita viro staras ĉe sia kameno. Kun krio de ĝojo la edzino kuregas antaŭen kaj falis en lian brakojn. —Tradukis R. B. Bigelow.

ZAMENHOF MONUMENT.

It was decided at the Prague Congress that Esperantists should erect a monument over the grave of Dr. Zamenhof, in the Warsaw Cemetery. The committee that has the project in hand is making a world-wide appeal that should touch the hearts—and the pockets—of everyone interested in Esperanto. Coupon sheets, each containing twenty shilling coupons, have now reached Australia, and may be obtained from Mr. J. G. Pyke, 212 Swanston Street, Melbourne. Where this is inconvenient, inquiries should be made of local group secretaries, who will obtain the required number of coupons for intending subscribers.

Ce Pentristo.

“Kiom da tempo necesas, por pentri portreton?” juna sinjorino demandis pentriston.

“Tio dependas de la cirkonstancoj; se la afero estas pri belulino, tre longan tempon,” respondis la pentristo.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 30 junio ni ricevis la jenajn sumojn:—H. E. Neville, 9/-, ĝis junio, '24; J. G. Roberts, 4/6, ĝis februaro, '24; E. E. Lane, 5/-, ĝis septembro, '23; J. A. Moyle, 4/6, ĝis junio, '24; G. H. Jansen, 5/-, ĝis majo, '23; R. N. Crichton, 4/6, ĝis majo, '24; A. J. D. Cribb, 4/6, ĝis majo, '22; Hilda Lanyon, 4/6, ĝis januaro, '24; Harold Lanyon, 4/6, ĝis januaro, '24; Ivan Majstrovich, 5/-, ĝis marto, '24; H. H. Perrott, 4/6, ĝis majo, '24; H. Taylor, 4/6, ĝis oktobro, '23; E. S. Bigelow, 4/6, ĝis majo, '25; W. L. Waterman, 4/6, ĝis junio, '23; C. D. Boersma, 5/-, ĝis majo, '24; — Predl, 4/6, ĝis majo, '24; H. Ballentyne, 4/6, ĝis julio, '24; T. H. W. Goessling, 4/6, ĝis majo, '24; C. McKenzie, 5/-, ĝis julio, '24; T. H. Cameron, 9/-, ĝis junio, '24; J. Olen, 6/-, ĝis majo, '24; kontantaj vendoj, 24/3; reklamo, 1/-; Amerika Teo. £5/15/5.

GARANTIA FUNDO.

Dr. F. J. Williams, 5/-; A. R. Cohen, 7/6; R. N. Crichton, 5/6; H. H. Perrott, 5/6.

ESPERANTA TELEGRAFADO.

S-ro. Simon skribas:—En la raporto pri kongresa negoca diskutado ('Suda Krucio,' paĝo 78), oni legas, ke S-ro. Redfern proponis rezolucion pri Esperanta telegrafado, kion S-ro. Fosto subtenis.

—Parte tio estas ĝusta kaj parte mal-

ĝusta. Pro mia neevitebla foresto de la kunveno S-ro. Redfern anstataŭis min kaj evidente oni kredis, ke la rezolucio estis lia. Sed, ĉar mi jam delonge klopodis pri tiu temo, (eĉ en Nov-Gineo mi skribis pri ĝi al la Sekretario de la A.E.A.), mi tre ŝatus se korektaĵo povus esti presata en sek-vanta numero. Pardonu min se mi estas vana, sed Esperanta telegrafado estas unu el miaj "vundaj punktoj."

GAZETOJ RICEVITAJ.

Austria Esperanto-Raporto, n-ro. 3; Amerika Esperantisto, mar.; Belga Esperantisto, jan.-feb.; Esperantista Junularo, jan.-feb.; Esperanto Triumfonta, n-roj 123, 131, 132, 134, 136; Espero Teozofia, mar.-apr.; Export Esperantist, mar.; France-Esperanto, apr.-majo; Germana Esperantisto, jan.; Katolika Mondo, apr.; La Interligilo de l'P.T.T., apr.; La Nova Epoko, feb.; La Progreso, apr.; La Revuo Orienta, apr.; La Semisto, jan.-feb.; La Verda Ombro, apr.; Le Monde Esperantiste, mar.-apr.; Literatura Mondo, apr.; Pola Esperantisto, apr.; Sennacieca Revuo, mar., apr., majo; Skandinava Esperantisto, mar.-apr.; Tra La Literatura, majo.

Oni diras ke viskio mallongigas la vivon de drinkulo.

Jes, tamen li vidas duoble multe en la sama tempdaŭro.

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
 BONA ODORA SPIRO
 BONA RIDO
 BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
 by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.,

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penĉoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 penĉoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 38. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Augusto, 1923.

HERE AND THERE.

The City Council of Genoa have decided to teach Esperanto in the evening schools under its control.

The first lady Doctor of Law in Czecho-Slovakia is an Esperantist. Miss Andela Kozakova, a member of the U.E.A., and of the Prague Esperanto Club.

The Department of External Affairs in Sweden is experimentally making use of Esperanto by the publication, in *La Informilo* (supplement of "Esperanto," Geneva), of information regarding Sweden, its trade and resources. By getting translations of these items inserted in the Australian press our readers will help to demonstrate the usefulness of Esperanto, and also show the Swedish authorities that their efforts to obtain wide publicity have been successful. Press cuttings should be sent to *Sveda Esperanto-Federacio*, Stockholm.

Owing to the initiative of Lieutenant Kaŭaŝima, an Esperanto group composed of crews of submarines has been formed. The members are attached to the Japanese submarines numbers 18, 21, 42, and 43, and to the 15th torpedo boat squadron in Makoo, Formosa, and Sasebo. At the latter port Lieut. Aŭaja, of the Air Forces, is an active advocate for Esperanto.

A meeting in the public hall of the Commercial Review, "Les Echos," (Paris), discussed Esperanto and Wire-

less Telephony. S-ro. E. Archdeacon, presided, and amongst those present were S-roj. Berthelet, member of the Academy of Science; Aulard, ex-professor of the Sorbonne; Esnault-Pelterie, aeroplane manufacturer; Baudet, member of the Chamber of Commerce, Paris; Gueritte, ex-president of the French Chamber of Commerce in London, and G. Chavet. The latter gave a lesson in Esperanto to the 200 persons attending the meeting.

For the seventh time S-ino Farges has organised and superintended the display of a propaganda exhibit during the Lyons International Fair. Many visitors applied for information.

INTERNATIONAL LABOUR OFFICE.

Bulletins have been issued dealing with the proposed modification of the U.S.A. Constitution, so as to enable legislative action to be taken to protect child labor; regarding hours of labor in Japan; a summary of the two volume report of the Fourth Conference (Oct.-Nov., 1922); concerning payment of wages during holidays; and Japan and the international labor conventions. Lack of space precludes publication in "La Suda Kruco," but the reports are at the disposal of any reader interested, or who would make effective use of them.

LA VENONTA KUNSIDO DE LA INTERNACIA LABORA KONFERENCO.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Officejo, en ĝia kunsido okazinta en Genevo de la 10a al la 13a Aprilo, diskutis la daton de la venonta kunsido de la Internacia Labora Konferenco. Ĉiuj opiniis, ke kunvenas, pro praktikaj motivoj, ke la Konferenco kunvenu en la printempo anstataŭ Oktobro. Artikolo 389 de la Pakkontrakto postulas tamen ke la Konferenco, kunvenu almenaŭ unu fojon ĉiujare. Finfine, oni aprobis aranĝon okazigi kunsidon daŭranta ne plu ol unu semajnon en Oktobro 1923, kaj kunsidon kun norma daŭro en la lasta duono de Junio 1924.

Sekve la Kvina Kunsido de la Internacia Labora Konferenco malfermos en Genevo, London, la 22-an de Oktobro 1923, kaj havos en ĝia tagordo nur unu demando, nome, "Generalaj principoj pri organizo de laborinspektado."

La Administra Konsilantaro ankaŭ decidis meti en la tagordon de la Konferenco en 1924 la demandon pri nokta laboro en bakejoj. Tiu estas tre grava demando, kaj postulas ekzamenon laŭ ĉiuj vidpunktoj, kun komparo de la estanta leĝaro kaj la ekonomia situacio en diversaj landoj.

Oni ankaŭ decidis rememorigi la Statmentojn de la Internacia Labora Organizaĵo pri la devo, kiun Artikolo 405 de la Pakkontrakto metis sur ilin, proponi al iliaj kompetentaj aŭtoritatoj, por konfirmo, la projektojn de konvencioj balotitajn de la Internacia Labora Konferenco en la tempolimo de unu jaro, aŭ escepte 18 monatoj, post la fino de la kunsido de la Konferenco. (Informservo de la Internacia Labora Officejo.)

PRI FOIROJ.

Lastatempe alvenis esperante presitajn dokumentojn pri foiro en Malmo. Svedujo (30 julio ĝis 5 aŭgusto); Leipzig Aŭtuna Foiro, (26 aŭg. ĝis 1 septembro) kaj Reichenberg Foiro (11 ĝis 19 aŭgusto). Per havigi rezultatojn ĉi tiuj informiloj devis esti en Aŭstralio antaŭ trimonatoj. Se la cirkuleroj ne malfermas negocajn rilatojn ne estos la kulpo de Esperanto, sed tiu de la foirdirektantoj, kiuj ne ekspedas siajn cirkulerojn sufiĉe frue.

KRONIKO.

MELBURNO, V.—Ĉe la Temperance Hall, la Raciista Grupo Esperantista bonvenigis la ceterajn Melburnajn grupojn dum sociala vespero la 12an de julio. La sesdek samideanoj ĉeestantaj havis tre agrablan tempon, ĉu dancante, ĉu ludante, ĉu aŭskultante kantojn kaj muzikaĵojn, ĉu manĝante la tre bongustan manĝaĵon. Dum intertempo, la Prezidanto, s-ro Skurrie, klarigis ke la kunveno estis kvazaŭ adiaŭa festo en honoro al s-ro Rutland, la energia kaj entuziasma sekretario de la grupo, kiu baldaŭ foriros por loĝi en Sidnejo. S-ro. Skurrie gratulis la multajn reprezentatojn de grupoj kunligitaj al la A.E.A. kaj eldiris la esperon, ke la sola granda grupo nun ekster la asocio ne por ĉiam restos ekstere. Antaŭ ol foriri multaj vizitantoj dankis la gasteman grupon.

MONT ALBERT, V.—Kelkaj Esperantistoj ĝuis la gastemecon de s-ino Stein, ĉe ŝia ĉarma hejmo en Mont Albert. Fortepianaj solaĵoj de f-inoj. Blyth kaj Bell, violona solaĵo de f-ino. Dorothy Bell kaj kantoj de la gastiganto ravis la aŭdantaron. La okazo estis Amerikana Teo por la kaso de "La Suda Krucio," kiu per la vendado de donacoj gajnis £3/1/6.

SIDNEJO, N.S.K.—La Sidneja societo esperanta kunvenas ĉiun jaudon, ĉe Station House, Rawson-pl. La programo ĝis oktobro estas, kiel sekvas:—Aug. 16, Short Play, members; Aug. 23, "Learning a Language" (in English), Mr. J. N. Edmonds; Aug. 30, Esperanto Games, members; Sept. 6, "The Coming of the Fairies," Mrs. A. Scammell; Sept. 13, Short Stories, members; Sept. 20, "Propaganda," Mr. F. T. Simon; Sept. 27, "Esperanto in Practice," Mr. L. E. Fosto; Oct. 4, Musical and Recitation Evening, members; Oct. 11, Mock Trial, members; Oct. 18, "The English Lake District" (with lantern slides), Mr. F. V. Taylor; Oct. 25, "The Three Bears," Mr. G. H. Chappel.

La Sidneja Societo ĉiu semajne havas ion por interesigi membrojn kaj vizitantojn. La Prezidanto, S-ro. F. V. Taylor, bone sciante la kapablecojn de siaj anoĵ, presigis programon laŭ kiu la kunvenoj estas aranĝataj Dum Julio hispana samideano, S-ro M. Moran, lekciis pri "Miguel Cervantes", S-ro N. Grant paroladis pri la kon-

stelacio, membroj laŭvice deklamis mallongajn esperantajn poemojn (seriozajn kaj humorajn) kelkaj ludis muzikinstrumentojn kaj aliaj kantis aŭ rakontis ŝercojn. Tiu sistemo estas tre ŝatata de la membroj car ĝi donas bonan ŝancon aŭdi kaj paroli la karan lingvon.

Je la komenco de la monato unu el la junaj Svisanoj, pri kiu "La Suda Kruco" lastfoje raportis, vizitis la societon. Estis S-ro Bernardo Soppelsa, kiu envojaĝis Aŭstralion ne sciante la anglan lingvon, sed des pli bone parolas Esperanton. En mallonga parolado li kore dankis la societon por la bonegaj aranĝoj bonvenigi lin ĉe ŝipstacio kaj precipe menciis la afablecon de S-ro Pfahl kiu estas la U.E.A., Vic.—delegito. Por li ĝi estis vivanta ekzemplo de la potenco de Esperanto. Sidnejo tiel plaĉas al S-ro Soppelsa, ke li intencas loĝi tie ĉi.

Nova grupo, nomata "Teozofia Esperanto-Ligo," starigis inter teozofistoj sub gvidado de S-ro G. H. Chappel. Tiu rezultis el propaganda artikolo en fak-jurnalo kaj promesas bone sukcesi.

ESPERANTO KAJ PARLAMENTO DE NEDERLANDO.

En la provizora raporto de la parlamentaj raportantoj pri la instrubudĝeto 1923 estas skribite:

Unu el la parlamentanoj ankaŭ pledis por akcelo de la studado de la internacia lingvo Esperanto, kies graveco rilate la pacmovadon, sciencajn kongresojn kaj komercinterilatojn estas pravigita de la Ligo de Nacioj. Le ministro povus liaopinie atentigi komunum- kaj lernejestrarojn pri la dezirindeco aranĝi kursojn en Esperanto.

En sia respondo al tiu provizora raporto la ministro de instruo diris:

La celado de la Esperantistoj meritas estimon. La registaro tial ne malzorgas regule representigi sin en la internaciaj kongresoj por tiuj ĉi help-lingvo.

LI NE HAVIS GIN.

Bananolanda kuracisto al sia kunulo:—Mi tre eraris hodiaŭ matene. Mi operaciis sur malsanulo kaj li ne havis tion, kion mi supozis.—Ah—diris la kunulo—li ne havis apendiceton?—Ho jes.—respondis la kuracisto—li vere havis apendiceton, sed li ne havis monon.

JAPANAJ VIVREGULOJ.

POR LA POPOLO.

La japana registaro lastatempe ordonis disvastigi per sennombraj flugfolioj regulojn por la portigado kaj sanigado popola, kiuj povas esti utilaj ankaŭ por aliaj nacioj.

Jen la Esperantigita teksto de la 10 reguloj:

1. Enlitigu fruvespere kaj levigu ĝustatempe en la mateno.

2. Kiel eble plej longan tempon de viaj liberaj horoj pasigu en la bela, freŝa naturo. Pripensu, ke la suno estas forta, tre efika sanigilo.

3. Moviĝu multe en la freŝa aero kaj tion farante spiru profunde kaj regule.

4. Dormu en malluma senbrua ĉambro; via dormo daŭru 6. maksimume 7 horojn. Knabinoj kaj virinoj bezonas iom pli longan dormon.

5. Unu tago de la semajno estu plena ripoztago. En tiu tago oni eĉ ne skribu aŭ legu.

6. Prenu malmulte da teo aŭ kafo: evitu ankaŭ la ĝuon de tabako, opium-produktoj kaj alkoholaĵoj.

7. Estas konsilinde manĝi viandon nur unu fojon ĉiutage. Lakto kaj laktoproduktoj, fruktoj, legomoj, ovoj kaj farunaĵoj estas pli sanigaj kaj pli bonfartigaj.

8. Banu vin ĉiutage. Unu aŭ du fojojn ĉiusemajne estas konsilinda apliko de vaporbano; sed antaŭe lasu esplori vian koron, ĉu ĝi estas sufiĉe forta, por akcepti sensufere tiajn banojn.

9. Por viaj vestaĵoj preferu ŝtofojn krude teksitajn, kiajn oni uzas por la fabrikado de subvestoj. Uzu malpezan kapkovraĵon kaj precipe konformajn ŝuojn jam de la frua junaĝo.

10. Gardu vin kontraŭ emocioj. Ne senbridigu vian pasion. Ne ĉagrenigu pro la estonteco, kiun vi ne konas antaŭe. Ne rakontu al viaj kunuloj malagrablajn okazaĵojn kaj ankaŭ ne aŭskultu tiajn.

(el Revuo de E.T. Trad. Mŭdjekeewis)

NEKROLOGO.

Post mallonga malsano mortis en Sidnejo, la 11 Julio 1923, malnova kaj estimita samideanino, Sinjorino Ida Mary Withers.

Ŝi estis unu el la plej malnovaj membroj de la Sidneja Esperanto-Societo—kiam ĝi ankoraŭ portis la nomon "Zamenhofa Klubo"—kaj ĉiam propagandis nian aferon inter la elektitaj medioj kiujn ŝi vizitadis. Multaj Aŭs-

tralianoj ankoraŭ memoras ŝian aktivan partoprenon en la Tria Kongreso (1920) kiel grupestrino de sukcesa fantazia kostumbalo en la urbdomo.

Krom vigla esperantistino ŝi fondigis la nun bone konatan "Bush Book Club" (Libro-prunta klubo por kamparanoj), estis honora sekretariino de grava memvola ambulanco kaj por ŝia bonega servado dum la milito ricevis la ordenon de "Sankta Johano de Jerusalemo."

En ŝi ni perdas valoran membron kaj helpeman amikinin. Aŭstralaziaj esperantistoj funebras.

ZAMENHOF MONUMENT FUND.

Julio 25a estis gaja nokto por Melburnaj Esperantistoj. En la Aŭstralio ĉambrego, 19 Strato Russell, oni aŭdis longan kaj laŭtan ridon. Oni trovis ke ĉaradoj estis la plej bona maniero por amuzi amikojn. Krom la ridoj kaŭzitaĵ de la ĉaradoj tre bela muziko aŭdigis. La kunveno daŭris ĝis la dek unua. Inter la aŭdantaro estis gesamideanoj el Christmas Hills, Daylesford kaj Wedderburn.

La Monumenta Kaso gajnis £4 per la kunveno. La Aŭstralio donado al la kaso estas ĝis nun £30. Melburno kolektis tiun sumon. Ĉu la aliaj ĉefurboj ne povas fari ion similan? Rapidu!

ESPERANTISTOJ—

STENOGRAFIISTOJ.

Kelkaj gekolegoj—esperantistoj kaj stenografistoj — formis provizoran Komitaton, por celi la kreon de internacia Asocio de esperantistoj stenografistoj.

Tiu Asocio laboros por propagandi Esperanton en la stenografistaro, kaj Stenografon en la esperantistaro.

Tiu Societo zorgos same por instrui la junajn kolegojn, kiuj volos stenografi la internacian lingvon; por priŝiigi siajn membrojn pri la disvastigo de l'stenografo en la diversaj landoj; por la verkado de teknika vortaro: k.t.p.

La provizora komitato nun eldonas "Rondirantan Gazeton," atendantе kiam la Societo estos fondita kaj ion forta, por eldoni pli gravan gazeton teknikan.

Kiu volas helpi la starigon de tiu Asocio—kies kotizo kostos malkare—estas petata sin turni al la provizora sekretario: S-ro. P. Flageul, 9 Bul-

vardo, Voltaire, en Issy (Seine), Francujo.

THE SYDNEY CONGRESS GROUP.

Facing this page is a reproduction of a photograph of those visitors to the Congress who attended the Civic Reception at the Town Hall. The names are not given here, as they would occupy too much space, but those present at the Congress will have little difficulty in recognising themselves and the other samideanoj forming the group. The admirable block is the work of the Murray Fraser Process Engraving Establishment, Charlotte Street, Brisbane, and was generously presented to "La Suda Kruco" by Fraŭlino Marion Fraser, to whom very sincere thanks are hereby tendered.

FOURTH AUSTRALASIAN ESPERANTO CONGRESS, SYDNEY, N.S.W.

March 30th to April 5th, 1923.

The following is the audited statement of receipts and expenditure:

Receipts.	
Subscriptions	£65 15 0
Ticket Sales, Concert	10 2 0
Donations	6 2 9
Refund, Catering	5 0 0
	£86 19 9
Expenditure.	
Catering	£23 5 0
Printing	15 17 6
Postages	8 11 0
Rent	6 17 6
Advertising	5 14 6
Propaganda Expenses	3 3 0
Fares to Zoo	2 18 9
Expenses, Concert	2 18 9
Donated	2 16 0
Stationery, etc.	1 14 6
Telegrams	0 16 9
Newspapers and Reports	0 10 8
Sundries	0 5 0
Typing	0 4 0
Exchange Cheques	0 3 0
Part balance to Suda Kruco	6 1 0
Part balance Sydney Esperanto Society	5 2 10
	£86 19 9

[I should like to take this opportunity of thanking, through the "Suda Kruco," those who supported the Congress, either by subscriptions or donations, and especially those who encouraged the organising committee to go on by subscribing early.—Frank V. Taylor, hon. Congress treasurer.]



Photo: Sidney Riley.

Fourth Australasian Esperanto Congress, Civic Reception, Town Hall, Sydney.

Block: Murray Fraser, Brisbane.

LA VERA MARSERPENTO.

Maljuna Sandy, de la Mary Jane, havis klare timigitan aspekton kiam li aliĝis al la dometo de la ŝipstaciestro, ĉe la pordo de kiu kolektiĝis la kutima nombro de fiŝkaptistoj, post la forsendo per la matena vagonaro al Melburno, de sia kaptitaĵo. Liaj amikoj estis deziregaj ekscii la kaŭzon de la nervaj tikoj de lia vizaĝo, kaj la malrigida agado de lia kutime sanema kaj forta figuro.

—He, Sandy, kio estas?—kriegis la senzeremonia Sam Belaye—Vi certe devas esti vidinta fantomon.

—Estas pli malbonaj objektoj ol fantomaj ĉirkaŭe: respondis la maljunulo per haltema voĉo.—ĉar fantomoj ne povas difekti vin. Sed mi vidis ion lastan nokton, kiu certe timigis min, kaj preskaŭ estis la mortigilo de mi. Mi serĉadas la marserpenton de dud-ek kvin jaroj, sed ĝis lasta nokto mi pensis ke tia monstro ne ekzistas.

—Ĉu vi diras al mi tion?—diris la ŝerca Tom Sheet—Nu tio estas plej eksterordinara. Mi estas aŭdinta pri personoj vidintaj serpentojn; sed marserpentoj! Mia vorto! Li ridetis larĝe. —Certe mi estas prava—diris Sandy vizaŭte la gutojn de ŝvito de lia fronto kaj ĵetante malbonvolan rigardon al Tom.

—Ne estis drinkaĵo nek io simila en la ludo, kaj la tuta ŝipanaro vidis ĝin, kaj ili ne klinas forgesi ĝin ĝis ilia mortotago.

—Ĉi tiu estas novaĵo inda de rakonto,—diris maljuna Jack Trawl, maljunulo kiu havas kvar fortikojn filojn kiu regule ĉeestis la fiŝkaptejojn, kaj tiel sukcese ke la maljunulo detiris sin de aktiva partoprenado sed regule ĉeestis ĉiun kuvenon de la fiŝkaptistoj, kaj pro sia maraj rakontoj kaj sentencaj ekdiroj, estis nomata:—“La Aŭtoritato.” Li malleviĝis komforte sur benkon streĉis la krurojn, kaj forte frotis la manojn kune.

—Donu al ni la klaran veron, Sandy pri kiel la afero okazis, kaj ni havos taŭgan raporton skribita kaj ekspedita al la fiŝkaptada departemento.

—Ĉirkaŭ la dekdua lastan nokton,—daŭrigis la agitita fiŝkaptisto post li zorge ekbruligis lian pipon,—ni kuŝis ĉe niaj retoj 40 mejlojn nordokcidente de Flinders militŝipstacio. Ne estis tre mallume je la horo sed blanka nebulo kuŝis sur la akvo. Ne estis vento, kaj la maro estis tiel trankvila kiel

lago. Subite la maro leviĝis ĉirkaŭ ni, kaj la Mary Jane komencis tremi kaj balanciĝi kvazaŭ ŝi estis ĵetonta ĉiujn anojn elŝipen kaj la snuregaro post ni. Jen Peter estis disspeciganta la retojn, kaj li eksaltis pensante ke ni estis en kolizio. Ĉu ne Peter?—ame metante la manon sur la ŝultron de sia plej maljuna filo.

La junulo malrapideme demovis duoncolon da cigaredo kiu estis kliniĝinta de liaj lipoj, kapjesis kaj diris—Je-es,—tiam aperigis batitan pakajeton da cigaredoj, kaj kun multe da pripensoj elektis ankoraŭ unu fumajon. Post ĉi tiu konfirmo Sandy daŭrigis:—

—Tial vi povas scii ke ĝi estis sufiĉe malbona. Tiam estis terura bruego de io kureganta tra la akvo, kaj pli laŭtiganta, ĝis granda, longa, pretermonda besto iris sibilante preter nia flanko kiel grasumita fulmo, kaj estis el de vidlimo antaŭ ol ni havis tempon por palpebrumi.

—Ah! estiĝ baleno, nenio pli aŭ malpli—ekdiris Ben Jonson, la serioza kaj silentema maristo, formordante la angulon de peco da tabako, kaj kraĉante sur la marboto de Sandy

—Ne; supozante ke estis amaso da balenoj, ĝi ne povus igi mian boaton danci tiamaniere—respondis la fiŝkaptisto.—kaj krom tio, mi estas vidinta kelkajn balenojn dum mia vivo ĉe Grenlando, kaj la Pacifiko, sed mi neniam vidis ilin kun du brulaj ruĝaj okuloj kiel havis tiu, ĝi nepre estis la marserpento, kaj tio estas ĉio pri ĝi. Kvin minutojn post ĝi preterpasis, la akvo estis tiel trankvila kiel la haveno estas ĵus nun, kaj la Mary Jane kuŝis senmove.

—Ĉu estis iom da aliaj boatoj apud vi je la horo? demandis la Aŭtoritato

—Ni devas venigi tiom da atestaĵo kiom ni povas akiri pri tia grava afero kiel ĉi tiu.

—Estis unu grava vidanto, sed li estas mortinta—respondis Sandy. La malkredema aŭskultantaro ŝanĝis sian pozon aŭdinte ĉi tiun deklaron, kaj ilia konduto fariĝis subite estimplena kaj modela.—Sed ne estas tre grave—daŭrigis la fiŝkaptisto,—li ne povas doni al vi multe da sciigo, ne konante la lingvon. Estas ja mistera afero. Kiam taglumo venis, Peter trovis grandan fiŝon saltfrapantan en la boato. La marserpento faris penon por kapti lin, kaj li saltis sur la Mary Jane por esti el danĝero. Li sangis ĉe la nazo; tial Peter donis al li unuan

helpon. Estis afabla bonintenca ago de Peter, sed la fiŝo ne postvivis ĝin. Ĝi kurbigis la naĝilojn kaj forlasis ĉi tiun vivon ĉirkaŭ horo antaŭ ol ni alvenis hejmen, ne lasinte ian deklaron por konfirmi mian historieton pri la marserpento. Sendube estis timo kio mortigis ĝin, kaj esti honeste kun vi, knaboj, mi mem sentas min malproksima de sana.

—Estas sufiĉe vere pri la fiŝa parto de la historio—diris Fred Carter, kiu ĵus revenis sur sia ŝarĝveturilo, liverinte la kestojn da fiŝoj ĉe la fervojostacio.—Mi vidis la fiŝon: certe ĝi estis bonulo.

—La ŝipstacieŝtro vagis sur la scenon, alproksimigante sian malgrandan oficejon. Pasante tra la malgranda aro de maristoj lia kapo estis mallevigita kaj liaj okuloj estis fiksataj sur la matena ĵurnalo.

—La ĝusta viro kiun mi serĉis diris la Aŭtoritatulo.—Ni deziras vian spertan opinion pri tre stranga afero kiu okazis al Sandy ĉe la fiskaptejo lastan nokton. Se vi ne povas ĵeti ion da lumo sur la temon, ne utilas ke alia persono penu.—La Aŭtoritatulo tiam rakontis la marserpantan tragedion kiel ĝi estis rakontita de maljuna Sandy.

La malgranda ŝipstaciestro aŭdis ĉion, ne dirante vorton, kaj ne movante muskolon, tiam paŝis antaŭen kaj varne premis la manon al la ŝipestro kaj diris:—Mi gratulas vin pro via mirakla eliĝo de terura mortigo, Singoro. Mi ĵus legis ĉion pri ĝi en la ĵurnalo ĉi tie kaj scivolis kiu estis la boato kiu havis tian mallarĝan eliĝon. Mi mem vidis marserpentojn multfoje, sed ne depost mi estis malsaĝa knabo: kaj neniu el ili estis duone tiel malbela kiel tiu de lasta nokto. Kvardek mejlojn for, ĉu ne? Guste tiel. Nu, mi legos la historieton en la ĵurnalo ĉi tie kaj eble vi akiros indikilon el ĝi.—La nova submarŝipo antaŭ ne longe donacita al Aŭstralio de la imperia registaro kaj kiu estis antaŭe Germana U-boato, kaj la konstruo de kiu estas vualita en mistero, estis provata ĉe Flinders militŝipstacio hieraŭ. Ĉi tiu ŝipo estas tuta novaĵo en marmilita arkitekturo, kaj, inter aliaj novaj trajtoj, estas pelata de elektra povo. La marmilitaj spertuloj, kiuj faris la vojaĝon sur ĉi tiu lasta aldonaĵo al la Aŭstralio militŝiparo, estis pli ol kontentaj je ĝia rapideco kaj

konduto. La rapidecaj provoj estis efektividatoj sur kurejo etendanta de Kabo Schanck al Kabo Paterson, kaj oni komprenas ke la submarŝipo kovris la distancon je la terurega rapideco de kvardek kvin nodoj. Nenia malfeliĉo okazis ĝis la ŝipo estis tridek naŭ mejlojn nordokcidente de Flinders Marstacio, kiam ĝi subite plunĝis en amason de nebulo, kaj nur mankis kelkaj futoj kaj ĝi estus tranĉinta fiŝkaptan boaton en duonojn. Ĉi tiu boato ne montris lumojn, kaj—

La restaĵo de la paragrafo estis perditita en la ridado de la aro kiu plunĝis la lertan manieron per kiu la ŝipstaciestro eksplodigis la rakonton pri la marserpento.

Kompatinda Sandy tute konfuzita, devis konfesi ke li eraris, kaj pri la akuzo de manko de lumoj diris:—Ne estas bonsense uzi bonan petrolon en taglumo.

(El "The Age," Melbourne, tradukis P. Wyatt.)

Anglo kiu veturis en rapidira vagonaro kun Amerikano, volis fanfaroni pri la rapideco de la vagonaroj en Anglujo; kaj vidante ke la Amerikano kaŭriĝis li diris—ĉu vi timas pro la rapideco de la vagonaro?—Ne, respondis la Usonano.—Sed tiu ĉi insulo estas tiel malgranda, ke mi timas ke ĝi forlasos la liniojn ĉe la fino.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 26 julio ni ricevis la jenajn sumojn:—M. J. Ravelick, 5/-, ĝis majo 24; G. Houston, 4/6, ĝis majo 24; E. D. Nesbet, 9/-, ĝis oktobro 24; M. Junk, 10/-, (ĉesigis); M. Holdensen, 4/6, ĝis aprilo 24; C. M. Pocklington, 4/6, ĝis julio 24; P. T. B. Hudson, 4/6, ĝis julio 24; J. Girdwood, 4/6, ĝis majo 24; S. E. Humplereys, 5/-, ĝis aprilo 24; P. D. Reardon, 4/6, ĝis junio 24; A. Rail, 4/6, ĝis junio 24; L. O'Connor, 4/6, ĝis majo 24; L. S. Payne, 5/-, ĝis junio 24; M. Fraser, 5/-, ĝis majo 25; G. Collingidge, 4/6, ĝis junio 24; H. Robson, 9/-, ĝis majo 24; F. T. Simon, 5/4, ĝis majo 24; R. Kreuz, 5/-, ĝis julio 24; W. D. Smith, 4/6, ĝis majo 24; Sino Wilson, 4/6, ĝis majo 24; H. Conwell, 4/6, ĝis majo 24; R. W. Browning, 5/-, ĝis septembro 24; P. Abbott, 5/-, ĝis majo 24; A. McKenzie 5/-, ĝis julio 24; W. E. Hill, 4/6, ĝis majo 24; H. Hansen, 5/-, ĝis majo 24;

A. Hughes, 4/6, ĝis aŭgusto 24; C. Wendler, 4/6, ĝis junio 23; E. A. Pryke, 4/6, ĝis junio 23; M. Martinek, 4/6, ĝis junio 24; H. Batchelor, 5/-, ĝis junio 24; V. Irwin, 4/6, ĝis aprilo 24; E. Cox, 4/6, ĝis junio 24; C. L. Clarke, 4/6, ĝis majo 24; N. Gaye, 5/-, ĝis junio 24; F. V. Taylor, 4/6, ĝis majo 24; W. G. H. Williams, 4/6, ĝis aprilo 24; W. V. Boulton, 10/-, ĉesigiĝis; F. Baliček, 5/-, ĝis aŭgusto 24; D. Guilbert, 4/6, ĝis junio 24; K. Simmons, 4/6, ĝis majo 24; E. Heritage, 4/6, ĝis junio 24; T. Middleborough, 4/6, ĝis junio 24; C. Hannaford, 4/6, ĝis junio 24; I. McDonald, 4/6, ĝis julio 24; I. F. Stande, 9/-, ĝis majo 25; C. C. Dornbusch, 4/6, ĝis majo 24; kontantaj, 4/-; reklamo, 12/6; Mont Albert Grupo, £3/1/6.

GARANTIA FUNDO.

T. O'Leary, 10/-; N. L. Byatt, 10/-; G. Mercer, 5/-; M. Fraser, £2/15/-; Sino Wilson, 2/6; H. Conwell, 2/6; M. Martinek, 5/6; G. D. Nash, 5/-.

Ornamaj produktanto serĉas komercan rilaton kun importistoj kaj vendistoj de Gablonz'aj artikloj el vitro kaj metalo. Mi liveras ĉiujn artiklojn, prizorgas enaĉeton kaj informas senpage pri komerco. Rudolf Lang II., Augasse 67, Gablonz a. N., Czecho-Slovakia.

S-ro Jozef Konderak, Zarzad Okz, Lasow Paristwowych, urbo Luck, Poland, Europe, deziras interŝanĝi postmarkojn.

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET
PRAHRAN
(Opposite Town Hall.)

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
ONA ODORA SPIRO
ONA RIDO
ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 39½ Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 39. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Septembro, 1923.

MONKOLEKTO POR NIAJ JAPANAJ KUNHOMOJ.

La konsilantaro de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio decidis esprimi la veran konsenton de la Esperantistoj de Aŭstralazio kun la suferantoj de la Japana terskuego. Letero estas ekspedita al konata Esperantisto en Kioto, kun informo ke mensendo baldaŭ sekvos, kiun li povos disdoni kie ĝi estas pli urĝe bezonata. S-ro. H. Byatt, 62 Northcote Road, Armadale, Vic., prizorgas la monkolekton. Ĉiu grupo estas petata kunhelpi, kaj montri ke nia konsento estas ne malplenaj vortoj, sed vera, solida helpo en krizo, kiam tuja kaj granda helpo estas urĝe necesa.

OURSELVES.

With the July issue *La Suda Kruco* unostentatiously entered into the fourth year of its existence. We think that this proves that the paper is appreciated and shows that it serves the useful purpose of maintaining the unity of Australian Esperantists. The continued publication of the paper has been rendered possible only by the loyalty with which the original subscribers have extended their support. Among the hundreds of beginners now receiving instruction in our various groups there should be dozens who have sufficiently progressed in the language to become readers of and subscribers to, *La Suda Kruco*, and we are hopeful of hearing from them

before long. A gratifying feature is that recently we have received several suggestions. This indicates a real interest in the paper. Where practicable these suggestions have been adopted and those not yet dealt with will receive consideration when we have the means of giving effect to them.

The Chronicle is admittedly a weak feature. It does not by any means reflect to the full the Esperantist activity throughout Australasia. Group secretaries and teachers have been appealed to over and over again to send a paragraph occasionally, but very few have responded. We now ask each Esperantist to consider himself or herself on the staff, and to send us news for insertion. Any interesting information, pithily presented in Esperanto, will be welcome. Typical Australian items, which would serve to advertise Australia, its capabilities and resources, would reach all corners of the earth very quickly, and would benefit Australia and also serve to further emphasise the value of Esperanto. *La Suda Kruco* is the product of voluntary workers, and for that reason every allowance should be made for its shortcomings, and those workers should be helped, whenever possible, and, most important of all, they should be encouraged in their labours by a steady increase of subscribers, which would enable the paper to be enlarged, and more diversified contents to be provided.

KRONIKO.

ARMADALE, V.—Nova grupo fondiĝis en Armadale, laŭnome, "La Persista Grupo." La kunveno estas 62 Northcote Road, Armadale, kie la membroj renkontiĝos ĉiun Mercredon, ĵa la oka vespere. Prezidanto estas S-ro Byatt, sekretario F-ino Thomas, Kasisto F-ino Byatt. La grupo aliĝis al A.E.A. kun laŭdinda rapideco.

MELBURNO, V.—Dro. Fred J. Williams, tre entuziasma Esperantisto, vic-prezidinto de la Sidneja kongreso, antaŭ nelonge iris al la insuloj Novaj Hebridesoj, por tie entrepreni kuracistajn devojn.

S-ro. A. Maurice Hyde, prezidinto de la A.E.A., post du jara deĵoro en Rabaŭl, nun ĝuas libremtempon. Fine de Aŭgusto li vizitis siajn parencojn en Melbourne, kaj nun vojaĝas al Java kaj aliaj proksimaj insuloj antaŭ ol rekomenci siajn oficialajn laborojn en Decembro.

NEWCASTLE, N.S.K. — La nova grupo kiu antaŭ nelonge komenciĝis sub "Workers' Educational Association" (Laborista Eduka Asocio), kreskis al 30 membroj kaj, se oni povas juĝi per la entuziasmo, fariĝos unu el la plej gravaj en Nova Sud-Kimrujo. —La grupo tre deziras ricevi malnovajn gazetojn kaj librojn.

OAKLEIGH, V.—La 30an de Aŭgusto, antaŭ la filio de la A.N.A., S-ino Bigelow kaj S-roj. Byatt kaj Hudson parolis pri Esperanto. La ĉeestantoj tre interesiĝis kaj aĉetis diversajn lernolibrojn. Post antaŭa informo ke la necesaj lernolibroj kostus tri funtojn agrable surprizis ilin la scio, ke oni povas lerni la lingvon el libro, kiu kostas nur du ŝilingojn kaj ses pencojn.

SIDNEJO, N.S.K.—La Senato de la Sidneja Universitato lastmonate donis sian oficialan aprobon permesante la starigon de Esperanta grupo inter studentoj ĉe ĉi universitato. Ĝis nun 16 studentoj aliĝis kaj klasoj kunvenas ĉiusemajne en unu el la lernoĉambroj sub energia gvidado de S-ro J. N. Edmonds, konata lingvo instruisto. Tiu klaso ne estas parto de nova universitata lernprogramo, sed tute memvola lernado kaj okazas dum liberaj horoj.

"IKA" (Internacio Katolika) fondis filion ĉi tie. Lia Moŝto, Ĉefepiskopo Kelly, benis la asocion kaj D-ro. Sheehan, Kunaganta Ĉefepiskopo, prezidis

la inaŭguran kunvenon. Granda ĉeestantaro aklande akceptis Esperanton, kiel oficialan lingvon. La Sidneja "Daily Telegraph" longe raportis la protokolon.

Dum aŭgusto du intereseĝaj prelegoj okazis ĉe Sidneja Esperanto-Societo. "Naciaj humorajistoj" estis la temo, kiu S-ron. A. Feldmayr pritraktis kaj en facila maniero li rakontis humorajojn el la vivo de kelkaj pli aŭ malpli konataj humorajistoj Germanaj kaj Turkaj.—La alia parolanto estis S-ro J. N. Edmonds, instruisto de Japana lingvo ĉe gimnazio, kiu elektis la temon "Ellernante lingvon." S-ro. Edmonds (parolante angle) montris la ĝeneralan malfacilon de lingvostudentoj kaj diris, ke eĉ Esperanto ne povas esti ellernata en 10 lekcioj aŭ 4 semajnoj, escepte, eble, de eksterordinaraj personoj. Oni devas lerni kaj kompreni lingvon same kiel aliajn objektojn kaj tio nur estas ebla per tutkora studado. Li diris, ke la esperanta movado bezonas spertajn Esperantistojn kaj ĉiuj devus celi perfektigon.

AUSTRALIANOJ EKSTERLANDE.

Skribante el Genevo la 15 julion, S-ro. W. J. Drummond diris, ke ĝis tiam li faris vizitojn al Londono, Ostend, Bruges, Ghent, Bruselo, Parizo kaj Lyon. En ĉiu menciita loko li renkontis Esperantistojn kaj ĉiu estis tre afabla. En Genevo li havis longan interparolon kun D-ro Privat. Postlasinte Genevon S-ro. Drummond iris al Lucerne, laŭ la lago de Genevo, poste al Milano, Firenzo, Romo, Venecio, Fiume, Jugoslavio kaj Nurnberg.

S-ro. Drummond faris tre sukcesan paroladon pri Aŭstralio en la halo de la Komerca Ĉambro de Lyon. Tio da petoj estas ricevataj, ke S-ro. Drummond timas ke li ne povos aranĝi plenumi ĉiujn.

Fraŭlino Emilie Ely, la oficiala reprezentanto de la A.E.A. por la Nurnberga kongreso, ankaŭ skribante el Genevo, raportis ke tie ŝi malsaniĝis, sed ŝi esperis esti en sufiĉa bona sanstato antaŭ la kongresa dato. Ŝi konatiĝis kun multaj Esperantistoj, kiuj estis tre helpemaj, kaj pro ŝiaj spertoj, oni povas certigi ankoraŭfoje al la mirinda taŭgeco de Esperanto por ĉiu lingva neceso dum vojaĝo.

RECENZOJ.

Bukedo kolekto de literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj. Reviziita de Zanoni. T. & H. Jung, Horrem bei Koln, Germanujo. Ĉi tiu libreto estas represo de naŭ mallongaj historietoj kiuj unue aperis en "Esperanto Triumfonta." Ili estas nek pli bonaj, nek pli malbonaj, ol la kutima ĵurnala felieto, sed tamen, ili estas interesaj pro ilia diversnacieco. Kvankam la temo estas tre neversajna, la rakonto de dana verkisto St. St. Blicher, tradukita de H. J. Bulthuis, L.K., (aŭtoro de "La Idoj de Orfeo"), meritas la lokon de honoro, kiun oni donis al ĝi metinte ĝin je la komenco de la libro.—[C. W. B.]

Kio estas la Biblio, de pastro H. Lenk, Herrnhut. 50 paĝoj; tre interesaj kaj gravaj klarigoj pri la deveno de la Sankta Biblio, Prezo 0,40 sv. Fr. 6 pencoj.

Katalogo de la anonima Societo "Centra Esperanto Librejo," 2 Bankaŝtraat, Hago. La provizo de libroj estas pli granda ol 6000 verkoj, kaj oni celas la vendadon de libroj, je moderaj prezoj. Kiel atestilo ke Esperanto iam estas profitodona la societo citas ke ĝia akciuloj ricevis dividendojn de 6½ pro cento en 1919, de 7 pro cento en 1920, kaj 6 pro cento en 1921.

Samouczek jezyka Esperanto (Lernolibro por poloj, tria eldono), de Prof. Leopold Kronenberg Bydgoszcz, Polujo.

La kompilinto de ĉi tiu lernolibro de longe estas ĵurnalista kaj kondukanto de skriba kurso de Esperanto. La libro estas plena, bone aranĝita kaj kredeble estas tute sufiĉa, por instrui Esperanton al la Poloj. La fakto ke du eldonoj elĉerpiĝis estas certigilo ke la libro ricevis bonan akcepton.—[C. W. B.]

Kristana Esperanta Kantareto. 11 multekonataj kristanaj kantoj kun melodinotoj, kunmetitaj per la redakcio de Dia Regno Prezo: 0,40 sv. Fr.; 6 pencoj (angle); malbonvalutaj landoj demandu pro la prezo. Havebla de P. Hubner, Quedinburg, Bergstrasse, Germanujo.

JOHANO LA BRAVA, originalo de Aleksandro Petofi, tradukita en Esperanton de K. de Kalocsay. Eldon-

ita de "Literatura Mondo," Budapest. La poemo estas traduko de hungara fabelo, kaj estas tre interesa de tiu vidpunkto. Pri la temo mem oni ne povas diri multon. Same kiel la plej multaj el Hungarujo kaj Polujo, la fabelo finiĝis iom malĝoje, sed en tiu ĉi okazo la malĝojo estas moderigita, ĉar la heroo havas la feliĉon atingi Felandon, kie li renkontas la heroinon.

La jenaj stancoj trovataj en la finaj ĉapitroj, montras plej bone la kapablecon de la tradukinto, kiu fariĝis eminenta en Hungarujo, pro lia nova verko "Mondo kaj Koro."—

Johano la Brava ĵus atingis Felandon kaj renkontas sian amatan Ilno.—

En Feland' pri vintro oni eĉ ne scias,
Tie pomp' eterna de l'printemp' radias.

Suno ne mallevas, levas sin alterne,
Ruĝ' aŭrora tremas sur ĉiel' eterne. . .

Meze de Felando kuŝis blua lago,
Al ĝi li alvenis dum malĝoja vago.
Rozon, kiun de la kara tomb' li ŝiris
Prenis li de l'brusto kaj li al ĝi diris.

—Cindroj de l'amata! Mia sol-trezoro!
Montru vojon kaj mi sekvos vin, ho floro!

Kaj ĝin en la ondojn ĵetis li malĝoje,
Mem li, por ĝin sekvi, estis jam survoje.

Sed kion li vidis! Ho, miraklo kia!
Jen la rozo ŝanĝis sin je Ilno lia!
Kuris li en ondojn kvazaŭ en frenezo
Kaj li ŝin elsavis el la laga mezo. . . .

Bela estis Ilno! tuj al ŝi rapidis
La feinoj kaj ŝin ĝojmirante vidis,
Kaj el ŝi aklame tuj reĝinon fariŝ,
Dum Johanon feoj sia reĝ' deklaris.

La poemo estas verkita en la trohean ritmo, Aleksandra verso, kiu ĉiam estas iom unutona; sed por variigi ĝin la tradukinto iomete ŝanĝis la ritmon de tempo al tempo. Estas dube ĉu tiu ĉi estas plibonigo, ĉar ĝi iom malfaciligas la legadon.

Elizio estas uzita tro ofte, kiu malhelpas la gracion, facilan fluon de la versoj; tamen troviĝas en la verko multo por laŭdi, spite de la mankoj.—[V.C.]

LA KRESKO DE CANBERRA, CEFURBO DE AUSTRALIO.

S-ro. P. G. Stewart, Ministro por Entreprenoj kaj Fervojoj en la Aŭstralia Federacia Parlamento elŝovelis le unuan herbterojn en preparo por la fundamentoj de la nova Parlamentejo en Canberra, la 28 Aŭgusto.

S-ro. Stewart, dum memoriga parolado, diris ke la konstruo de la Federacia Parlamentejo montras tre gravan punkton en la historio de la konstruo de la urbo. Rilate al Canberra oni sekvas precizan planon, kiun oni faris antaŭ ol permesi enloĝadon.

La fundamentaj ingenieraj aferoj, ekzemple vojoj, akvoprovizo, kloaka sistemo kaj elektra povo, jam nun estas en certa grado de kompleteco kaj nun ni atingas alian punkton—tiu de la komenco de la starigo de la oficialaj konstruaĵoj. Antaŭ la milito la Federala urbo estis populare konsiderita kiel urbo en kiu troviĝus imponantaj kaj monumentaj publikaj konstruaĵoj kaj arkitekturaj belegoj indaj de komparo kun tiuj de aliaj landoj. La ŝanĝitaj ekonomiaj kondiĉoj faris plan konsideron necesa, kaj kvankam, la konstruo de Canberra donas unikan okazon, ne estas ebla ia plano kiu premus la nunan generacion per aldonita financa ŝarĝo. Feliĉe ekzistas kontentiga alternativo. La nuna plano por la konstruo de Canberra ne alvizaĝas monumentan, sed ĝardenan urbon. La vojo estos ankoraŭ ne barita kiam la okazo sin prezentos. La Parlamentejo nun konstruata estos provizora, sed en nenia senco estos malestimebla. Kvankam la desegno estas simpla, pro la ekonomiaj postuloj, la domo el brikoj estos solida kaj sufiĉege granda. La arkitekturaj trajtoj ankaŭ estos agrablaj. La desegno enhavas ĝardenajn boskojn kaj estas en harmonio kun la koncepto de Canberra kiel ĝardena urbo. La nuna generacio, do, ĝuos la avantaĝojn de kompleta konstruaĵo, kiu plenigos ĉiujn postulojn necesajn por la plenumo de ĉiuj leĝdonaj funkcioj, dum fakte monumenta konstruaĵo, se komencita, prezentus en la daŭro de multaj jaroj, nekompletan ŝajnon arkitecture, kaj, intertempe, estus malpli komforta. Oni intencas kompletigi la domon kiel eble plej rapide kaj ankaŭ inviti konkurajn desegnojn por la Administraciaj Oficejoj post nelonge. La registaro volas ke la malfermo de la prok-

sima parlamento havu lokon en Canberra.

Elstaranta trajto en la regiono estas le Preĝejo de Sankta Johano la Baptisto, unu el la originalaĵoj de la distrikto, kies historio komencis en la 1848 jaro. Ĉi tiu preĝejo, kaj ĝia imponanta turpinto starante inter altaj popoloj estas rememoraĵo de la fortikaj pioniroj el Anglujo, kiuj trapenetris la montajn pasejojn de ĉi tiu malebena kaj pitoreska regiono. La interno de la preĝejo, kun ĝiaj galerioj por la servuloj de la mastra klaso, siaj gigantaj traboj el cedro, alta altero kaj malnovmoda pipa orgeno, faras neforgeseblan impreson sur la vizitanto. La preĝejo estas malgranda porcio de maljuna Anglujo metita en nova lando. Ĝi elradias atmosferon de pieco kaj sentimento. Kristanoj de ĉiuj kredoj trovas lastan restejon en ĝiaj malgranda tombejo. Ĉi tiu malnova trajto estas kunigata kun alia institucio, nome la parlamento de popolo. La malnova preĝejo estas simbolika de la fruaj baraktoj de koloniado. La nova parlamentejo malfermas alian ĉapitron de nacia evoluaĵo.

Kiel cito de la eblecoj atingotaj en Aŭstralia, estas oportune diri ke S-ro. Stewart, kiam li estis juna knabo, estis stratvendisto de ĵurnaloj. Per laboro kaj persisto li gajnis monon sufiĉan por sia edukado, fariĝis farmisto kaj poste parlamentano, kie lia kapablo baldaŭ gajnis por li lokon en la Ministerio.

LA SENFADENA DISSENDO DE ESPERANTO.

S-ro. E. Drezen parolis 25 minutojn enrusa lingvo pri Esperanto. Lia parolado estas aŭskultita en 300 diversaj urboj. Dum 30 minutoj li parolis Esperantlingve per tuta Eŭropo. Multaj gazetoj jam aperigis artikolojn pri tiu radio-lekcio.

Prof. Hetzell en Philadelphia radio-paroladis la 24 februaro. "Esperanto en Radio-komunikado."

LA KONSILANTARO DE A.E.A.

La balotado inter la membroj de la Melburna sekcio donis la poziciojn al la sekvantaj, laŭ ordo de prefero. S-ino. Bigelow, S-roj Hudson, Cohen, Ballard, Byatt, Redfern kaj Tilbury. Gratulojn al S-ino. Bigelow, ke la nura ino inter la konsilantaro havas la honoron okupi la unuan lokon.

EL LA "RUBAJAT" DE OMAR HAJAM.

La verko de ĉi tiu Persa poeto vivinta en la 11-a jarcento, kvankam supraĵe ĝi montras ŝajne pure materialistan filozofion, havas por multaj homoj pensojn de profunda spirita valoro.

(Laŭ la Angla traduko de Edvard Fitzgerald.)

XLII.

Kaj tra hotela pord' en tagofino malhele, ŝtele, venis anĝelino, portante vazon sur la ŝultro, kaj, min petis trinki . . . trinko estis vino!

XLIII.

La Vino per logiko absolute rebatas la sektaron plenrefute—subtila alĥemio, kiu ŝanĝas la plumbon de la viv' al oro tute.

XLIV.

La glora Mamud, forta, nevenkita, al tuta miskredanta ar' bandita da ombroj, timoj, en anim' svarmantaj dispel-detruas per la glav' sorĉita.

XLV.

Ho, lasu disputadon al saĝuloj, kaj meze de l' tumulto, en anguloj kvietaj, moku ni la mondbatalon; ni ridu ĝin; ĝi faras nin nur nuloj!

LXVII.

Ha, min mortantan benu per la Vino, per Vin' la korpon lavu, en la fino; en mortotuk' el vina foliaro kuŝigu min en dolĉa ĝarden-sino,

LXVIII.

ke mia cindro per la bonodoro dolĉe-insida, kiel juna floro, surprizu ĉiun fidelulon, kiu min pasos, kaj lin tenu je la koro.

LXIX.

Kaj vere, mia amo al idolo min lasis sen kredito, sen konsolo, dronigis la honoron en pokalo, kaj vendis la bonfamon por obolo.

LXX.

Ho, ofte, ofte, ĵuris mi la penton. . . sed ĉu mi sobre pelis for la tenton? Printempo tiam, roz'-en-mano, venis, en pecojn ŝiris eluzitan penton.

LXXI.

Kulpa la Vin' je multa perfidaĵo, je rabo de l' honora la vestaĵo; sed diru. . . kion la vinist' aĉetas duone karan kiel la vendaĵo?

LXXII.

Kun rozo, ve! printempo flugas for! De l' libro de junec' la bonodor' pereas. Najtingalo ĵus kantinte el kie flugis, kien? . . . Vana plor'!

LXXIII.

Amata, se ni povus en konspiro ĉi-universon, idon de deliro, ekkapti kaj frakasi, ĉu ni ne refarus ĝin laŭ nia kordezino?

LXXIV.

Ha, lun' de mia ravo, ĉiam hela, relevas sin la glora lun' ĉiela; ŝi ofte min reserĉos tie ĉi (sed vane, vane!) en ĝardeno bela.

LXXV.

Kaj kiam vi, en brilpieda paso de lok' al loko inter la amaso da gastoj sur la herbo, ĝoje venos al mia loko . . . nur malplena glaso! Tradukis A. Delsudo.

LA DUMKONGRESA EKZAMENO.

Oni anoncis kiel sekvas—
Gajnis unua-gradajn Atestojn,—
Mary Winters, John Soboleff, Adelaide E. Hughes, Wilhelm Hamann, James Widdowson, Mrs. A. A. Scammell, Eric E. Jolliffe.

Gajnis Diplomojn:—Richard J. Dodd, Gerald D. Kvarnstrom, Norman G. Grant.

Gratulojn al la sukcesintoj.

LA PROPONO DISSENDI POST-KARTOJN.

Okaze de la propono kiun faris korespondantö al Melburna ĵurnalo por reklami Aŭstralion kaj memori la venontan maltigon de nia poŝta tarifo la Melburna propaganda komitato sugestiis al la aŭtoritatoj, ke ili eldonu poŝtkartojn kun klarigaj tekstoj en Esperanto. La direktoro de propagando por la Enmigranta Departemento respondis ke nune lia departemento nur celis allogi Anglojn sed se estonte ĝi volus trafi alilandulojn li ne forgesos la proponon.

La komitato ankaŭ metis la proponon antaŭ la poŝtaj ĉefuloj.

"GEGO" REVENAS.

S-ro G. Gordon ("Gego"), kiu iris al Eŭropo en 1922, kaj, kun S-ro. Percy Hudson, reprezentis Aŭstralion ĉe la NIVa kongreso, vojaĝis en Eŭropo, post vintra resto en sudo de Francujo, kaj kredeble ĉeestis la Nurnbergan Kongreson. Li komencis la vojaĝon al Aŭstralio le 31aŭ de Aŭgusto per la kuriera sipo "Khyber," do, oni esperos bonvenigi lin malfrue en oktobro.

ESPERANTO EN RUSUJO.

S-ro. Valdemar Langlet, kiu antaŭ pli ol 30 jaroj estis unu el la gvidantoj de la esperanta movado Sveda kaj konata al la tutmonda esperantistaro paroladis antaŭ esperantista grupo en Stockholm, pri siaj esperantaj spertoj dum vojaĝo en Ruslando, kiun li ĵus faris. Inter alia, li diris, Du interesaj spertoj estas la jenaj: 1., ke homo, kiu unufoje posedis la lingvon, memoras ĝin kaj povas ĝin facile uzi ankaŭ post pli ol 20 jaroj, kvankam ne parolinte, ne skribinte, eĉ leginte preskaŭ nenium vorton dum la tuta tempo—bona argumento por nia lingvo, se oni memoras, ke ĉiu alia lingvokonado, ne uzita, malaperas sufiĉe rapide. 2, la lingvo Esperanto estas en la nuna Rusujo sufiĉe bone konata; ni trafis dum mallonga estado en Moskvo multajn personojn, kiuj tute posedis Esperanton kaj parolis ĝin egale flue kiel sian gepatran lingvon.

ESPERANTO VIVAS.

Plauen, 27 Aprilo.—Hodiaŭ mi estis devigita atendi en la ĉi tiea stacidomo ĉirkaŭ du horojn survoje al la ĉeĥa landlimo. Mi alparolis policiston sur la perono, demandante informon pri la loka Esp. movado kaj ĉu li scias la adreson de la UEA-delegito. Imagu mian agrablan surprizon, kiam mi ricevis respondon al mia germanlingva demando en flua Esperanto.—Enirante la vagonaron mi estis demandata de knabo vendanta oranĝojn kaj ĉokoladon kaj ekvidinta mian stelon: "Ĉu vi estas Esperantisto?" Mi preskaŭ pensis, ke mi enfalis en la kongresan urbon. Li sukcesis vendi al mi ĉokoladon citante la prezojn en Esperanto. Ni interŝanĝis adresojn kaj adiaŭis unu la alian post agrabla interparolo.—Kaj la mondo volas scii, ĉu Esperanto estas jam bone disvastigita.

J. D. Applebaum, el Liverpool
(E. T.)

FILATELIO.

Rusujo. Novaj postmarkoj: 3 rubl. (soldato) rozkolora, 4 r. (laboristo) bruna, 5 r. (vilagano) helblua, 10 r. (soldato) ardeza. Blanka papero, dentumita, 14½ × 15. La ciferoj ŝajnas malgrandaj, sed ili signifas orajn rublojn; laŭ moneldono 1923 unu tiel nomita "ora" rublo (fakte ĝi estas ankaŭ nur papera) estas unu miliono da sovtrubloj de 1921. Simpla letero enlanda kostas nun 6,500,000 rublojn de 1921, rekomendita letero duoblon, rekom. aerpoŝtletero kostas 18,000,000.

Polujo. Denove elvenis en la malnova aglotipo 300 (helverda), 400, 500, 1000 kaj 2000 mk. Pulpagomarkoj novaj de sama tipo kaj koloro kiel la lasta eldono, sed pli grandaj (24 × 19½) 200, 500 kaj 1000 mk. kun plej diversa dentumo.

Aŭstralazio. Pulpagaj markoj ½d. ĝis 1½ nun aperas kun la nova filigrano.

Nauru. La 1½d. Angla estas surpresita "Nauru" por uzo tie.

LA BELEGOJ DE SVISUJO.

La Societo de la Berna Alpfervojo dissendis la sekvantaŭ cirkuleron.

—Pro la praktika uzo de Esperanto kaj servoj, kiujn la Universala Esperanto-Asocio en Genevo povas peri, ni decidis la provan eldonon de nia propagandilo kaj sendi ĝin al la delegitoj de U. E. A. kaj gravaj Esperanto-gazetoj.

Al ĉi-tiu cirkulero ni aldonas kelkajn ekzemplerojn de nia unua Esperantedaktita propagandilo petante ĉiujn delegitojn recenzi ĝin en sia gazetaro faka aŭ loka.

Ni speciale atentigas, ke la plua eldono de niaj propagandiloj en Esperanto dependos de la sperto farita per Esperanto.

Por paroladoj pri nia mirinda kaj nekomparebla Berna Oberland ni estas pretaj pruntedoni belegajn lumbildojn al ĉiuj en-kaj eksterlandaj grupoj. Gvidlibrojn germanajn aŭ francajn ni senpagé liveros.

[Interesuloj ricevos ekzempleron de la gvidilo se ili petos ĝin de la bibliotekisto de la Melburna sekcio de la A. E. A.]

HERE AND THERE.

Sixty eminent citizens of Czecho-Slovakia have joined the Honorary Committee of the National Esperanto Association. Among them are three

Ministers of State, 20 university professors and high-school teachers, authors, artists, journalists, members of the Academy of Arts and Sciences, Deputies and Senators.

The tenth Hungarian Labourist Esperanto Group has been formed in Rakospalota, a working-class suburb of Budapest.

The Seventh Brazilian Esperanto Congress, in Rio de Janeiro, from 19th to 24th April, was a great success. The opening was attended by Senor Alves, Minister for Internal Affairs, and representatives of the President of Brazil, Ministers of States and Associations. The attendance was about 1000. The "Jornal do Comercio," the chief paper in Brazil, during the seven days of the Congress, dedicated many columns to reports of the proceedings, and published the speeches. The Vice-president of the Republic telegraphed to the Congress, congratulating it on its great success. The chief commercial associations had representatives at the Congress.

The Congress recommended the formation of a Commercial Esperanto Association, advised the workers to learn Esperanto, and supported the appeal for the Zamenhof memorial.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, apr., majo, jun.; **Austra Esperanto Raporto**, n-ro 4; **Belga Esperantisto**, mar.-apr.; **Esperanta Finnlando**, mar.-majo; **Esperantista Junularo**, nova formato, majo-junio, julio-aŭgusto; **Esperanto Triumfonta**, n-roj. 135-146; **France-Esperanto**, jun.-jul.; **Itala Esperanta Revuo**, apr.-majo, jun., jul.; **Katolika Mondo**, majo, jun.-jul.; **Internacia Stenografisto** ĉiudumonata gazeto; Ricevebla nur per aliĝo al la asocio. Direktoro, S-ro. P. Flageul, 9 Bd. Voltaire, Issy, Seine, Francujo, N-ro. 1, jul.; **Kristana Espero**, mar.-apr.; **La Fervoĵisto**, Dumonata fakrevuo, Lobeska ul. 12, Pezen, N-ro. 1, jul.; **La Espero**, apr., majo; **La Interligilo de P.P.T.T.**, majo; **La Progreso**, majo-jun.; **La Semisto**, mar.-majo; **La Unuigita Tuthomaro**, mar.-apr., majo-jun.; **La Verda Ombro**, majo; **Literaturo**, apr.-jun.; **Pola Esperantisto**, majo-jun.; **Sennacieca Revuo**, jun., julio; **Skandinava Esperantisto**, majo.

Multaj gazetoj, al kiu ni sendas nian gazeton, ne interŝangas aŭ sendas nur

malregule. Ni petas ilian bonvolan atenton.

PAGITAJ ANONCOJ. FILIIGITAJ GRUPOJ.

Australazia Esperanto-Asocio. Prezidanto, S-ro. A. R. Cohen. Sekretario, S-ro. G. Redfern. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejo, (Melburna sekcio), Hardware Club Chambers, 350 Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick Esperanta Grupo. Renkontejo kaj poŝta adreso ĉe F-ino. P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Renkontejo Eaton Bray lernejo Davey St., ĉiun duan mardon 7-30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

Iru Antauen Grupo. Prezidantino S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd. Oakleigh. Renkontejo 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

La Carnegie Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Renkontejo kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl St., Murrumbena. (du pordoj de la Carnegie Cinemteatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Nigra Cigno Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Renkontejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale. Prezidanto S-ro. H. Byatt, Sekretariino, F-ino. I. Thomas, Renkontejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

GARANTIA FUNDO.

L. W. Saw, 8/-; C. J. Crichton, 4/-; G. Meyer, 5/-; A. Klein, 6/6; F. T. Simon, £2; A. M. Carter, 5/6; L. A. Miller, 3/-; M. C. Trundle, 5/-; J. A. Hodges, 2/-; I. Majstrovich, 5/-; H. Ballantyne, 2/6; L. M. Glynn, 5/6.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 31a aŭgusto ni ricevis la jenajn sumojn:—A. M. Hopton, 4/6, ĝis majo '24; A. Ryan, 4/6, ĝis majo '24;

L. W. Saw, 4/6, ĝis julio '24; I. Leaby, 10/-, ĝis julio '23; C. J. Crichton, 13/6 ĝis junio '24; A. Klein, 13/6, ĝis majo, '25; H. V. Tilbury, 4/6, ĝis majo '24; W. J. Scott, 4/6, ĝis julio '24; A. H. Slade, 10/-, ĝis majo '25; A. M. Carter, 4/6, ĝis junio '24; L. A. Miller, 4/6, ĝis junio '24; J. Dobrich, 5/-, ĝis junio '24; J. A. Hodges, 5/-, ĝis junio '24; K. Takahaŝa, 5/-, ĝis aŭgusto '23; L. Irwin, 4/6, ĝis julio '24; G. H. Jansen, 5/-, ĝis majo '24; C. Caine, 4/6, ĝis majo '24; L. Steitz, 4/6, ĝis julio '24; T. Casey, 4/6, ĝis majo '24; T. J. Marsich, 3/-, ĝis julio '24; A. P. G. Marsich, 5/-, ĝis julio '24; J. E. Bonwick, 4/6, ĝis julio '24; L. M. Glynn, 4/6, ĝis aŭgusto '24; G. Zumaglino, 4/6, ĝis julio '24; A. Madarasz, 4/6, ĝis julio '24; kontantaj vendoj, 13/8.

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn ĈOKOLADOJN PER POSTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.c., kostas 3ŝ. (aldonu 6 p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokolaĵojn en kartonoj je 3ŝ 6d ĝis 2ŝ 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

PHILLIP ISLAND The Ideal Tourist Resort. 6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven. Accommodation for 50 Guests. ——— First Class Table. ———

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

Hall's Book Store 264 CHAPEL STREET ——— PRAHRAN ———

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

BONAJ DENTOJ **B**ONA SANO ONA ODORA SPIRO ONA RIDO ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers,
Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 40. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Octobro, 1923.

THE NURNBERG CONGRESS.

Another successful international Esperanto Congress has taken place. In spite of the state of unrest existing in Germany, more than 4000 Congress cards were issued to visitors from 43 countries. The Congress was held in Nurnberg during the first week of August. Professor Dr. Dietterle was elected President, and among the vice-presidents was S-ro. W. J. Drummond, the delegate from the Melbourne Esperanto Club. The President of the German Republic was directly represented at the Congress by State-Secretary Schulz; and Dr. Luppe, Lord Mayor of Nurnberg, took an active part in the opening, as he delivered an address of welcome in Esperanto, and, incidentally, showed that he had a good knowledge of the Esperanto movement, and was sympathetic to our aims.

After the formal opening, the first business was the reception of the report of the Lingva Komitato, and the report concerning the Akademiaj Konkursoj kaj Premioj. This announced that of the 32 competing works, six were elected for commendation, two of which—"Idoj de Orfeo" (de Bulthuis), and "Hermano kaj Doroteo" (traduko de Wuster)—were adjudged the best books of the year.

There was quite a competition to be selected as the meeting-place of next year's Congress, Vienna, Brussels, Sofia, and Milan each having advo-

cates. On being put to the vote, Sofia received 248 supporters and Vienna 215. The final decision, however, will be made by the Centra Komitato.

On the social side there was a banquet, attended by 700 Esperantists, a presentation of the German opera, "Die Meistersinger" ("The Mastersinger"), a variety show at the Literatura Mondo Cabaret, a madrigal concert, an instrumental concert, a presentation in the leading theatre (in Esperanto), of "Natan la Saĝulo," a vocal concert, and a fancy dress ball.

Some very practical questions were considered by the Congress. It was decided to request the national societies which had become united under the K. R. scheme, to compile official statistics, showing the number of groups and total number of members, and information under the headings, "Esperanto and Schools," and "Esperanto and Commerce," and also to compile a list of Esperanto publications from the year 1887. The Congress also expressed the desire that during future Congresses the agenda for the full Congress should include speeches by expert and eloquent Esperantists, on themes of world-wide importance and interest, which would provide subjects for discussion and debate.

There were 44 subsidiary specialist congresses; so it is impossible to name them all, much less so to outline the work they did.

Included in the week's activities

were a pilgrimage to the Albrecht Durer Monument, Church services (Protestant, Roman Catholic, Hebrew, Bahaists), a Freemasons' Convention, visits to municipal institutions, excursion to Schmausenbuck, visits to factories, picture theatres, and to the show places of the city. It would appear that the week was about as crowded with good things as was possible. The Congress was in all respects as great a success as any of its forerunners, and practical steps seem to have been taken to make future Congresses even more successful. Apart from the specialist sub-congresses, one does not look for results from the main Congress, other than the meeting together of Esperantists from different countries, thus fanning their enthusiasm and placing before the world the annual object lesson of the fitness of Esperanto for congresses attended by members speaking different languages, and the broadening influence resulting from the interchange of ideas between people from every corner of the world.

The consideration of the matters dealt with during the XVth Congress at Nurnberg, and working towards giving effect to them, will keep Esperantists busy until called upon to assemble next year at the chosen locale of the XVIth Congress.

(We are indebted to s-ro. George Gordon for the daily issues of "Esperanto Triumfonta," which he posted to us, day by day, from Nurnberg, during the sittings of the Congress, and to the journal named, from which we have extracted the foregoing.—Ed.

ESPERANTISTA AKADEMIO.

PRI LA LANDNOMOJ.

Antaŭ nelonge la Esperantista Akademio voĉdonis pri la formo de la landnomoj, kun preskaŭ unuanima rezulto, laŭ kiu la uzo de la finiĝo io eĉ kiel elekta, permesebla apud ujo ne estas konsilata.

Nun estas presita en "kolekto de la Akademio," "Vortaro de Oficialaj radikoj de Esperanto," kun listo de ĉefaj landnomoj (regnanoj). Ni redonas tiun liston.

Post la nomita listo sekvas jena noto: "La finaĵo io (ne sufikso) kiam internacia en landnomo ne estas kon-

traŭfundamenta (Germanio apud Germanujo, kiel evolucio apud evoluo Fundamento sekcio 15) sed tamen ne konsilinda, ĉar tute senutila komplikajo."

Ĉefaj Landnomoj (regnanoj).—
Listo de la Akademio.

EŬROPO.

Aŭstrujo (aŭstro).—Neniu motivo nun por la formo Aŭstrio. Belgujo (belgo), Britujo (brito), Anglujo (anglo), Irlando (-ano), Skotlando (-ano), Bulgarujo (bulgaro), Ĉeĥoslovakujo (-slovakio), Danujo (dano), Finnlando (-ano), Francujo (franco), Germanujo (germano), Bavarujo (bavaro), Prusujo (pruso), Saksujo (sakso), Grekujo (greko), Hispanujo (hispano), Holando, Nederlando (-ano), Hungarujo (hungaro), Italujo (italo), Jugoslavujo (-slavo) Norvegujo (norvego), Polujo (polo), Portugalujo (portugalo), Rumanujo (rumano), Rusujo (ruso), Svedujo (svedo), Svisujo (sviso), Turkujo (turko).

AZIO.

Ĉinujo (ĉino) aŭ Ĥinujo (ĥino), Hindujo (hindo), Japanujo (japano).

OCEANIO.

Aŭstralio (-ano), Nov-Zelando (-ano).

AMERIKO.

Kanado (-ano), Meksiko (-o, -io (-ano)), Usono (-ano), Argentino (-ano), Bolivio (-ano), Brazilo (-o, -io (-ano)), Ĉilio (-ano), Kolombio (-ano), Peruo (-ano), Urugvajo (-ano), Venezuelo (-ano).

AFRIKO.

Alĝerio (-ano), Egipto (-ano), Kaplando (-ano), Maroko (-ano), Tunizio (-ano).

MALFERMU LA PORDOJN DE LA LERNEJOJ!

(Pedagogia skizo post 15jara esp. instruado en lernejoj, de W. Hahn, GOHLIS, Dresden.)

—Kiu havas la gejunulojn, tiu havas la estontecon.—Tiu ĉi germana proverbo pruvis sian verecon ĉe la evoluo kaj efektivigo de multaj ideoj gravegaj por la homa kulturo. Ankaŭ rilate al la Esperanto—movado ĝi montras la solan vojon, kiu kondukas nin al la celo. Tion oni ĉiam sufiĉe konsideris, kaj valoraj propagandaĵoj, uzitaj sur malĝusta laborkampo, estas vane konsumitaj. Dum la lasta tempo eminentaj gesamideanoj sukcesplene laboris por la en-

konduko de Esperanto en la lernejojn, kaj la grava internacia konferenco okazinte dum la pasinta jaro en la palaco de la ligo de la nacioj en Genevo havis la saman celon.

Esperanto jam de kelkaj jaroj frapas la pordojn de la lernejoj. En multaj urboj kaj vilaĝoj oni permesis la eniron kaj instruadon, grandparte kiel laŭvola fako, parte ankaŭ jam devige.

Kiu penas, enkonduki Esperanton en la lernejojn, ĉiam devas aŭdi la samajn kontraŭdirojn: La lernejoj instruaj planoj jam estas tro plenigitaj; novaj fakoj ne povas esti akceptataj, ĉar la ĝisnunaj estas necesegaj rilate al speco kaj amplekso. Ĉi tiu opinio estas certe prava. Oni postulas multon de la lernejoj kaj interne de la oficialaj fakoj kelkaj pedagogoj kaj nepedagogoj havas siajn apartajn dezirojn. Tial la fortoj de la infanoj estas tute okupataj. Kiel instruisto oni devas konsenti ĉi tiujn kontraŭdirojn kaj ankaŭ kiel Esperantisto oni ne povas nei ilian verecon. Ĉu oni nun devas konkludi: Sekve ĉiu nova fako, ekzemple Esperanto, devas esti rifuzata? Tiu ĉi konkludo estus prava, se Esperanto estus plipezigo, plimalfaciligado de la lerneja instruado.

Sed kiu havas tiurilatajn spertojn tiu scias, ke la Esperanta instruado en la lernejoj ne plipezigas, ne plimalfaciligas la instruadon, sed ĝi apogas, helpas kaj plifaciligas la aliajn instruajn fakojn. Dum dek kvin jaroj mi ĉiam denove faras tiun ĉi sperton, ĉar mi instruas krom Esperanto ankaŭ la aliajn fakojn en la sama klaso. Batalante por la enkonduko de Esperanto,—ekzemple en gepatra kunveno,—mi povas pruvigi tion unue rilate al la gepatra lingvo, al kiu oni donas pro ĝia graveco la plej multan tempon kaj zorgon. Oni bone scias ke tre multaj gelnantoj forlasas la popolajn lernejojn post ok-jara lernado, pri kiuj oni ne povas diri: Ili perfekte scipovas la gepatran lingvon buŝe kaj skribe. La kaŭzo estas la gepatra lingvo mem. Ĝi es-

tas kun la multego da malregulaĵoj kaj arbitraĵoj tiel komplikita instruado, ke multaj eĉ post multjara penado ne povas uzi ĝin perfekte.

Jen Esperanto; ĝi povas helpi! Kompare kun la naciaj lingvoj esperanto estas tute logike konstruita kaj ne havas malregulaĵojn kaj esceptojn. Kvazaŭ en la spegulo de tiu ĉi logika fremdlingvo la infanoj ekkonas la propran gepatran lingvon. Gramatikaj malfacilaĵoj baldaŭ estas venkataj senpene. La lingva sento kreskas. La senco de multaj vortoj, metaforaj kaj alegoriaj esprimoj kaj frazoj estas pli klare komprenata de la infanoj, kaj per tio ili bone penetras en la spiriton de la gepatra lingvo kaj ekkonas ĝian belecon. Tial ĉiuj Esperantaj geinstruistoj, kiuj ankaŭ instruis la gepatran lingvon, spertis, ke la Esperanta instruado multe apogas kaj helpas la plenan lernadon de la gepatra lingvo. Ankaŭ neesperantistaj kolegoj konstatis tre rimarkeblajn progresojn en la gepatra lingvo de post la esperanta instruado.

Sed ankaŭ por la aliaj fakoj la helpo de Esperanto montriĝas. En la natursciencaj fakoj la fremdaj vortoj ne plu estas malfacilaj. La esperantaj infanoj povas traduki kaj klarigi ilin. La geografia instruado fariĝas vivoplena kaj efektiva, se la lernantoj alportas siajn bildojn, poŝtkartojn kaj leterojn, kiujn sendis la alilandoj gamikoj. Fiere ili komunikas al la klaso:—Mia esperanta amiko skribas al mi pri sia hejmlando tion kaj tion.—La instruisto ordigas kaj aldonas. Tia instruado ne plu estas teorio, tia instruado ne donas nur nebulan imagon pri fremda lando, kiu ne tre interesigas, ĉar oni certe ne povas vojaĝi tien,—ne, tio estas vero kaj vivo kaj memlaboro, ĉar inter la gelnantoj kaj la fremda lando kun ĝiaj loĝantoj ekzistas interrilatoj personaj kaj plej interesaj por la infanoj. Tial preparita kampo pli bone akceptas kaj enradikigas la semerojn dissemitajn de la instruisto, kaj ankaŭ la laboro de la memoro estas plifaciligata.

Daŭrigota.

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POSTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3s. (aldonu 6p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokoladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

DU HUNDOJ KAJ PALISARO.

de Henry Lawson.

Nenio pli multe frenezigas hundon kiam li ne povas eliri—diris Mitchel—ol kiam alia hundo venas al la ekstero de lia palisaro, enflaretas, kaj bojas kontraŭ li tra la fendoj. Eble la alia hundo estas tute nekonatulo; eble li estas malnova kunulo, kaj ne bojas—nur enflaretas—sed tio estas tute egala al la hundo ĉe la interno. La interna hundo ordinare komencas la malpacadon. Tiam la ekstera hundo fariĝas kolera, freneza, nur pro tio, ke la interna hundo koleriĝas, frenezigas kaj faras tiom da sensenca malkvieto tute pri nenio; kaj tiam la ekstera hundo bojas siavice kaj igas la malpacan miloble pli brua, kaj la interna hundo ŝaumas ĉe la buŝo, disjetegadas ŝaŭmon, kaj faras tiom da bruigo, kiom povus fari miliono da ŝtalaj kaptiloj.

Mi ne scias kial la interna hundo fariĝas tiel freneza pri la afero; eble li ekpensas ke la ekstera hundo trovas lin en malbona situacio kaj tial agas kontraŭ li malestime; sed kia ajn estas la kialo, ju pli longe la malpaco daŭras des pli freneza li fariĝas; fine li fariĝas tiel freneza, ke li estas preskaŭ preta ekformordi sian propran voston kaj ĝin disŝiri, pro tio, ke li ne povas eliri kaj dispecigi la alian hundon; se li ja elirus li nepre mortigus la alian hundon, aŭ penegi tiel fari, ĉe se tiu estus sia propra frato.

Iafoje la ekstera hundo nur ridetas kaj trotas for. Iafoje li afable redonas bojon; iafoje li ellasas neatente duon da bojoj por esprimi ke, kvankam la afero estas seninteresa por li, li sentas, ke li devas diri ion; ĉar tio estas atendata pro lia digno kaj hundeco en la cirkonstancoj; iafoje la ekstera hundo, se li estas malgranda hundo, eksaltas for de la palisaro ĉe la neatendata surprizo, aŭ, se li estas malrespektema hundo, unue li sin certigas, ke la interna hundo ne povas eliri, kaj tiam li ricevas iom da amuzo.

Estas amuze vidi grandan hundon de la novlanda raso kun larĝa bonkora ridego sur sia vizaĝo, enflarantan ekster palisaro la tutan tempon, dum la interna hundo bruegas po tridek bojetoj en ĉiu sekundo, kovradas sian buŝon per ŝaŭmo, disjetadas ĝin tra la fendoj, kaj furioze streĉadas kaj skuadas ĉiun artikon en sia korpo ĝis la lasta artikulo en sia vosto.

Iafoje la interna hundo estas malgranda hundo, kaj ju pli malgranda li estas des pli li bruegas ĉar li tre scias ke li estas sendanĝera. Kelkafoje okazas, kiel mi antaŭe diris, ke la ekstera hundo estas kolereza hundo, kiu malamas malpacadon, kaj neniam volas havi malkonsenton kun iu ajn—tute simile al multaj pacemaj homoj, kiuj malamas malpacojn, kaj ĉiam estas afablaj, ĝentilaj, laŭ maniero malagraba kaj moka kvankam ĝentila, kiu dezirigas vin forfrapi al ili la kapojn de la ŝultroj; homoj kiuj neniam komencas malpacadon sed daŭrigas ĝin, faras ĝin miloble plimalbona, kaj nur tial, ke ili ne komencis ĝin—homoj kiuj diradas, ke ili ne komencis ĝin sed iu alia. La koloreza ekstera hundo kiu furiozas kontraŭ la alia hundo pro tio, ke ĉi tiu koleriĝis, diras:—Kial vi faras tian bruigon? Kio estas al vi, He?—Kaj la interna hundo diras:

—Al kiu, vi pensas, ke vi parolas? Vi malbelega— Mi— kaj tiel plu. Tiam la ekstera hundo diras:

—Vi sencerbulo! Vi estas pli malbona ol malpacema maljuna hundino!

Tiam la bruigo plifortiĝas oni povas ĝin aŭdi de kelkaj mejloj; ĝi estas ĝuste simila al Ĉina milito.—simila al cent pafitegoj pafantaj po okdek senkuglaj kartoĉoj en ĉiu momento, kaj la ekstera hundo iĝas tiel same avida eniri po: elmanĝi la internan hundon, kiel la interna hundo eliri per seninternaĝi tiun. Tamen se du hundoj antaŭe okaze sin renkontus ekster la palisaro eble ili afable interparolus, fariĝus bonegaj amikoj, ĵurus eternan kunulecon, kaj sin akompanus

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET

PRAHRAN

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

hejmen!—(El "While the Billy Boils"
—Tradukis George Gordon, "Gego.")
(Presigita laŭ la afabla permeso de
la posedantoj de la aŭtorrajtoj, Angus
& Robertson Ltd., 89 strato Castle-
rcagh, Sidnejo.)

SOVAG 'AJ BIRDOJ ELKOVAS, KOKIDOJN.

Strangan scigon oni ricevis el Hay,
kiu estas urbo en Nova Sud-Kimrujo.
Samuel Proctor, lima zorganto ĉe Gre
Gre ranĉo, rakontas la jenan aferon,
kaj la posedanto de la ranĉo atestas
la verecon de la rakonto.

Pro tio ke li ne povis havigi al si
koveman kokinon, Proctor pensis, ke
estus bone utiligi kiel kovilojn la
sovagajn, indiĝenajn birdojn, kiuj tre
okupadiĝas nuntempe pri la nestoj. Li
elserĉis la neston de korniko, en kiu
sin trovis kelkaj nove metitaj ovoj.

Li kolorigis 3 ovojn de kortbirdino
malklare verdaj, por ke ili simulu la
ovojn de korniko, elprenis la ovojn
de la korniko kaj anstataŭis tiujn de
la kortbirdino. Tiel li agis ankau ĉe
nesto de akcipitro.

Kiam estis tempo por la elkoviĝo de
la kokidoj, li trovis 3 kortbirdetojn en
la nesto de la korniko.

Proctor diris, ke de tiam li spertis
egalan sukceson ĉe aliaj nestoj, kaj
jam li estas kulturanta 11 kortbirde-
tojn, kiujn elkovis kelkaj kornikoj.

Nur unu kokidon elkovis la akcipi-
tro el tri ovoj. Proctor opinias, ke
la kialo estas por tio ke la nesto ne
estis varme remburita.

Nuntempe Proctor havas 50 ovojn
dismetitaj inter kelkaj nestoj de kor-
nikoj. (F.M.H.)

S-ro. Percy Hudson parolis pri Es-
peranto al la Malverna Klubo por
Knabinoj, (Malvern Girls' Club), la
13an de septembro. La kvindek ĉeest-
tantoj aŭskultis tre atente kaj du
el ili aniĝis al la Esperanta rondo. Ĉiu
promesis fabriki po unu veston por
sendi al la suferintoj de la Japana
terskuego.

RECENZOJ.

Idoj de Orfeo, de H. J. Bulhuis
(L.K.). Mendebila ĉe Centra Esper-
anto-Librejo, 's-Gravenhage, Neder-
lando.

Estas ja nur malofte, ke la Esper-
antistaro havas la okazon legi tiel
grandan originalan verkon, kiel estas
la, "Idoj de Orfeo." En la amplekso
de 540 paĝoj la vivhistorioj de la tri
ĉefaj personoj estas tutplene rakonti-
taj de la infanaĝo ĝis frua vireco. Pro
la fakto ke la verko priskribas la tra-
vivadojn de tri knaboj, kiujn stranga
sorto metas sub la zorgo de personoj
tute fremdaj al ili, kaj, ke la rezul-
tato devas esti la sama—ĉiu devas fa-
riĝi majstra muzikisto—estas unoto-
neco de temo. Spite de la scio ke ĉio
finiĝos bone la intereso de la leganto
estas bone streĉita ĝis la lasta paĝo.
La priskribo de la kariero de la unue
prezentita knabo, Jafet, estas eble la
plej bona parto de la romano. La
skizo de lia vivo sur malgranda insulo,
en kunesto nur kun liaj (kiel li pensis),
gepatroj, hundo, kato, kaprino kaj pa-
pago alportas rememorojn de libro tre
amata de tiuj, kiuj legis ĝin dum la
infanjaroj. Tiu libro—Robinson Cru-
sue—estis unu el la du libroj sur la
insulo, kaj sendube nia aŭtoro loki-
gis ĝin tie ĉar ĝi estis de li tre ŝatata.
La klara simpleco de la stilo tre simi-
las tiun de la verkinto de "Robinson
Crusoe." Ke tiuj komparoj sin pre-
zentas al angla leganto estas pruvo de
la ĉarmhavaj allogoj de la nuna verko.
Nenecese estas malkaŝi la temon.
Ĉiu, kiu komencos legi la libron, faros
tion por si mem, ĉar certe estas, ke
ĉiu, kiu komencos legi ĝin interesiĝos
ĝis la fino.

Inter la plenaj priskriboj, vere kor-
tuŝanta estas tiu de Rika, la surdmu-
tulino. Ĝi metas antaŭ la okuloj la
plorindan animstaton de tiaj malfeli-
ĉuloj kaj vekas en la koro senton de
kompato por la suferantoj. Bona an-
kaŭ estas la priskribo de la hundosi-
mila fideleco de Ivan, la gibhava
markuiristo, al Johano, la magia bon-

PHILLIP ISLAND The Ideal Tourist Resort.

6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven. Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing,
Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

faranto al ĉiu ajn. La verko estas plena de mallongaj priskriboj, kiuj vidigas la personojn tiel klare kaj trafte, kiel vinjetoj. Ke multaj el ili estas evidente enmetitaj nur por pli-grandigi la libron neniel senvalorigas ilin.

En neniu antaŭa romano estis Esperanto tiel nature enkondukita kiel ĉitie, kaj kvankam la leganto kiu povas legi ĝis tiu punkto estas persono kiu ne bezonas esti konvertita al Esperantismo, oni ne povas ne vibri je plezuro, ke nia lingvo ekzistas por plenigi ĝis la rando la pokalon de feliĉo de la tri "Idoj de Orfeo."

Ĉi tie ne estos kritiko de la gramatiko. Ĉiu konsentas ke Macaulay havis bonan, plaĉan stilon en la Angla lingvo, sed iufoje severa gramatikisto substrekis eraron en sia ekzemplero, sur preskaŭ ĉiu paĝo. Sed oni ankoraŭ legas la verkojn de Macaulay kaj ĝuas ilin.

Oni ne devas pensi, ke multaj gramatikaj eraroj sin trovas en la nuna verko. Fakte nur kelkaj vidiĝis, kaj en libro de tia grandeco oni ĉiam atendos vidi iujn. La stilo de la aŭtoro estas malsimila al tiu de Meyer, de Vallienne, de Luyken, sed, tamen, ĝi estas plaĉa, fluanta kaj, super ĉio, facile komprenebla.

S-ro. Bulthuis skribis romanon, kiu sendube alportos ĝuon al miloj de Esperantistoj kaj metis en iliajn manojn unu pluan refuton de la ofta aserto ke Esperanto havas nenian literaturon. —(C. W. B.)

"La Lulilo." teatraĵo en kvar aktoj de D-ro. Alois Ausserer, Esperantigis, D-ro. Franz Christanell. Eldonisto V. Hopling, Munchen.

(Ĉiu recenzata libro estas mendebla, ĉe A. E. A., Melburno.)

AGRABLA AVIZO.

Ni ĝojas, ke la poŝtofiĉejo nun akceptos ĉi tiun gazeton, kiel novaĵjurnalon. Pro tio, ke la poŝtpago por la gazete estonte estos malaltigita, la eldonistoj esperas, ke abonantoj (se ili ne kutime bindigas siajn ekzemplerojn), sendos ilin aŭ al fremlanduloj aŭ al lokaj neabonantoj, por disvastigi nian aferon kaj eble allogi la ricevintojn fariĝi abonantoj.

KELKAJ SUGESTIOJ POR PROPAGANDO.

Membroj de la Sidneja Esperanto-Societo, kiuj ĉeestis la kunvenon je la 20a Septembro, ĝuis tre informan lecion de s-ro. F. T. Simon pri la ĉiam absorba temo "Propagando."

La prezidanto de la societo, post la parolado, diris, ke oni malofte aŭdis tiel interesan kaj instruplenan esperantan lecion kiel la ĵus faritan kaj plezure proponis, ke raporto estu sendota al "La Suda Kruceto," por ke esperantistoj ekster Sidnejo profitu per la valoraj sugestioj de s-ro. Simon. La propono estis aklame akceptita.

Komence le paroladanto klarigis la diversajn metodojn de propagando, nome personan, ĝeneralan kaj publikan kaj tiam pritraktis ilin laŭvice. La plej gravaj punktoj, s-ro. Simon diris, estas: Bone sciu tion pri kio vi parolas aŭ skribas. Se vi iom dubas estas preferinde silenti. Oni riskas tro multe per konjektado. Due, neniam troigu! Per troigo oni perdas pli ol oni gajnas. Ni havas en nia movado tiel multe preparoli, ke troigo estas tute nenecesa.

Akiri propagandajn temojn estas tre facila afero, nur necesas legi bonan esperantan gazeton, memori okazajn kaj rediri ilin. Legu ĝin (aŭ ilin) en trajnoj, tramoj, oficejoj kaj ĉe via laboro: ĝi ne nur pliperfektigos vin mem, sed atentigos aliajn pri nia afero. Parolu en konvena maniero, sen tro da fervoro kaj ne lacigu aŭ plenplenigu la aŭdantaron.

Kutima demando estas "Ĉu Esperanto faras ian progreson nun?" Por Aŭstralianoj le respondo estos pli interesa se oni donos ekzemplojn faritajn de Aŭstralianoj eksterlanden, ekzemple s-roj. Maurice Hyde, Percy Hudson, George Gordon, J. G. Pyke, Roy Rawson, kaj nun W. J. Drummond.

Tiam oni povas diri pri lernejoj. Memoru, kiam vi detalas la landojn, precipe nomi la lernejojn en Anglujo kaj Skotlando, ĉar Angloj pli interesas en ili ol en fremdlandaj. Portu la raporton de la Ligo de Nacioj en kiu troviĝas kompleta historio kaj statistiko.

Alia konvinka argumento estas la raporto de la Internacia Komerca Konferenco en Venecio. Lasu komercistojn legi ĝin private kaj proponu traduki por ili korespondajn aŭ meti ilin en rilatojn kun aliaj komer-

cistoj. U. E. A. Delegitoj povas doni valoran helpon.

Se demandanto serĉas informon pri religio, ne priridu la aferon, eble vi ofendos lin. Ni ĉiuj ne pensas same kaj kio estas agrabla al vi, povas esti tre malagrabla al alia persono. Eĉ se personoj uzas Esperanton por disvastigi religion estu tolerema kaj ĝuu, ke ili uzas Esperanton.

Rilate al ĝenerala propagando S-ro. Simon diris—Nia movado en Aŭstralio estas rimarkinde malgranda proporcio. Kial? Ĉar ni ne interesas influajn personojn. Per tio mi ne intencas sugestii, ke la gubernatoro aŭ la ĉefurbestro devus esti Esperantistoj. Tute ne! Influaĵoj estas: instruistoj, komercistoj kaj redaktoroj.

—Publika parolado estas grava flanko de propagando. Oni elektu nur bonajn paroladistojn kaj ne personojn kiuj nerviĝas, koloriĝas, parolas neklare, aŭ en kiuj ni kiel Esperantistoj, ne havas kompletan konfidon. La parolado ne estu nura seka raportado pri niaj sukcesoj: rakontu iom el la historio de Esperanto. Ĝi havas honoran devenon. Aldonu ankaŭ pri propraj spertoj: korespondado, interŝanĝado, legado, vojaĝo, k.t.p., kaj ne forgesu anonci la adreson de la plej proksima grupo, aŭ disdoni foliojn kun tiu adreso.

—Finfine, ĉiam portu la verdan stelon, ĉiam parolu Esperante ĉe publiko kiam vi estas kun alia Esperantisto. Ne timu erarojn, la neesperantistoj ne rimarkos ilin! Ĉiam memoru, ke Esperanto estas ordinara, praktika, proza, ĉiutaga, funkcia afero. Parolu nature pri ĝi kaj ne en terminoj de projekto, resaniganto de ĉiuj eblaj malfeliĉoj de la mondo, nova religio aŭ miraklo. Ĝi ne estas tio, ĝe estis konstatita de plej alta aŭtoritato kiel "Vivanta Lingvo."

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K. — The Sydney Municipal Library (Sidneja Urba Biblioteko) mendis 55 novajn librojn por ĝia Esperanta sekcio. La sortimento konsistos el romanoj, noveloj, dramoj, instruaj kaj teknikaj libroj, sub eksterbaro de lernolibroj de kiuj la biblioteko jam posedas sufiĉajn, kaj montros al la publiko la stadion kion Esperanto atingis en literatura mondo.

En West Marrickville publika lernejo propaganda parolado okazis je 29 aŭgusto, sub aŭspicioj de Parents' and Citizens' Association (Gepatra kaj Civitana Asocio). S-ro F. V. Taylor, parolis pri Esperanto en lernejoj s-ro L. E. Pfahl pri Esperanta progreso komerce kaj s-ro G. H. Chappel klarigis la senton de nia afero. Ĉirkaŭ 40 personoj ĉeestis kaj postaj demandoj pruvis la vekigitan intereson.

Ĉiusemajnaj prelegoj kaj muzikaĵoj daŭrigas ĉe Sidneja Esperanto-Societo. S-ro. L. E. Pfahl, en lekcio pri "Esperanto en praktiko" je 27 septembro, donis multajn bonegajn ekzemplojn de praktika uzado de Esperanto en diversaj partoj de la mondo. Li tre konvinke prezentis la temon kaj oni esperas, ke li same sukcesos ĉe komercistoj. La societo iras tre bone kaj oni jam rimarkas plibonigon en la parolado de membroj.

LINGVA KOMITATO.

Laŭ la decido de la Lingva Komitato la formoj: analog', konfidenc', nekrolog', budĝet', estas aprobitaj kiel oficialaj formoj (kontraŭ la formoj: analogi', konfidenci', nekrologi', buĝet' aŭ budĝet', budjet').—Plimulto de la L. K. ankaŭ preferas: Jezu' (kontraŭ Jesu') kaj ark' (kontraŭ arh'), sed pro la nesufiĉeco de la plimulto en "Oficiala Radikaro" ambaŭ 2 formoj ankoraŭ restos (kaj plie: Jesuito apud Jezuito). La ĝenerala uzado decidus.

BONAJ DENTOJ **B** **ONA SANO**
ONA ODORA SPIRO
ONA RIDO
ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro, E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

NEKROLOGO.

Kolonelo John Pollen, la mondkonata pioniro kaj propagandisto de Esperanto, mistere malaperis en la insulo Manx, en la vespero de la 18a de junio. De tiam nenio sciigis pri li ĝis la 22a de julio, kiam lia korpo troviĝis ĉe Auchencairn, malgranda vilaĝo sur la sudokcidenta bordo de Skotlando. Oni povas supozi, ke nia amata samideano promenante apud la maro, akcidente enfalis, dronis kaj forportiĝis. Tiel forpasis unu el la plej ĉarmaj homoj kiuj iam vivis. Al lia tuta parenkaro ni etendas nian tutkoran simpatian.—(El "British Esperantist.")

GAZETOJ RICEVITAJ.

La Lumturo, 2-semajna peresperanta politika gazeto tutmonda por la intereso de homoj, 60 Langenstr. Bremen, n-ro. 1. **Esperantio**, ilustrita aperas duonmonate, Fach 18 Charlottenburg, Germanujo, n-ro. 1.

Belga Esperantisto, maj-jun.; **Esperanto Triumfonta**, n-roj 147, 148, 149, 150, 153; **Espero Teosofia**, maj-aŭg.; **Export Esperantist**, apr-maj.; **Int. Medicina Revue**, n-ro. 4;

Oni povas mendi tole binditan jar-kolekton de "La Suda Kruco," el la dua kaj tria jaroj. Prezo 5ŝ. Leterkesto 1367, P.O. strato Elizabeth, Melbourne.

"Lanuna adreso de **S-ro S. Polotynski** (la Pola muzikisto kaj ĵurnalisto) estas: 74 Georges Riv. Rd., Croydon (Sydney), Aŭstralio."

FILIIĜITAJ GRUPOJ.

Australazia Esperanto-Asocio. Prezidanto, S-ro. A. R. Cohen. Sekretario, S-ro. G. Redfern. Poŝta adreso Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejo, (Melburna sekcio), Hardware Club Chambers, 350

Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick Esperanta Grupo. Renkontejo kaj poŝta adreso ĉe F-ino. P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd. Berwick, jaŭde vespere, je la oka horo.

Dargaville Esperanto Society. — Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O., Dargaville, N.Z. Renkontejo, la legosalono de S-ro. A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo, renkontejo Eaton Bray lernejo Davey St., ĉiun duan mardon 7-30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sekretaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

Iru Antauen Grupo. Prezidantino S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Renkontejo 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

La Carnegie Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Renkontejo kaj poŝta adreso, "Kirkcald," 10 Woorayl St., Murrumbena. (du pordejoj de la Carnegie Cinemteatro) jaŭde vespere, je la oka horo.

Nigra Cigno Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey. Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Renkontejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. jaŭde.

Persista Grupo, Armadale. Prezidanto S-ro. H. Byatt. Sekretariino, F-ino. I. Thomas. Renkontejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. — Prezidanto, S-ro. D. Tilly. Sekretario, S-ro. Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro. Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Renkontejo, La domo de S-ro. Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 39 Elizabeth Street, Melbourne.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 41. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Novembro, 1923.

ANNUAL MEETING OF THE AUSTRALASIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

The third annual meeting was held in Melbourne, on 21st September. There was a very satisfactory attendance of members. The president (Mr. A. R. Cohen), reviewed the work of the year, and expressed the hope that the same enthusiasm and willingness to assist would be shown during the forthcoming year. The secretary (Mr. G. Redfern) then read his report, which, omitting a few paragraphs for which space is not available, is as follows:—

"It might be well to review the hopes expressed in the last report, and the success or otherwise in fulfilment of same.

We mentioned the possibility of a second night of meeting in Melbourne, to enable us to reach all our members. This did not come to pass, but in its place our members have freely joined with suburban groups, and have helped to establish and maintain those young shoots. Members were urged to study, with the object of becoming efficient teachers of at least one group or class. To a small extent this has been done, but not sufficiently. Our central meeting in Melbourne has been a feeder for other groups, and this should still be our purpose. It was hoped that Adelaide would re-establish its groups. This was accomplished. Thanks to S-ro.

Waterman, Adelaide, is now affiliated with the Australasian Esperanto Association.

The year ended June 30th, 1923, was a notable one, in that during the year was held the fourth All-Australian Congress of Esperantists, under the presidency of S-ro C. W. Ballard. The work of managing and arranging the Congress, which was held in Sydney, naturally fell to the lot of Sydney members of the Australasian Esperanto Association. That it was successful goes without saying. Ninety-one Congressists attended, every State and New Zealand being represented, with the exception of Tasmania. Chiefly was it successful from a propaganda point of view, much publicity being given to our Movement.

Another notable event was the return of S-ro Hudson from an extended tour of Europe, in which he attended international congresses at Prague and Helsingfors, at each of which he acted as delegate from the Australasian Esperanto Association, accompanied at the latter by S-ro G. Gordon as fellow-delegate. Members should be pleased with the fact that we were again represented at an international congress, this time at Nurnberg, by a lady — F-ino Ely, and by S-ro Gordon.

A great advertisement for Esperanto was gained by its recognition at the State-schools Exhibition in Mel-

bourne. Thanks to the work and influence of S-ro Wallace, of the Education Department, a space was allocated for an Esperanto exhibit. Much valuable propaganda work was done.

A prize for an essay on Esperanto, in Esperanto, for Melbourne members, was won by F-ino Blyth, of the Mont Albert Group.

New Groups were formed, during the year, at Carnegie, E. Malvern, Lilyfield (Sydney), Melbourne Rationalist Association, Berwick, and Sandringham.

The Teachers' Conference, in N.S.W., carried a resolution favorable to Esperanto, but the Minister of Education was unfavorable to their proposal. The teachers in Victoria also had a resolution on the agenda, but this was not debated, owing to pressure of time. The number of teachers now interested in Victoria is an assurance of success when this resolution eventually comes before their Congress.

Arising out of a congress resolution that propaganda committees be formed in each State, meetings of secretaries of groups are now held in the rooms of the Australasian Esperanto Association, Melbourne.

A goodly sum was raised for the funds of the U.E.A. by the co-operative efforts of the A.E.A. and Melbourne Club.

Propaganda lectures were delivered by the secretary and president, and lectures on his experiences abroad were given by S-ro. Hudson, both in Melbourne and Sydney.

In Sydney, progress has been slow, but the full fruits of the Congress effort are not yet known. In other States and New Zealand, progress is also slow, in spite of efforts of enthusiasts.

It is due to all the officers of the Association to state that they have performed their work with unselfish zeal, and in every way possible, with limited time available, have done their best to forward the interests of the Movement and of the Association.

The report was duly received and adopted. Mr. H. Byatt was appointed Melbourne vice-president; Mr. Percy T. Hudson, secretary; Mr. G. Redfern, organiser; Mr. E. J. Cox, treasurer; and Mr. C. Kelly, librarian.

Clause 18 was deleted from the Constitution. This provided for amendments being made only at the annual general meeting. Any alterations and improvements may now be made at any time, if approved by a majority of the members.

After thanking the journal committee, which is responsible for the publication of "La Suda Kruco," the meeting concluded.

C'IUJARA KUNVENO DE LA U.E.A.

La jara kunveno de la Universala Esperanto-Asocio, okazis la 24an de oktobro, en la kunvenejo de la Melburna Esperanta Klubo. Le Ĉefdelegito (S-ro. C. W. Ballard), raportis pri sia agado dum la pasinta jaro. Li ankaŭ informis la ĉeestantojn pri la nuna neforta stato de la societo, kaj klarigis, ke kaŭze de la mizerega malriĉeco de multaj Eŭropaj membroj pli ol 25 pro cento de la tuta membraro en la lasta jaro devis esti eksigita pro nepago.

Sinjoron Rawson li dankis por la organizo de du koncertoj, (la unua en aŭgusto kaj la dua en oktobro), el kiuj li povis sendi al la Centra kaso la sumon de dek ses funtojn du ŝilingojn. La delegito ankaŭ dankis la bonvolemon de la geludintoj de la du komedioj prezentitaj kaj gratulis ilin pro ilia sukceso sur la scenejo. Anoj de la Australazia Esperanto-Asocio partoprenis en la komedio, "Angla Lingvo Sen Profesoro" kaj membroj de la Melburna Esperanta Klubo bone ludis "Consilium Facultatis."

Poste, laŭ afabla invito, li parolis Angle al la tuta ĉeestantaro pri la objektoj kaj utilaj servoj de la Asocio kaj petis ilian helpon por trovi novajn anojn por anstataŭigi tiujn, kiuj en la nuna tempo ne povas finance subteni la Asocion.

En la Vatikano dum 1925, estos kunveno de konsilantaro, en kiu projekto unuigi ĉiujn kristanojn estos pridiskutata.

Post kiam la aliaj Balkanŝtatoj kaj Rusujo akceptis la Gregoran Kalendaron, Grekujo ankaŭ forigis la uzadon de la Juliana Kalendaro.

MALFERMU LA PORDOJN DE LA LERNEJOJ!

Daŭrigo.

Simile oni povas pruvi la gravan helpon de Esperanto por la aliaj fakoj: estas ja nur necese, ke oni rakontu, kion ni faras dum la esperanta instruado. Ni interparoladas, legas, tradukas, korespondas kun alilandaj geamikoj, kantas, ludas k.t.p. Historiajn verketojn, klasikajn literaturpartojn kaj fablejn, moralajn kaj klerigajn rakontojn enhavas nia esperanta legolibro. Entute ne ekzistas lerneja fako, kiu ne estas esperante pritaktata dum la esperanta instruado.

Plue mi montru alian utilon de esperanto! Ĉar la helplingvo estas tre



logika, la infanoj devas klare preni kaj kapti la penson, antaŭ ol ili elparolas ĝin. En la gepatra lingvo ili senzorge parolas kaj skribas ne ekkonanta la internajn reciprokojn interrilatojn de la ideoj kaj esprimoj. Sekve la esp. instruado devigas la infanojn logike pensi: ĝi akriĝas la intelekton kaj estas per tio la plej bona helpo por la tuta instruado.

Oni nun plue kontraŭdiros ke la instruado de aliaj fremdaj lingvoj havas la samajn sekvojn, la saman formalan instruan valoron. Al tiu opinio oni povus konsenti, se la lasta celo de

la lingva instruado, la plena scipovo de la fremdlingvo, estas ebla. Tiu-kondiĉe la instruado de fremdaj lingvoj estas rajta, kaj kontraŭbatali ĝin pro Esperanto estas granda eraro tre malutila al Esperanto; ĉar per tiu kontraŭbatalo la lingvaj instruistoj fariĝas niaj kontraŭuloj anstataŭ esti niaj plej kapablaj helpantoj. Sed en kiuj lernejoj la supre nomita celo, la plena scipovo de la lingvo, estas atingata? En la germanaj superaj lernejoj oni lernas krom la latina la anglan kaj francan lingvojn dum 6 aŭ 9 jaroj. Sed tamen nur malmultaj estas kapablaj, praktike kaj lerte uzi ilin en la fremda lando. Ankaŭ en la popolaj lernejoj oni havas fremdlingvajn kursojn, sed estas kompreneble, ke plena lernado estas tute neebla. Tial precipe por la amaso de tiuj gelnantoj Esperanto estas vera bezono. Per la lernado de Esperanto ni havas ne nur la gajnon de bonega formala klerigilo, sed ni atingas ankaŭ la plenan buŝan kaj skriban scipovon de lingvo, kiu estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo. Ambaŭ valoraj rezultoj estas sufiĉe gravaj, por kauzi, ĉiu por si mem, la enkondukon de Esperanto en la lernejojn. Ili estas atingataj per pli malgrandaj penoj dum pli mallonga tempo.

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la korespondado! La internacia korespondado estas grava parto de la esperanta instruado ĝi estas kvazaŭ la unua praktika provo, la unua propra sperto por la efektiva valoro de Esperanto kiel internacia lingvo. Mi aranĝis la korespondadon por miaj gelnantoj kutime post duonjara instruado. Tiam la unua brulanta entuziasmo estas iomete moderigita per la necesa laboro kaj lernado, kaj nun la korespondado kiel nova incitilo estas bonvena. La korespondado estas duspeca. La unua speco estas la korespondado kun alilandaj infanoj. Depost multaj jaroj mi ĉiam trovis alilandajn gekolegojn, kiuj havis la samajn dezirojn por siaj gelnantoj. Unue la infanoj letere babiladas pri

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendii niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POSTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.c., kostas 3s. (aldonu 6p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉokoladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

simplaj aferoj, rakontas pri siaj familianoj k. t. p. Baldaŭ kelkaj interŝanĝas poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Ili raportas pri esp. festetoj; eĉ desegnaĵoj estas reciproke sendataj. La instruisto iom direktas la aferon, kaŭzas geografiajn kaj aliajn demandojn, kaj la ricevitaĵoj respondoj helpas al la instruado.

La dua speco estas la korespondado de miaj gelnantoj kun alilandaj plenkreskaj gesamideanoj, plejmulte ĝinstruistoj. Okaze de la internaciaj kongresoj mi trovis inter miaj alilandoj gekonatumoj afablajn gesinjorojn, kiuj havas grandajn meritojn tiurilate. La valoro de la korespondado kun tiaj plenkreskuloj estas nenikomprenible tre granda. La ilustritaj kartoj estas bone elektitaj karakterizaj bildoj de fremdaj landoj, popolaj kutimaj, naciaj kostumaj k. t. p. La teksto enhavas valorajn instruigajn klarigojn en bona Esperanto. Tiu amika helpo de alilandaj gekolegoj estas granda ofero, pro kiu infanoj kaj instruisto ŝuldas koran dankon.

Pruvi la valoron de Esperanto por la lernejo rilate al moralaj kaj homaranaj vidpunktoj, tio estas aparta bona tasko.

La ĉefan enhavon de mia skizo mi esprimas resume per jenaj frazoj: 1. La instruado de Esperanto helpas la plenan lernadon de la gepatra lingvo, 2. La instruado de Esperanto helpas kaj apogas la realajn instruajn fakojn, 3. La instruado de Esperanto devigas la infanojn, pensi logike kaj estas tial bona akriĝilo de la intelekto, 4. Entute: Esperanto ne estas plipezigo kaj plimalfaciligo sed grava helpo de la lerneja laboro. La tempon kaj forton, kiujn la infanoj bezonas por la lernado de Esperanto, ili duoble regajnas pro la akirita ĝenerala klero kaj instruiteco.

Ni zorgu, ke la kontraŭuloj eksciuition!

[La supra artikolo estos interesa por Aŭstralianoj, ĉar per la lumbildoj de S-roj. Pyke kaj Rawson ili ofte vidis la verkinton, lian lernejon kaj lernantojn. Pri la vizito al la lernejo la sinjoroj diras,—unu el la plej plezurplenaj tagoj, kiujn ni pasigis en Eŭropo estis tiu en kiu ni vizitis ĉi-tiun lernejon.—Red.]

NEKROLOGO.

Richard Sharpe, ("Ro ŝo"), mortis ĉe la domo de sia filo je la 1a de aŭgusto. Pro "Travivaĵoj" ni ĉiuj konsideris lin bone konata amiko. Li ĉeestis multajn kongresojn kaj ĉiam bone laboradis por nia movado. Ni tre sincere bedaŭras lian morton.

Sinjoro William Macdonald, M.A., tre konata Melburna samideano mortis antaŭnelonge. Li estis tre helpema al junaj lernantoj kaj li pli ol unu foje gastigis la samideanaron ĉe sia hejmo apud la maro ĉe Black Rock. Li havis tre fundan scion de nia lingvo, kaj ŝatis verki en ĝi mallongajn historietojn kaj poeziojn. Al li "La Suda Kruc" ŝuldis "La Vilaĝa Lernejnabo." Legantoj de "The Esperanto Guide" memoros, ke li tre helpis la aŭtoron, S-ron. Hyde, en la legado de la presprovaĵoj. Al la parencoj de nia mortinta kunbatalanto ni etendas niajn plej sincerajn kondolencojn.

Jus ni ricevis la bedaŭrindan informon, ke nia samideano, distrikta ekspolicano en Saltdalen, Johan Lorentz Normann, mortis la 4an de aŭgusto en sia 101½ vivjaro.

Li estis dum sia tuta vivo vito kun multaj intereso. En aĝo de 84 jaroj li komencis lerni Esperanton kaj du jaroj poste li kun sukceso partoprenis en stila konkurso en nia lingvo. Dum multaj jaroj li estis membro de N.E.L. kaj je sia morto li certe estis la plej maljuna Esperantisto en la mondo.— ("Norvega Esperantisto.")

Hall's Book Store

264 CHAPEL STREET

PRAHRAN

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K.—Nova kurso komenciĝis en Bankstown (antaŭurbo de Sidnejo), sub gvidado de S-ro. Edgar Pryke. Lernantoj kunvenas ĉiusemajne.

Dum oktobro unu el la amuzajoj ĉe la Sidneja Esperanto-Societo, estis ŝercproceso dum kiu kelkaj respektindaj membroj de la klubo energie defendis sin kontraŭ teruraj akuzoj inter oftaj laŭtaj ekridoj de la aŭdantaro. Kiu deziras esperantan advokaton skribu al Sidnejo kaj humoro certe ne forestos.

“La Angla Lagdistrikto” estis ia temo de lumbilda esperanta parolado farita de la prezidanto de la Sidneja Esperanta Societo en kunveno de tiu ĉi societo je la 18a oktobro. Li klare montris kiel bona organizado kaj spirito de frateco povas pli valorigi libertempon preskaŭ centoble, ĉar sub la gvidado de du libertempaj societoj S-ro. Taylor estis rigardinta ĉiun gravan lagon kaj suprengrimpinta ĉiun altan monton en plejbona cirkonstancoj kaj dum plej mallonga tempospaco.

Nenie en la Britinsuloj troviĝas tiel multe da pitoreska pejzaĝo en tia kompare malvasta spaco kiel en la laga distrikto de norda Anglujo. Ĉi-flanke la vizitanto vidas pacaĵn valojn, malglatajn montojn kaj ĉarmajn lagojn. Tie ĉi la poetoj kaj literaturistoj trovis kvietecon. Tennyson, Wordsworth, Shelley, Southey, Ruskin, kaj Mrs. Heman's laboradis kaj recevis inspiron el la mirinda atmosfero de la montaj kaj valoj.

Per helpo de 60 lumbildoj, la parolanto priskribis la gastodomojn de la “Holiday Fellowship” kaj “Co-operative Holidays Association” kaj la (kelkfoje komikajn) aventurojn de la gastaro sur vojo kaj deklivo. Inter la gastaro ĉiam regis kamaradeco kaj amikeco ĉu dum la ekskursoj ĉu dum la vesperfestenoj en la gastodomo, kvankam plejmulte el la gastoj ne konatiĝis antaŭ la libertempoj kaj disiĝis al ĉiu parto de la lando poste.

CARNEGIE, V.—Jaŭdon la 4a de oktobro, Sinjoroj Byatt kaj Hudson faris propagandan paroladon ĉe la Carnegie filio de la Oranĝa Loĝio, laŭ aranĝoj de la sekretario de la Carnegie Esperanta Grupo, F-ino. W. Irwin.

La aŭskultantoj interesiĝis, kaj kelkaj studos la lingvon, kaj multaj volonte aĉetis la libretojn portatajn de S-ro. Byatt.

MELBURNO, V.—La Melburna sekcio de la A.E.A. iom ŝanĝis sian agadmanieron. Post malfermo de la kunveno akurate je la oka, oni sin metas en grupojn por komencantoj, por tiuj iom pli progresintaj, por tiuj, kiuj studas por la provokzameno de la B.E.A., por tiuj, kiuj volas gajni la diplomon, kaj, fine, konversacia grupo de tiuj, kiuj volas pliperfektigi sin en la parolado. Je la naŭa, aŭ iom poste, ĉiuj kolektiĝas en unu grupo por aŭskulti prelegon laŭ aranĝita temaro kaj antaŭ ol la disiĝo estas kelkaj minutoj por agrabla esperanta kantado.

La aranĝita temaro estas kiel sekvas:—Nov. 16, Stamp Collecting, S-ro. C. L. Clarke; Nov. 23, Translation Evening, S-ino. Bigelow; Nov. 30, Propaganda Work, S-ro. G. Redfern; Dec. 7, Music and Singing, Membroj; Dec. 14, Esperanto Literature, S-ro. C. W. Ballard; Dec. 21, Esperanto in Europe, S-ro. P. T. Hudson.

Dum oktobro la Melburnaj kaj Sidnejoj samideanoj havis la plezurojn bonvenigi S-ron, George Gordon, kiu havis multon, por diri pri siaj vagonoj tra Eŭropo dum la lastaj du jaroj. Li ĉeestis la XIV kaj XV kongresojn kaj renkontis multajn eminentulojn en Esperantaj kaj aliaj rondoj. Nia samideano nun iras al Nov-Zelando por la somera sezono. Antaŭ ol li foriris, li faris aranĝojn por la restarigo de “La Suda Kruco” traduka kurso. Antaŭaj kursanoj kaj tiuj kiuj volas nun partopreni, sin turnu al la kondukanto, poŝtkesto 1367, strato Elizabeth Poŝtoŝicejo, Melburno.

PHILLIP ISLAND The Ideal Tourist Resort. 6 hours from Melbourne by boat and rail.

“Redcliffs,” Newhaven. Accommodation for 50 Guests.
— First Class Table.—

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, “Redcliffs,” NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

RECENZO.

El La "Camera Obscura," de Hildebrand, el la Holanda originalo tradukis H. C. Mees. Internacia Mondliteraturo Volumo 5, eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Kvankam la Holandanoj kaj la Angloj reciproke sin konis dum multaj jarcentoj, strange estas, ke preskaŭ nenio el la Holanda literaturo estis tradukita anglan. Tiu ĉi elĉerpaĵo el la verkoj de Nikolao Beets, kiu sub la pseŭdonimo, "Hildebrand" verkis poemojn dum sia junaĝo kaj poste, kiam li estis universitata profesoro, pritraktaĵojn pri temoj edifaj kaj literaturaj, montras ke la arto de la verkanto de la mallonga historieto estas la sama en ĉiuj mondpartoj. Pri la "Camera Obscura" la tradukiinto en sia antaŭparolo diras ke ĝi "okupas en la Nederlanda literatura unikan lokon. Ĝi estas kolekto de rakontoj kaj priskriboj de delikata kaj ofte sprita spirito, sed havas grandparte tre naciajn kolorojn. . . la majstra verko estas ankoraŭ nun legata . . . kaj neniu alia verko atingis tiel ĝeneralan ŝatatecon." Kvankam la nunaj eltiraĵoj ne gajnis por la verko la titolon, majstran verkon, ili estas tre legindaj kaj provizas konvenan legaĵon por la pasanta horo. El la tri rakontoj, eble la tria—Malnova konato—kiu priskribas la neatenditan viziton de malnova konatulo al amiko en lia somera loĝejo, dum li estas ĉirkaŭita de siaj iom malĝentilaj idoj estas la plej amuza. Samtempe, ĝi enhavas moralon kiu meritas la atenton de gepatroj kaj infanoj kie ajn ili estas. (C. W. B.)

(Ĉiu recenzata libro estas mendebla, ĉe A. E. A., Melburno.)

FILATELO.

En la nuna tempo la Aŭstraliaj 1/2d. kaj 1 1/2d. poŝtmarkoj ambaŭ estas verdaj. Tiu estas tre ĝeniga afero, kaj al oficistoj, kaj al uzantoj. Laŭ oficialaj informoj la nuna duonpencĉa poŝtmarko estos tuj anstataŭigata de prunkolora eldono, kaj, kiam la nuna provizo de la 1 1/2d. valoro estos elĉerpita, la koloro estos ŝanĝata en malhelan ruĝon. Multaj proponoj estis faritaj, ke la dezegno estu aliigita, sed la departemento ĉiam silentas rilate tiun punkton.

ZAMENHOF'S BIRTHDAY AND THE MONUMENT FUND.

Australian Esperantists will be pleased to know that £40 has been sent from here to the treasurer of the Monument Fund. Fifty pounds (sterling) of coupons were sent out, so there is still £10 to be collected. Could we not, on the occasion of the birthday anniversary of the Majstro, purchase a shilling coupon? A third of the £40 sent was subscribed by persons who are not Esperantists, but whose sympathies were awakened by their Esperanto friends. Make the fund known to your friends, and send for coupons to J. G. Pyke, 212 Swanston Street, Melbourne.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA.

Partoprenis ĉe la fakaj kunsidoj dum la XVa Universala Kongreso de Esperanto en Nurnberg, oficiala delegito de la Universala Komitato de vastega organizo: La Tutmondligo de Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (Y.M.C.A.), kiu enhavas preskaŭ 9000 lokajn grupojn kaj proksimume 2 milionojn da membroj en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi nun estas konstante reprezentata en la Kristana Esperantista Ligo Internacia per sia delegito S-ro. R. Horner, kiu feliĉe estas fervora kaj entuziasma Esperantisto. La Ĝenerala kunveno de la K.E.L.I. konfirmis kiel oficialan organon "Dia Regno" kaj elektis specialan agadkomitaton kun jenaj tri anoj: P. Hubner, Bergstrasse la Quedlinburg (Germanujo); H. A. Luyken, 23 Arcadian Gardens, Wood Green, London N 22 (Anglujo); R. Horner, 3 Rue General Dufour, Genf (Svisujo).

PRI LINGVAJ AFEROJ

Depost la antaŭjara Kongreso la Sekcio por la Komuna Vortaro daŭrigis labori senbrue kaj sendanke laŭ sia kutimo ĝi preparis kaj starigis la Trian Oficialan Aldonon, kiun la L. K. poste aprobis kaj oficialigis.

Baldaŭ aperos ankaŭ plena oficiala radikaro kun revizitaj kaj korektitaj naciilingvaj tradukoj kaj kun Esperantlingvaj difinoj, kompletigantaj la Vortaron de Kabe. La unua kajero enhavos la anglan, francan kaj germanan tradukojn.

Sciencaĵ studoj pri la problemoj de la pseŭdosufiksoj kaj pri tiu de la internaciaj vortoj estas komencitaj, same kiel preparaj esploroj por la internacia kolektado kaj tradukado de proverboj, komparoj kaj metaforoj.

La Komunvortara Sekcio, konstante kun ĉagreno, ke la plimulto de la verkantoj ne observas la ripetitajn konsilojn de Zamenhof kaj de la Akademio, denove rememorigas al la Esperantistaro siajn antaŭajn admonojn kaj insiste petas, ke neniu enkondukian novan radikon aŭ formon, antaŭ ol li estos konsultinta ne nur unu lingve kleran kaj spertan Esperantiston, sed kelkajn malsamlingvanajn kompetentulojn.

Por faciligi tiun ĉi konsultadon, kiu Zamenhof opiniis kaj ofte deklaris tute necesa, la Sekcio tuj starigos diverslingvanan komisionon, kiu prenos sur sin la taskon, ekzameni la publikigotajn verkojn kaj vortarojn, kiujn oni prezentos al ĝi.

Tiamaniere la aŭtoroj bezonos nur sin turni al la Direktoro de la Komunvortara Sekcio, 51 rue de Clichy, Paris IX, kiu transdonos la ekzamenotajn verkojn sinsekve al la diversaj difinitaj kompetentuloj.

La ekzameno ĉiam fariĝos senprokraste kaj kiel eble plej rapide, kaj la atesto de tiu kontrolo kaj korektado certe estos valora rekomendo apud la publiko. En ĝi kuŝas la sola rimedo, por kontraŭstari la danĝerigan emon de tiuj, kiuj senĉese kaj senpripense novajn internacie nekompreneblajn radikojn aŭ esprimojn uzas simple pro tio, ke ili tiamaniere pli rapide kaj pli senpene tradukas ian naciaĵon.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, jul.-aŭg.; Bulgara Esperantisto, aŭg.; Esperanto Triumfonta, n-roj 151, 2, 4, 5, 7; Itala Esperanta Revuo, aŭg., sep.; La Interligilo de l'P.T.T., jun., aŭg.; La Unuigita Tuthomaro, jul.-aŭg.; La Verda Ombro, jun.-jul.; Sennacieca Revuo, aŭg.-sep.

Esperantio, n-ro, 2; Internacia Stenografisto, sep.; Norvega Esperantisto, jun.-jul.; La Espero, jun.; La Nova Epoko, apr.-jun.; Litova Stelo, jul.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 26a oktobro ni ricevis la jenajn sumojn:—J. T. Downey, 9/-, ĝis junio, '24; Petro Dean, 5/-, ĝis junio, '24; W. Richardson, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; W. L. Waterman, 4/6, ĝis junio, '24; S. Polotynski, 4/6, ĝis julio, '24; —, Dadswell, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; P. Wyatt, 10/-, ĝis julio, '25; E. W. Wheeler, 5/-, ĝis julio, '24; F. Trewin, 4/6, ĝis septembro, '24; S. J. Leberg, 9/-, ĝis majo, '24; F. T. Hepworth, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; W. H. King, 4/6, ĝis julio, '24; M. Hollow, 4/6, ĝis junio, '24; F. Koeppen, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; Fred Halliday, 10/-, ĝis julio, '25; F. T. R. McArdle, 4/6, ĝis aŭgusto, '24; E. A. Budge, 5/-, ĝis majo, '23; H. R. Smith, 5/-; H. N. Love, 4/6, ĝis julio, '24; A. H. McPhie, 9/-, ĝis julio, '24; E. M. Wallace, 5/-, ĝis julio, '24; Nigra Cigna Grupo, £1/9/3, ĝis aŭgusto, '23; F. Tondut, 4/6, ĝis junio, '24; E. Lee, 4/6, ĝis majo, '24; F. J. Ryatt, 4/6, ĝis septembro, '24; C. Unwin, 7/6, ĝis februaro, '24; C. W. Beard, 5/-, ĝis septembro, '24; T. E. O'Donaghue, 4/6, ĝis junio, '24; C. Dahl, 9/-; A. J. Hanks, 4/6, ĝis septembro, '24; kontantaj vendoj, 20/-; Hobarta Esperanta Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Nigra Cigna Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Dargaville Esperanta Asocio, 5/6, ĝis septembro, '24; S. Polotynski, 1/-; Whangarei Esperanta Grupo, 5/6, ĝis septembro, '24; Aŭstralazia Esperanta Grupo, 5/6, ĝis aŭgusto, '24; Berwick Esperanta Grupo, 2/9, ĝis februaro, '24.

GARANTIA FONDO.

J. T. Downey, 1/6; Petro Dean, 5/-; A. Martin, 3/-; M. Hollow, 5/6; A. H. McPhie, 6/-; Ethel Lee, 5/6.

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
BONA ODORA SPIRO
BONA RIDO
BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro, E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 42. Melburno (*Melbourne*), Australio. 10 Decembro, 1923.

IS ESPERANTO REALLY NEEDED?

"Language remains the worst frontier in Europe; the most complicated, the most impassable, the hardest to adjust, the most fertile in conflicts and hatred."

So writes Professor A. L. Guérard, in "The National Geographic Magazine" of America.

Western Europe, that is, Europe minus Russia—a region (as we all know) much smaller than Australia—rejoices in the possession of some forty languages (not including innumerable local patois), which are taught in schools, used in printing books and newspapers, and, even in cases where they are not officially established, are strong enough to create a "language question" which is capable of giving rise to violent events.

Two hundred miles is more than the distance from Sydney to Canberra, Melbourne to Albury, Brisbane to Bundaberg—a matter of five hours in a moderately fast train. Soon we shall think of it as a two-hour ride in a commercial aeroplane.

"If," says Professor Guérard, "with any one of the European capitals as a centre (with the exception of Rome) you draw a circle 200 miles in radius, you will find that at least four different languages are reached. Such a circle forms very restricted bounds for the scientist or business man.

"And it is indeed a prison. Beyond its wall reign incomprehension, diffi-

dence, hatred. If a man lands on the wrong side of the language boundary, the very accent of his speech marks him for a foreigner, frequently for an enemy. He is fair game for the crook and an object of suspicion to the police.

"The telephone turns into a mockery. What is the use of being connected with Berlin and Rome if you can't speak German or Italian? The telephone is pitiless for strangers whose pronunciation is imperfect. It is not always easy to get the right number even in your own language, but with the added handicap of a foreign accent, the case is well-nigh hopeless."

Matters would be quite bad enough, even if the people using each of these numerous languages were segregated so as to form well-defined linguistic units, but—

"Confusion grows worse confounded when, instead of forming a patchwork or mosaic of self-contained elements, populations of different speech jostle one another in the same territory. No map can do full justice to such a situation, the result of conquest, migration, or infiltration."

Frequently the dominant population belongs to one linguistic group, the common people to another; sometimes with strange results. Thus it has come to pass that at Salonika, as at Constantinople, the language in which the best schools are conducted and the

leading newspapers are published is French.

And these linguistic groups in the Old World tend to become more and more tenacious of their ancestral tongues as time goes on.

"Many nations have revived and struggled for recognition, for the last hundred years; and every little group, as soon as it acquired consciousness, became loudly assertive and exclusive. *Sinn Fein* could be the motto of all the national revivals in recent history.

"Nationalism has no doubt been a great power for good, but it has also exacted a heavy price. In reviving the Czech language as a vehicle of culture, the Bohemians erected a new barrier between themselves and the rest of the world. Catalonia is the most active part of Spain, and the Catalan language has a noble tradition; yet it seems a pity that this sturdy, progressive population should not be satisfied with Castilian, a language of world-wide availability.

"The Irish Free State will not let the Irish language fade away; it may even require every loyal Irishman to burden his mind with that venerable and impracticable instrument.

"In 1830, French was practically the culture language of all the Belgians. But the Flemings would have no peace until they had secured for their Dutch dialect full equality with French, thus creating a linguistic barbed-wire fence through a country about as large as Maryland and Delaware together.

"France had repeatedly threatened the independence of Belgium, and Flemish belongs to a different family from French, so there is some justification in the hostility of the Flemings to the supremacy of the French language.

"These reasons do not exist in the case of Rumanian. There was no Rumanian literature until half a century ago. French was the current language for all educated people in Rumania; only French was heard in the salons and theatres of Bucharest, and even in the corridors of the National Parliament.

"French and Rumanian are cognate languages, and there is not the slightest danger that France would ever threaten the political or economic independence of Rumania. It seems as if the wise thing to do would be to

adopt French as the official language of the new state.

"But that was incompatible with the fierce pride of a new nationality, which must have all the appurtenances of its dignity—a dynasty, a diplomacy, an army, a navy, a language. So, without any feeling of hostility toward France, patriotic Rumanians began deriding and even mishandling the *Bonjouristes*, as they called their Frenchified aristocracy.

"One of the most curious instances of this craving for national differentiation, this "Ourselves Alone!" in the linguistic domain, is provided by the Norwegians. It seems bad enough that Scandinavian, spoken in five countries (Sweden, Norway, Denmark, Finland, and Iceland), should be divided into at least two branches, which a peculiar accentuation makes noticeably different.

"We might desire to see the rise of a Pan-Scandinavian, over-riding local idioms, in the same way as the King's English is superseding provincial forms. But Norway has chosen another path. She was getting along well enough with Danish as her official language, when some patriot discovered that the use of Danish was the badge of previous servitude. So, against Danish, or *Riksmaal*, a new "national" tongue was set up, the *Landsmaal*. This, although it calls itself the Norwegian Popular Language, is an artificial combination, a composite dialect, on the basis of old Norse peasant patois. It is not spoken spontaneously anywhere, but it is taught, it is gaining ground, and it may become the sole medium of expression in Norway.

"Thus an obstacle deeper than the Skagerrack will be created between two sister countries which, even combined, would form too small a culture group."

Professor Guérard is already known to us as a supporter of the international language idea, and in this article he reaffirms his belief in that solution of the formidable problem of diversity of language. While he heartily approves of the preservation of existing natural languages, and even dialects, and explains the aesthetic and social purposes they serve, again he declares that an international means of communication, in addition thereto, has become an imperative necessity.

A RESOLUTION THAT WAS NOT ACCEPTED.

Of the resolutions of the Commission for Intellectual Co-operation, the only one that was not accepted by the League of Nations was that which recommended the instruction of foreign languages in preference to an artificial world-language. A number of delegates, among them Lord Robert Cecil, found that resolution unacceptable, on account of the great progress of Esperanto during last year — an instance being the action of the Brazilian Parliament in establishing examinations in Esperanto in all normal schools.

ITALIAN MINISTRY OF COMMERCE FAVORABLE.

At the Italian Esperanto Congress at Terni, where the Government and also the Ministries of Education, Public Works, Economy, the Colonies, War and Marine were represented it was announced that the Ministry of Commerce and Industry had permitted the teaching of Esperanto in Royal Commercial Schools.

A letter signed on behalf of the Minister, and addressed to all Royal Commercial Schools, was read at the Congress.

THE POLICE AND ESPERANTO.

This is an international age, and operations of criminal organisations often extend to several countries at once, like those of many more laudable institutions. Consequently the detection and prevention of crime also assume an international character. One example of this is the labours of the League of Nations for the suppression of the "white slave" traffic and the traffic in dangerous drugs.

Another example is the International Police Congress recently held in Vienna, where many matters of close concern alike to well-doers and

to evil-doers were discussed. In the discussions the old difficulty of diversity of language was once again felt, and the Congress was the more ready to hear the representations of the delegate of the World-wide Police League, a voluntary organisation which makes much use of Esperanto, who recommended the more general use of the simple international tongue.

A committee was appointed, and decided in favour of the language by a large majority, which included certain members who had come to scoff and remained to advocate Esperanto.

The Police League, which has its headquarters in Budapest, publishes a journal entirely in Esperanto, which is announced as dealing with "criminal matters, secret languages, sects and written codes," with regular news of various undesirable traffics, and with original articles on the most striking criminal cases.

FINNA SAMIDEANO ALVENAS.

Du el la Melburnaj grupoj havis la plezuron akcepti Finnan samideanon, sinjoro Lauri Laiho, kiu venas loĝi en Aŭstralio. La afabla vizitanto jam starigis sian tendon en Melburno.

Ĉe la kunvenoj sinjoro Laiho faris interesan paroladon pri sia lando kaj pri la valoro de Esperanto al vojaĝanto. El tiuj paroladoj tre profitis la grupanoj, tiel pro la flua, bonstila Esperanto, kiel ankaŭ pro la klara, preciza prononco de la vokaloj. Pri tiu lasta punkto ni Aŭstralianoj, kiel ĉiuj Anglosaksonoj, tre bezonas instruon kaj ekzercon.

Bonvenon, Sinjoro, al la Lando de la Suda Vento!

REVENO DE GESINJOROJ DRUMMOND.

Reveninte el la Meko de la Esperantistoj—la XV-a universala Kongreso en Nürnberg—du tre malnovaj kaj fervoraj samideanoj, sinjoro W. J. Drummond kaj sinjorino M. Drum-

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendĵi niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POŝTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.c., kostas 3ŝ. (aldonu 6 p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezo). Ni ankaŭ liveras ĉoko ladojn en kartonoj je 3ŝ 6d ĝis 22ŝ 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

mond, atingis Melburnon en la 16-a de novembro. Sinjoro Drummond, prezidanto de la Melburna Esperanto-Klubo, estas unu el la pioniroj de Esperanto en Melburno, kaj sinjorino Drummond estas de multe da jaroj entuziasma probatalanto de nia lingvo.

La vojaĝintoj ne nur alestis la kongreson, sed ankaŭ vizitis, uzante nur Esperanton, pli ol tridek urbojn en Eŭropo. En multaj lokoj sinjoro Drummond faris paroladon pri Aŭstralio de la vidpunkto de la eventuala migranto, kun helpo de lumbildoj, kies klišojn pruntis al li la Alta Komisaro de Aŭstralio en Londono. Tiuj paroladoj havis grandan sukceson, precipe en Lyons (Francujo), kie la Ĉambro de Komercio disponigis por la kunveno specialan salomon. Ne nur valora servo al Aŭstralio estas tia agado, sed ankaŭ nova refuto de la malnova kalumnio, ke Esperanto estas kontraŭpatriota.

Kun profunda entuziasmo la revenintoj parolas pri la XV-a kongreso, de kiu sinjoro Drummond havis la honoron esti vicprezidanto, kaj pri ĝiaj neforgeseblaj memoroj. Kvin mil homoj el pli ol 40 nacioj, parolantaj per komuna lingvo kaj kun perfekta kompreno . . . ; la temo ne estas nova, tamen ĉiam inspiranta, kaj ni hejme restantoj povas plenrajte envi al gesinjoroj Drummond la ĝojon konstati tiun miraklon per propraj okuloj kaj oreloj. Ni ja nur povas diri: "Feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!"

Kun doktoro Privat sinjoro Drummond rakontas pri interesa, kelkhora konversacio. Pri la energio kaj kapablo de Privat sinjoro Drummond estas tre impresita, kaj lin nomas "la animo de la Esperanta movado."

GESINJOROJ DRUMMOND PAROLADOS.

En merkredo, 12-a de decembro, en la Australian Church (Aŭstralia Preĝejo), Melburno, gesinjoroj Drummond faros paroladojn en Angla linvo pri

sia vizito al Eŭropo.

Ambaŭ estas spertaj kaj spritaj parolantoj, kaj la paroloj estos vere aŭdindaj. Espereble prezidos la kunvenon Sir Aleksandro Peacock, ministro de popola instruado de la provinco Viktorio.

SONETO.

De Raffaello Santi.

Ho am', ho am', vi logis min al reto
per la okuloj, kies bril' doloras,
per neĝaj vangoj, kie rozoj floras,
per dolĉa vort' kaj nobla etiketo.

Jen flam' en mi! Estingas ĝin nenio,
nek la river', nek mar'. Sed mi ne
ĝemas.

Volupto tia en ĉi ardo tremas,
dum ĉiam pli konsumas min pasio.

Ho, estis dolĉa jugo, dolĉa ĉen'
neĝblankaj viaj brakoj ĉirkaŭ kolo.
Malligis vi — jen mia kor' en sven'.

Pri la ceteraj ĉesu la parolo,
ĉar dum la cit' mortigus min ĉagren',
nur mute do mi pensas vin en solo.

El itala tradukis K. de Kalocsay.

ESPERANTISTO ELTROVAS GENIULAN MUZIKAN JUNULON.

Nia samideano, S-ro. Stefan Polotynski, konatiĝis en Sidnejo kun infano, kies lerta ludado de la piano estas rimarkinda. S-ro. Polotynski intencas plue instrui kaj poste konduki malgrandan Jimmy Walker al Londono kaj aliaj centroj de muzika kulturo en Eŭropo. La knabo estas nun dekunu-jaraĝa kaj ludas la pianon de post sia kvara jaro. S-ro. Polotynski jam aranĝis serion da koncertoj en Polujo. Li volas, ke Jimmy fariĝu ne nur pianludulo sed ankaŭ kondukisto kaj komponisto, kaj li estas certa, ke la knabo iam estos famulo.

Hall's Book Store

'Phone: Windsor 6081.

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

264 CHAPEL STREET
— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall.)

Agent for "LA SUDA KRUCO."

RECENZO.

Esperanta Alfabeto kun Bildoj, de E. A. Pryke, D.B.E.A., Bankstown, apud Sydney, N.S.W., Aŭstralio; ilustrita de George Collingridge d. Tourcey, K.B.E.A. Ĉe Presejo G. Collingridge, Hornsby, N.S.W., Aŭstralio. Prezo: kvin ŝilingoj.

Kun feliĉa rezulto kunlaboris du eminentaj samideanoj por produkti ĉi tiun belan kaj utilan a-b-c-ĉ-libron. Sinjoro Collingridge estas jam distingita studento kaj verkisto pri antikvaj vojaĝoj al Aŭstralio, kaj egale bone konata pro sia senlaca laborado pri la arto, precipe pri la pentrado. Sinjoro Pryke de multe da jaroj sindone laboras je la ne malpli valora praktika flanko de nia movado.

La libro konsistas el la alfabeto de nia lingvo kun konvena verseto por ĉiu litero (krom la malfeliĉa ŭ, kiu neniam komencas vorton), artoplene ilustrita per la talento de sinjoro Collingridge.

D estas dando
diligente dancanta;
E — elefanto
energie kuranta.

Ja malafabla estas tiu, kiu ne volas lerni per tia agrabla metodo!

La bildoj kun la akompanantaj versetoj estas originale kaj trafede segnitaj en blankaj linioj sur fonoj de diversaj nuancoj de viola koloro; ili estas muntitaj po du sur unu paĝo sur palverda papero. Pri la harmonio de la tonoj ne malpli sukcesis tia artisto, kia sinjoro Collingridge, ol pri la trafeco kaj facila memoreblo de la versetoj—tia praktika instruisto, kia sinjoro Pryke. Al ambaŭ samideanoj ni kore gratulas.

La libro taŭgas, kiel por donaco, tiel ankaŭ por zorga konservado, kaj nepre ĉiu lernanto, kiu ĝin trarigardos, almenaŭ iom lernos, eble eĉ ne sciante, ke li lernas. Plie, ĉar la libro konsistas el "artist's proofs" (provaĵoj de artisto), ĝi havas nuntempe multan valoron.

Du-tri erarojn oni devas bedaŭri, precipe en libro, kiu trafos en manojn

de komencantoj: "signifikanta" anstataŭ "signifanta," "komencas" anstataŭ "komencas," kaj "majestro" anstataŭ "majstro."

(A. D.)

Legendoj, de A. Niemojewski, tradukita el la pola originalo de B. Kuhl, kun antaŭparolo de Antoni Grabowski: Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

La antaŭparolo klarigas, ke la aŭtoro estas talenta nuntempa pola verkisto. Li multe vojaĝis en Oriento, kaj komencinte kiel artiso transformiĝis iom post iom en scienciston kaj dediĉis sin fine al la kompara esplorado de religioj. "La nuna libreto konsistas el kvar poeziaj rakontoj el la vivo de Jesuo, sed tiu ĉi nomo, kvankam li estas la ĉefa heroo, nenie estas dirita, sed lasita al la konjektemo de la legantoj. Li kaj lia granda verko estas traktataj diskrete kaj ili formas nur la kondukan fadenon de serio da koloraj morbildoj el tiu epoko. . . . Kvankam la temo estas elstudita, la novelista talento de la aŭtoro brilas en la legendoj plenforte. La tutaĵo vivas kaj impresas potence la animon de la leganto." Kial fama liberpensulo elektis ĉi tiun temon estas malfacile kompreneble. Ĉiu leganto tuj vidos, ke la temo venas el la Nova Testamento, kaj ĉar la nuna verko variigas la vortojn sed neniamaniere ŝanĝas la instruon, oni povas facile imagi, ke la legado de "Legendoj" havus la rezulton, ke, se la leganto antaŭe forĝis legi sian Biblion, li denove rapidos al la ĝuoj de la Sankta Libro.

(C. W. B.)

M a s ' i n f a k a Esperanto - Vortaro Prielementa, Eugen Wüster Internacia mondliteraturo, volumo 2, eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig.

Ĉi tiu malgranda libro estas de la plej granda valoro. Ĉiu, kiu volas korekte uzi la Esperantajn ekvivalentojn de teknikaj vortoj bonvenigos ĉi tiun vortaron. Kvankam la Esperantaj vortoj estas tradukitaj en Germanan lingvon la libro estos utila al Esper-

PHILLIP ISLAND

The Ideal Tourist Resort.
6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
— First Class Table. —

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

antaj verkistoj de ĉiu nacio. La preskostoj kaj grandeco de la libro estis limititaj per tre simpla sed tre praktika ideo pri la uzo de referencaj numeroj elpensita de d-ro Dietterle. La kompilinto diras, ke li prezentas nur jam uzitajn kunmetaĵojn; novajn radikojn li ne bezonis enkonduki. La vortoj ĉi tie donitaj troviĝos pli aŭ malpli en ĉiu faka vortaro kaj tre faciligos la laboron de ties kompilantoj.

(C. W. B.)

EN LA FRUAJ TAGOJ.

De D-ro Kazimierz Bein (Kabe).

En la jaro 1887, kiam aperis la unua broŝuro de D-ro Esperanto, mi estis liceano en Varsovio. Una el miaj kolegoj, S. D., granda ŝerculo, aĉetis la lernolibreton, legis ĝin al ni dum la paŭzoj inter la lecionoj kaj uzis sian tutan spritecon por moki la lingvon kaj precipe kelkajn sufiksojn, kiujn li trovis—maldecaj. Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi partoprenis kaj subtenis la mokojn kaj ĉar mi estis bona latinisto, mi forte kritikis la lingvon, en kiu mankas, inter alie, tiaj formoj kiel *futurum exactum* kaj *plusquamperfectum*. Tamen la versaĵoj ĉarmis min kaj dum kelke da tagoj senĉese “en sonĝo principon mi vidis.” Post kelke da semajnoj mia kolego S. D. forgesis pri la maldecaj sufiksoj, mi pri la principo. La leganto ne juĝu nin tro severe: ni estis junaj, la vetero estis bela, ne estas do mirinde, ke la boatveturado sur Vistulo allogis nin pli forte, ol nova lingvo: ĉu ne sufiĉe jam tedis nin la antikvaj!

Pasis 16 jaroj. Kiel abonanto de la angla “Review of Reviews” mi legis tie kun intereso la esperantan kronikon, sed post kelke da monatoj ĝi komencis inciti min. “Kia diablo estas tiu Esperanto, kiun faris en Varsovio iu D-ro Zamenhof, okulisto, same kiel mi?” Mi aĉetis la unuan malgrandan broŝuron de D-ro Esperanto por Poloj, mi prenis de kolego (li tiam ne estis ankoraŭ Esperantisto) la jarkolekton 1896 de “Lingvo Internacia” kaj post kelke da tagoj, ĝustadire post kelhora laboro, mi jam libere komprenis ĉiajn esperantajn tekstojn sen helpo de vortaro.

Mi jam konis la novan lingvon, mi ekdeziris koniĝi kun ĝia aŭtoro; kaj vere mi ne konis lin; mi pensis, ke oni bezonas pretekston por lin viziti en lia hejmo. Baldaŭ mi trovis rimedon; mi iris al la Doktoro, por aĉeti kelke da unuaj esperantaj eldonaĵoj, kiujn li tiam ankoraŭ vendadis en sia loĝejo. D-ro Zamenhof akceptas la malsanulojn de la 4a ĝis la 6a horo, mi do venis tuj post la 6a. La atendejo, estis ankoraŭ plena kaj mi devis esti pacienca preskaŭ unu horon. Fine eliris el la kabineto la lasta paciento, kaj kun batanta koro mi prezentis min al la Majstro.

D-ro Zamenhof estis jam iom laca, sed eksciinte pri la celo de mia vizito, li tre afable akceptis min, kaj ni komencis esperante interparolon pri Esperanto. Mi konstatis kun plezuro, ke sen iu ajn peno mi komprenas ĉion; ĉu D-ro Zamenhof same facile komprenis min, mi ne scias, sed mi iom dubas, ĉar de mia konvertiĝo pasis apenaŭ unu semajno. La simpleco kaj natureco de la manieroj de l' Doktoro tute ĉarmis min; kun streĉita atento mi aŭskultis ĉiun lian vorton kaj mi decidis, ke mi pli ofte . . . aĉetos esperantajn broŝurojn kaj librojn. Je la 8a horo D-ro Zamenhof komencis oscedi. Timante, ke mi tedis lin, mi tuj lin adiaŭis kaj foriris. Mi ankoraŭ ne sciis tiam, ke nia Majstro ĉiam kaj ĉie oscedas vespere; mi tion eksciis nur poste kaj mi trankviliĝis. “Bone,” pensis mi, “ne mi estis la kulpo.” Sed tute konsolita mi min eksentis nur dum la Dresdena kongreso: D-ro Zamenhof, tute ne indiferenta je “das ewig Weibliche” ¹⁾, oscedis vespere, parolante kun fraŭlino Hedwig Reicher!²

Mi daŭrigis miajn vizitojn, sed mi devas konfesi, ke ne ĉiuj kontentigis min. Traleginte unu propagandan broŝuron, la ekzercaron kaj kelke da noveloj, kaj tradukinte du rakontojn, mi venis al firma konkludo, ke diversaj reformoj estas absolute neeviteblaj en Esperanto kaj mi prezentis miajn proponojn al la Doktoro. Kur miro mi konstatis, ke li ne estas ravita kaj ke li ne volas akcepti ilin. “Terura

Novjara Donaco al via Transmara Korespondanto.

LA SUDA KRUCO por unu jaro.

Por Kvin Shilingoj ni Sendos ghin.

konŝervativulo," pensis mi, "mi ne plu diskutos kun li pri la reformoj; baldaŭ li komprenos sian eraron kaj bedaŭros, ke li ne adoptis pli frue miajn proponojn."

Mia esperanta biblioteko pli kaj pli grandiĝis, mi pli kaj pli intime ekkonis dum miaj vizitoj nian Majstron, ne nur kiel aŭtoron de Esperanto, sed ankaŭ kiel homon, kiel idealiston, kiel noblan viron, kiu ĉiam pensas pri aliaj kaj ĉiam forgesas pri si mem. En la 50a datreveno de lia naskotago, kun ĉiuj Esperantistoj mi sendis al li miajn sincerajn dezirojn de longa kaj feliĉa vivo kaj kunigis mian voĉon kun tiu de ĉiuj samideanoj en fiera aklamado: "Ecce homo!"—("Jen homo!")

1) citaĵo el la dramo "Faust" de Goethe: "la eterna virino."

2) la fama aktorino, kiu ludis la rolon de "Ifigenio" dum la prezentado de la dramo "Ifigenio en Taŭrido" de Goethe dum la kongreso en Dresdeno 1908.

PLIBELIGO DE MELBURNO.

Priskribo de Melburno, fiere uzata de ĝiaj loĝantoj, estas "Mirinda Melburno, la reĝina urbo de la sudo." La komitato de la Urbdesegna asocio ĵus faris tre gravajn proponojn, kiuj, se oni efektiviĝos ilin, faros el Melburno unu el la plej belaj urboj en la mondo.

La nuna Urbdomo estas proksima al la suda ekstremo de la urbo kaj okupas relative malgrandan lokon, inter tre valoraj negocaj sidlokoj, sed, ĉar la tendenco de la urbo estas kreski en norda direkto, oni nun proponas formovi la civitan centron pli norden, kie estas ampleksa spaco por grandaj konstruaĵoj kun ebleco utiligi la ĉirkaŭan spacon por ĝardenoj kaj kunvenejoj per la loĝantaro.

Alia tre interesa propono estas la starigo de terkultura zono. Tiu estos zono tri mejlojn larĝa ĉirkaŭanta la urbon. La plej proksima rando de la zono estos je distanco de ok mejloj de

la centro de Melburno. Nenia nova konstruaĵo estos permesata en la zono, krom tiuj necesaj por kulturaj celoj. La motivo estas malebligi ke Melburno fariĝu tiel vaste etendita kiel estas Parizo kaj Londono. Alia tre grava motivo estas, ke kiel rezultato de la establo de la terkultura zono, estos malkariĝo en la prezoj de lakto, butero kaj ovo.

La konstruo de granda artefarita lago, plua ludloko por infanoj, plibeligo de la maraj kaj riveraj bordoj ricevos la atenton de la komitato. La egale necesaj aferoj de trajna kaj trama konstruo, konstruo de ŝoseoj, plua kloaka sistemo kaj buĉejoj ne estos forgesitaj.

KRONIKO.

SYDNEY.—Tre sukcesa monato por Sidnejaĵ esperantistoj estis novembro. Krom bone aranĝita kaj efektiviĝita programo de regule okazantaj paroladoj en la klubo, oni ĝuis piknikon kaj bonvenigis kelkajn vizitantojn el malproksimaj landoj.

Fariĝis tre interesa parolado pri "Kordaj Instrumentoj" de nia fervora samideano kaj vic-prezidanto, S-ro Edgar Pryke, kiu sperte klarigis la devenon, uzon kaj muzikan valoron de diversaj muzikiloj. Alia temo, "Korespondado" (kiu ĝenerale promesas esti "seka"), okazis du semajnojn poste, sed S-ro Victor Rutland parolis en tiel facila, konvena maniero, donante tute nepedagogiajn ekzemplojn kaj ŝercajn flankaĵojn, ke ĉiuj atente aŭskultis ĝis la fino.

Okazo de graveco estis la vizito de s-ro Maurice Hyde ("Delsudo") je 8a novembro. Trapasante Sidnejon post pli ol dujara restado en Nov-Gineo kaj vojaĝo en Oriento li mallonge rakontis kelkajn travivaĵojn, precipe akcentante la progreson en Esperantujo.

La Societo ankaŭ salutis s-ron Klariĉec kaj alian samideanon el

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
 BONA ODORA SPIRO
 BONA RIDO
 BONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Nov-Zelando ĉe la fino de la monato.

MELBURNO.—Amuza kaj utila "traduka vespero," gvidata de Sinjorino Bigelow; la membroj tradukis lote elektitajn pecojn de bone konataj Anglaj versaroj.

Sinjoro Redfern faris interesan paroladon pri propagando, donante multe da utilaj konsiloj.

Agrabla riverfesto ĉe Studley-parko.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 29a novembro ni ricevis la jenajn sumojn:—B. A. Silk, 1/-; A. R. Cohen, 15/-, ĝis decembro, '24; Mr. Serpell, 4/6, septembro, '24; W. McPherson, 4/6, septembro, '24; A. Bassett, 4/6, septembro, '24; J. B. Henry, 4/6, majo, '24; E. D. Nesbet, 4/6, oktobro, '25; A. R. Cohen, 4/6, majo, '24; L. I. Carthew, 2/3, marto, '24; A. Bennet, 4/6, oktobro, '24; J. Vodanoviĉ, 7/6, junio, '25; Persista Grupo, 5/6, aŭgusto, '24; Iru Antaŭen grupo, 5/6, aŭgusto, '24; N. Biagoni, 5/-; Carnegie grupo, 5/6, aŭgusto, '24; G. Lamond, 4/6, oktobro, '24; G. Benson, 5/-; aŭgusto, '25; O. H. Weselman, 5/-, oktobro, '24.

FILIIĜITAJ GRUPOJ.

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30—10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso, "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Australazia Esperanto-Asocio. Sekretario, S-ro P. T. B. Hudson. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejo (Melburna sekcio), Hardware Chambers, 350 Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejo kaj poŝta adreso: ĉe F-ino. P. Ab-

bott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, ĵaŭde je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Society.—Prezidanto, S-ro. Alfred Gregory. Sekretario, S-ro. R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejo: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo Eaton-Bray-lernejo, Davey St., ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford. Sekretaria kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino: S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

Carnegie: Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Kunvenejo kaj poŝta adreso, "Kirkeald," 10 Woorayl St., Murrumbeena (du domojn for de la Carnegie Kinema-teatro) ĵaŭde vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey. Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro. H. Byatt. Sekretariino: F-ino. I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta.—Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejo: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne,
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.